Esperanto en servo de la monda paco



paco

Organo de la MEM-Sekcio de Germana Demokratia Respubliko



1979

MALARMADO! MALARMADO! MALARMADO!

El la „Deklaracio de la ŝtatoj de la Varsovia Kontrakto“

La Deklaracio estas akceptita dum kunsido, la 23an de novembro 1978 en Moskvo.

„La partoprenintaj ŝtatoj (Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio, Sovetunio) apelacias al ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, al ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj de la mondo, ke ili:

1. neskueble sin engaĝu por politiko de la paco, de malstreĉiĝo, por rezigno je apliko kaj minaco de perforto en la internaciaj rilatoj, por paca solvo de ĉiuj konfliktoj, por senkompromisa kondamno de agresmilitoj, por la kompleta forigo de interŝtataj militoj el la vivo de la homaro, por la ĉesigo de la vetarmado, por la finfina forigo de la restaĵoj de la „malvarma milito". La revo de milionoj da homoj ĉiukontinentaj pri mondo sen milito-konfliktoj ne estas utopio. Ĝi povos fariĝi realo per komunaj streĉoj de ĉiuj, kiuj pretas batali por tio.

2. efektivigu, ke en plej proksima tempo komenciĝu intertraktadoj inter 5 potencoj havantaj nukleajn armilojn – USSR, Usono, Granda Britio, Francio, Ĉinio –, kun la celo, malpermesi ĉiujn specojn de nukleaj armiloj el la arsenaloj de la ŝtatoj utiligonte la nuklean energion ekskluzive por pacaj celoj.

La homa genio ne malkovris la plej grandan energio-fonton – la atomenergion – por detrui per ĝi la civilizon. La plej alta ŝarĝo nuntempe ne estas, pliakceli la vetarmadon altigante la danĝeron de atomkatastrofo, sed liberigi la homaron el la skurĝo de nova milito.

3. firme persistu, ke la ŝtatoj disponantaj pri la plej signifa milita kaj ekonomia potencialoj, – speciale la kvin konstantaj membroj de la Konsilantaro pri Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj havas apartan respondecon por la konservo de la monda paco kaj internacia sekureco –, interkonsentu senprokraste pri la redukto de siaj milit-buĝetoj je difinita procentaĵo aŭ je sama absoluta kvanto, kiel unuan paŝon por la sekvontaj tri jaroj. La popoloj ne povas konsenti pri la daŭre kreskanta ŝarĝo de neproduktivaj elspezoj – la kostoj por la produktado de detruaj armiloj. Ĉie en la mondo la homoj atendas, ke plej grandaj rimedoj estu disponigataj por la plialtigo de la vivnivelo. La evoluigo de la sanitaraj servoj, la plibonigo de klereco kaj por la kontentigo de siaj kulturaj bezonoj.

Plenrajte la evolulandoj strebas al tio, ke almenaŭ parto de la pormilitaj elspezoj estu utiligata por la pliampleksigo de ekonomia kaj teknika helpo disponigata al ili. Tion oni povas kaj devas fari.

4. plialtigu la streĉojn de la ŝtatoj kaj registaroj por plej rapide fini la aktualajn traktadojn por la limigo kaj ĉesigo de la vetarmado en ties ĉefaj direktoj, por unuigi la klopodojn de ĉiuj ŝtatoj ĉe ellaborado kaj realigado de la primalarmadaj paŝoj kaj aktive komenci kun la realigo de la ideoj kaj rekomendoj, kiuj trovis ĝeneralan aprobon dum la eksterordinara kunsido de UN pri problemoj de malarmado.

La tempo urĝas. Rilate la ĉesigon de la vetarmado oni ne rajtas mezuri la tempon laŭ jaroj kaj tute ne laŭ jardekoj.

Flanke de la ŝtatoj partoprenantaj la traktadojn, necesas kuraĝaj paŝoj, taŭgaj por certigi ties sukceson. Tio eblas, se la volo de la popoloj trovos meritan respegulon en la politiko de ĉiuj registaroj.

5. antaŭenigu decideme la primilitan malstreĉiĝon en Eŭropo prenante efikajn paŝojn por la malkonstruo de la militista konfrontigo sur la eŭropa kontinento kun la certigo de sama sekureco de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj. Oni alvokas al tio ĉiujn partoprenantojn-ŝtatojn de la Tuteŭropa Konferenco kaj de la Traktadoj de Vieno pri la redukto de la trupoj kaj armadoj en mezeŭropo.

6. likvidu tre rapide la lastajn restaĵojn de koloniismo kaj de la politiko de novkoloniisma ekspluatado – la ĉefkaŭzoj por la subevoluanteco – kaj la radikojn de nacia kaj rasa subpremo. La popoloj de ĉiuj kontinentoj havas la nefordoneblan rajton vivi en paco, sendependeco kaj libereco, disponante suverene pri siaj naciaj riĉaĵoj en la intereso de la plialtigo de la bonfarto, digno kaj feliĉo de siaj civitanoj.


Neniu havas la rajton, sin enmiksi en la demandojn de ilia interna vivo, solveblajn nur de ili mem. La tuta mondo kondamnas kaj ĝenerale bojkotas la koloniismajn kaj rasismajn reĝimojn en Afriko kaj en aliaj partoj de la mondo.

7. strebadu persiste al transformo de la internaciaj ekonomiaj rilatoj sur justa kaj demokrata bazo kreante novan internacian ekonomian ordon, certigante akcelitan forigon de ekonomia malmoderneco de la evoluo-landoj kaj dinamikan progreson de ĉiuj popoloj de la tuta homaro.

8. agadu aktive por firme fiksankri en la internaciaj rilatoj la normojn de la samrajteco, de neenmikso en la internajn aferojn, de neapliko kaj neminaco, de perforto, de estimo de la nacia sendependeco kaj de suvereneco kaj de la nefordonebla rajto de ĉiu popolo je libera elekto de sia evolu-vojo laŭ siaj volo kaj esperoj por formadi la interŝtatajn rilatojn strikte aplikante la principojn akceptitajn de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo; neerareme realigi politikon de la paca kunekzistado. Ĉi-rilate la ŝtatoj partoprenintaj la Kunsidon denove deklaras sian decidemon por la starigo kaj evoluigo de larĝaj samrajtaj rilatoj kaj kunlaboro inter ĉiuj landoj de la mondo".

„Ĉiu generacio bezonas sian militon", diras la ĉinaj gvidantoj el Pekino. Kaj ili ne nur parolas... La foto montras Dresden post la dua mondmilito. Ĉu tio ripetiĝu?

Foto: Zentralbild





Dum la Eksterordinara Konferenco de la Monda Packonsilantaro ankaŭ okazis mitingo omaĝe al la murdita en USONO Martin Luther King. Kantas Dean Reed el USONO.

Foto: Zentralbild

Ĉesigu la vetarmadon!

Alvoko de la Eksterordinara Konferenco de la Monda Packonsilantaro en Berlin, 2-a—5-a de februaro 1979

Popoloj de la mondo!
Viroj kaj virinoj de ĉiuj kontinentoj!

La sana prudento, la zorgo pri la konservado de la civilizacio kaj la estonteco de la homaro persiste postulas de ni ĉiuj la komunan solvadon de la plej urĝa tasko:

Ĉesigu la vetarmadon!

La produktado de novaj amasneniigiloj kun ĉiam pli kaj pli granda detruforto atingis timigajn dimensiojn. Ĝi atingis tian danĝeran karakteron, ke la vetarmado – se ĝi ne estos ĉesigata senprokraste – minacas esti ne plu kontrolebla kaj kondukas la homaron al la abismo de nuklearmila katastrofo.

Ĉesigu la vetarmadon!

Tio signifas: Realigon de rezolutaj, efikaj paŝoj sur la vojo al ĝenerala kaj plena malarmado, por garantii daŭran pacon.

Ĉesigu la vetarmadon!

Tio signifas: Daŭrigon kaj pliprofundigon de la politiko de malstreĉiĝo, por malfermi al ĝi novajn perspektivojn.

Ĉesigu la vetarmadon!

Tio estas la ĉefa postulo en la nuntempa etapo de la batalo por la paco.

Tiu ĉi postulo unuigas ĉiam pli kaj pli vastajn popolamasojn, ĉiujn pacamajn fortojn. Ĝi estas deciddeklaro de Eksterordinara Kunveno pri malarmado, kunvokita unuafoje en la historio de UN. Ĝi formas la enhavon de multaj konstruaj proponoj kaj ideoj, prezentitaj de vico da registaroj de socialismaj, nepaktiĝintaj kaj aliaj pacamaj landoj, de politikaj partioj, neŝtataj organizaĵoj kaj personuloj de plej diversaj konceptoj.

Reale ekzistas la ebleco, senprokraste komenci la praktikan limigon kaj ĉesigon de la vetarmado. Por ke tiu ĉi ebleco fariĝu realeco, estas bezonata ankoraŭ pli aktiva, pli decidema, pli celstreba agado de la popoloj. La rezisto de tiuj, kiuj profitas de la vetarmado kaj tial sabotas ĉiujn paŝojn por ĝia ĉesigo, devas esti rompata.

Neniam antaŭe la pacfortoj estis tiel multnombraj kaj fortaj kiel hodiaŭ.

Ili kapablas malebligi la komploton de la militaristaj rondoj kaj de la amaskomunikiloj de la imperiismo. La pacfortoj kapablas repuŝi tiujn, kiuj celas bloki la malstreĉiĝon per la jam malnova elpensaĵo pri la „soveta militista minaco". La pacfortoj devas plifortigi siajn streĉojn, por ke la NATO-ŝtatoj ĉesu pligrandigi sian militistan potencon kaj plialtigi plu la armadbuĝetojn, ĉar per tio komenciĝus nova etapo de vetarmado.

La produktado de neŭtronaj armiloj kaj ilia lokigado en diversaj landoj devas esti malebligata.

La pacfortoj profunde maltrankviliĝas, ke la gvidantoj de la Popola Respubliko Ĉinio rifuzas partopreni konkretajn paŝojn al ĉesigo de vetarmado. Ilia subteno al la reakciaj fortoj, ĉefe en Ĉilio, Irano kaj Sudafriko, vekas profundan maltrankvilon. Tiu ĉi pozicio, ligita kun la tezo pri la „neevitebleco de milito", danĝerigas serioze la interesojn de malstreĉiĝo kaj de la paco.

El la Eksterordinara Konferenco de la Monda Packonsilantaro ni alvokas ĉiujn, kiuj strebas al paco kaj estas pretaj doni sian praktikan kontribuon por ĝia konservado. Ni disvolvu potencan kaj dinamikan movadon por ĉesigo de vetarmado!

Ni organizu mitingojn, manifestaciojn kaj marŝojn.

Ni direktu peticiojn, protestojn kaj postulojn al parlamentoj kaj registaroj. Dum naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj de la pacama publiko ni manifestu per la plej diversaj formoj kaj metodoj la pacesperojn de la popoloj. Ni koncentru niajn streĉojn al la plej gravaj celoj:

Ni diras ne al la nukleaj armiloj!

Ni postulu

la plej rapidan subskribon kaj la ekvalidigon de konvencio pri limigo de strategiaj ofensivarmiloj inter USSR kaj Usono, la senprokrastan komenciĝon de intertraktadoj inter la kvin potencoj posedantaj nukleajn armilojn – Sovetunio, Usono, Grandbritio, Francio kaj Ĉinio – por finfine neniigi ĉiujn specojn de nukleaj armiloj.

Ni diras ne al la neŭtrona bombo!

Ni senmaskigu la intrigojn de la militaristoj, celantajn trompi la publikan opinion kaj enigi la neŭtronajn armilojn en la arsenalojn de NATO.

Ni postulu

la malpermeson produktadi ĉiujn ajn novajn specojn kaj sistemojn de amasneniigiloj.

Ni diras ne al la armadbuĝetoj! Ni diras jes al la pacbuĝetoj!

Ni postulu

finon al la senĉesa plialtigo de elspezoj por militceloj;

malpliigon de la armadbuĝetoj de la ŝtatoj, plej fortaj laŭ militista kaj ekonomia vidpunktoj, antaŭ ĉio de la konstantaj membroj en la Sekureckonsilio de UN;

utiligon de la liberiĝintaj rimedoj por bonstato de la popoloj, por helpo al la evoluantaj landoj, por forigo de malsato, mizero, malsano kaj analfabeteco.

La ĉesigo de la vetarmado, la efektivigo de malarmado kaj la konservado de la paco estas nia komuna korafero!

Ni agu decideme laŭ la devizo:

En la nomo de la vivo: For la amasneniigajn armilojn!
Ĉesigu la vetarmadon!

Tr. D. Berndt

Intervjuo kun la prezidanto de MEM

La prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), d-ro Imre Pethes, partoprenis la eksterordinaran konferencon de MPK en Berlin.
La redaktoro de la taggazeto „Der Morgen" (La Mateno) Wulf Oehme, intervjuis d-ron Pethes.



„Der Morgen" (DM): En kio vi vidas la kontribuon de via organizaĵo en la hodiaŭ tiel grava tutmonda lukto por la paco?

D-ro Pethes (D-ro P.): La celo de nia internacia organizaĵo estas, kiel eldiras la nomo, la sekurigo de la paco. En ĉiuj partoj de la mondo ekzistas esperantistoj, sciantaj ke oni tre bone povas utiligi la internacian lingvon en la batalo por la paco. Laŭ la bonaj rilatoj, kiujn ni havas al la Monda Packonsilantaro, kaj kiujn ni povis pliprofundigi dum tiu ĉi konferenco, ni interkonsentigis niajn programojn. Ni klopodas subteni ĉiujn aktivecojn elirantajn de la Monda Packonsilantaro. La revuo de nia organizajo „Paco" servas al la propagando de tiu agado. La naciaj MEM-sekcioj intime kunlaboras kun la pacmovadoj de la koncernataj landoj subtenante ties laboron. La konferenco de Berlin por mi estis speciale grava por la ellaborado de la laborprogramo de MEM por 1979/80. La ĉi tie traktitaj temoj, mi supozas, estas de granda intereso por la naciaj organizaĵoj. Nia programprojekto esence konformas al la problemoj ĉi-tie priparolitaj. Ni devas kompletigi la projekton je la punktoj solidareco kun la batalo de la popoloj de Kampuĉeo kaj Nikaragvo. Centraj problemoj por ni restas la sekurigo de la paco en Eŭropo kaj la solidareco kun Vjetnamio.
Dum la lasta tempo ni organizis internaciajn kunvenojn traktintaj tiujn demandojn.
Nia movado en la opaj landoj havas adeptojn en ĉiuj tavoloj de la loĝantaro, de laboristoj ĝis sciencistoj, de dommastrinoj ĝis ekleziuloj. Eluzante la eblecojn de la internacia lingvo, ni strebas mobiligi tiujn esperantistojn por la pacbatalo.

DM: Ĉu vi povus doni kelkajn informojn pri la agado de MEM?

D-ro P.: MEM estas fondita 1953 en Aŭstrio. Pro tio ĝi unue nur aktivis en Eŭropo. Sed nun ĝi troveblas sur ĉiuj kontinentoj. Dum la konferenco de MEM en Varna ni povis konstati, ke jam aliĝis al ĝi pli ol 30 naciaj organizaĵoj. Estas malfacile taksi la precizan nombron de la membroj, ĉar oni ne statistikas ilin. Nia revuo „Paco" havas eldonkvanton de ĉ. 5 000 ekzempleroj. Laŭ mia takso entute 6 000–7 000 homoj aktivas.
Ĉiu-jare MEM okazigas kunvenojn dum la Universalaj Kongresoj. Krome ni organizas proprajn kunvenojn en la diversaj landoj.
Estonte ni volas, laŭ interkonsento akceptita ĉi-tie en Berlin, okazigi MEM-kunvenojn en la kadro de similaj konferencoj de la Monda Packonsilantaro.

DM: Kiujn personajn impresojn vi kunportos de tiu ekstervica konferenco de la Monda Packonsilantaro?

D-ro P.: Ĝi por mi estis eksterordinare impona konferenco. Ankaŭ pro tio, ĉar mi la unuan fojon partoprenis tian aranĝon. Mi kredas, ke la partoprenintoj el la tuta koro montris sian pacstrebadon, precipe la anoj de tiu generacio, kiu suferis du mondmilitojn. Tiu generacio aparte scias, kiom gravas la paco. Por mi estas kuraĝiga sento, ke ekzistas sur la mondo milionoj da homoj serioze strebantaj pacon. Ni ankaŭ estonte utiligos ĉiun eblecon, subteni la pacmovadojn en kapitalismaj landoj, kiuj luktas sub malfacilaj kondiĉoj por la konservo de la paco. El la tuta koro mi gratulas al miaj germanaj amikoj pro la grandioza organizado de tiu-ĉi renkontiĝo. Kaj mi dankas pro la ebleco, invitite de la Packonsilantaro de GDR, partopreni tiun konferencon.

Esperantistoj, MEM-anoj pliaktiviĝu!

Proponoj de la MEM-ano Rudolf Zimmermann el Dresden/GDR

Nia leganto Rudolf Zimmermann tre engaĝiĝas diversmaniere en la porpaca batalo. Laŭ li la esperantistoj devas startigi grandan kampanjon kontraŭ la militdanĝero. Ni sube publikigas la proponojn de amiko Zimmermann:

1. La esperantistoj kolektu bildmaterialojn, diapozitivojn kaj statistikajn indikojn pri la pompa komenco de la faŝisma movado kaj ties katastrofa fino. Oni devas eviti tamen la identigon de faŝismo kaj popolo.
2. La bildmaterialoj kaj diapozitivoj montru la urbojn de multaj landoj antaŭ la milito kaj post ĝi (i.a. Bremen, Hamburg, Dresden, Munkeno, Kolonjo, Monte Kasino, Koventri, Le Havre, Beogrado k.t.p.)
3. Oni ellaboru statistikojn kiuj indikos la kostojn de la militoj komparante ilin kun la sumoj investeblaj por la bonfarto de la homaro.
4. La teruraĵojn de la milito oni povas montri per bildoj pri invalidoj kaj per fotoj pri soldataj tombejoj. Ne forgesi oni rajtas la militblindulojn kaj la kostojn, kiujn la ŝtatoj devas disponigi post la milito por la prizorgado de la militaj viktimoj.
5. Oni devus klare montri, kiu estas interesita pri militoj kaj kiu devas suferi. Militon deziras la monprofitantoj. Viktimoj fariĝas la bonkreduloj. La militon propagandas la malsaĝuloj.
6. Ĉiuj ĉi-temaj broŝuroj kaj bildprezentoj povas esti libere multobligataj kaj represataj.
7. Ĉiuj MEM-sekcioj kaj porpacaj societoj devus subteni tiun kampanjon.
8. Samideanoj de la landaj MEM-sekcioj estas alvokataj traduki nacilingven la koncernajn materialojn kaj disvastigi ilin.
9. La materialon ricevu ne nur niaj porpacaj amikoj sed ankaŭ niaj kontraŭuloj, por ke ili pripensu la sekvojn de sia vojo.

Rudolf Zimmermann

Al W. Auld kaj A. Goodheir

Infana jes; infana raso
Senzorge per nukleoj ludas
Ne kredas, ke la mort' apudas
Naive, fida homamaso.

Forestas stulte de la klaso
La historion ĝi ne studas
Infana jes; infana raso
Senzorge per nukleoj ludas.
Vetkuras ĝi en gaja ĉaso

Ĉu treme pri la risk' aludas
Kaj senpripense holivudas
Ĝis trafos ĝin la mondfrakaso.
Infana jes; infana raso.

Rejna de Jong

La poemoj aludas la epopeon „La infana raso" verkitan de William Auld.

---

30 jaroj sukcesplena minoritata politiko

Tute novan vojon sukcese antaŭ 30 jaroj prenis la unua ŝtato de la laboruloj sur germana tero, Germana Demokratia Respubliko. Krom tre multaj taskoj tiu ĉi ŝtato devis solvi la demandon de la etnaj minoritatoj. Vivas ja sur la teritorio de GDR ne nur germanoj sed ankaŭ anoj de malgranda slava gento, la soraboj.

Inter la Spree-arbaro kaj Luzaciaj montoj etendiĝas je ambaŭ flankoj de la rivero Spree la loĝoregiono de la Luzaciaj Serboj (Soraboj). La civitanoj de tiu ĉi popoleto, la sola nacia minoritato en GDR, vivas konkorde kun la germanaj civitanoj kaj konstruas komune kun ili la socialismon. Luzacisербajn (sorabajn) homojn oni trovas en ĉiuj sferoj de la ĉiutaga vivo: kiel laboristoj, kooperativaj agrikulturistoj, instruistoj, sciencistoj, kuracistoj, verkistoj, muzikistoj kaj aliaj. Ankaŭ por la soraboj GDR estas la ŝtato.

Sed iom pri la historio.

La plej komplikan tempon en sia historio la soraba popolo devis travivi dum la faŝisma regado. Ĉion, kio estis soraba, la faŝistoj malpermesis. Sorabaj instruistoj kaj ekleziuloj devis forlasi sian hejman regionon. Sorabaj gazetoj ne rajtis aperi, sorabaj libroj, inter ili neregajneblaj trezoroj de la monda literaturo estis ekstermataj, la soraba presejo estis detruita, la faŝistoj uzurpis por si eĉ la propraĵon de la scienca societo „Maĉica Serbska". Multaj sorabaj antifaŝistoj estis kaptitaj kaj murditaj. La tuta popolo troviĝis en la plej granda danĝero! Ĝi estis minacita per malaperigo de sur la mondo!...

Post la frakaso de la faŝismo en la jaro 1945 ankaŭ la soraboj havis la historian ŝancon tute superigi la socian ekspluaton kaj nacian subpremon kaj atingi sur ĉiuj kampoj de la socia vivo la samrajtecon. Sovetaj kaj polaj soldatoj pro tio estis amike salutataj kiel liberigantoj. –

En la sekvonta tempo la soraba popolo prosperis. La unuan fojon en la historio de la soraba popolo ne plu ekzistis diferenco inter la germana kaj la soraba loĝantaroj. Pri tio kelkaj faktoj:

10. 5. 1945 Novfondo de la „Domowina", organizaĵo de la soraboj.
1945 Agrara reformo, germanaj kaj sorabaj kamparanoj ricevis propran grundon
6. 4. 1946 La unua instituto por la klerigo de sorabaj novinstruistoj
1947 La unua eldono de la gazeto „Nowa doba" (nova epoko) aperas post 10-jara silento
1947 Malfermo de la unua soraba supera lernejo
1948 La saksa landa parlamento akceptas la „leĝon por la defendo de la rajto de la soraba loĝantaro"
1949 Fondo de GDR estis kaj por la germana kaj por la soraba loĝantaroj la komenco de nova epoko. La nova konstitucio certigas al ĉiuj loĝantoj la plenan egalrajtecon. Ĉiu diskriminacio de la soraba popolo estas de nun malpermesata.
1950 Forte impresa delegacio de la Domowina vizitis la unuan prezidanton de GDR, Wilhelm Pieck.
1951 Ricevis ŝtatan premion por siaj meritoj la sorabaj verkisto Jurij Brezan, pentristo Merĉin Nowak-Njechornski kaj komponisto Jurij Winar.
1952 estis fondita la ŝtata ensemblo por soraba popolkulturo.
1956 Transdono de la nova soraba domo en Bautzen al la loĝantaro. La ŝtato forte finance subtenis la konstruadon.

En la iama malriĉa kaj malvarmeta erikejo de Luzacio estiĝis sub la regado de la partio de la laboristklaso grandaj industriaj kompleksoj, ekzemple
1955/59 Gaskombinato „Nigra Pumpilo" (Schwarze Pumpe)
1957 elektroenergion produktanta uzino Lübbenau
1959 elektroenergion produktanta uzino Vetschau kaj ankaŭ la malfermo respektive plivastigo de la brunkarbaj subĉielaj minejoj en Bluno, Burghammer, Klettwitz kaj Greifhain
1956 100a reveno de la naskiĝtago de la granda soraba poeto Jakub Bart-Ĉiŝinski
1958 fondo de la popolproprieta soraba eldonejo de la Domowina. Tie ĉi oni presas sorabajn librojn kaj gazetojn.
1968 ekestiĝo de la granda elektroenergion produktanta uzino Boxberg

Ankaŭ en la agrikulturo okazis granda ŝanĝo. Hodiaŭ germanaj kaj sorabaj kamparanoj laboras komune per la plej modernaj maŝinoj en grandaj agrikulturaj kooperativoj.

En la malnovaj tempoj tre ofte grandegaj inundoj kaŭzis multajn damaĝojn. Hodiaŭ vasta reto de la akvodeponejoj reguligas la riverojn. Ankaŭ sur tiu ekonomia branĉo la ŝtato tre helpis al la soraba popolo venki la mizeron.

Ekde la jaro 1966 ĉiujn kvar jarojn okazas ĝenerala festivalo de la soraba kulturo, krome multaj subdistriktaj festivaloj. Ili estas ĉiam veraj kulminoj en la vivo de la loĝantaro.

Ĉiujn kvar jarojn ankaŭ la Domowina aranĝas grandajn kongresojn por interkonsili pri sia laboro. La ŝtato forte subtenas tiun strebadon. La registaro de GDR ĉiam denove certigas, ke ĝi ĉion faras kaj faros por garantii liberan kaj egalrajtecan evoluon de la soraba popolo. Ĝi plenumas per tio gravan taskon en la senco de la marksisma-leninisma politiko pri naciaj minoritatoj kaj montras sin tiel kiel ŝtato de la humaneco.

Peter Liebig

La soraboj, slava nacia minoritato en GDR estas egalrajtaj. Foto: Zentralbild



7-a de oktobro 1949—7-a de oktobro 1979

Tri jardekoj de Germana Demokratia Respubliko

La 7-an de oktobro 1949 estis fondita la Germana Demokratia Respubliko. Per tio estiĝis unuafoje sur germana teritorio ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj, ŝtato de kontraŭfaŝismo kaj paco, de demokratio kaj de sociala progreso.
En la tri jardekoj de sia ekzisto GDR – kiu havas ĉirkaŭ 17 milionojn da loĝantoj kaj ampleksas teritorion de 108 178 kvadrataj kilometroj – evoluis al stabila, internacie respektata socialisma ŝtato.

Kio antaŭis la fondon de la socialisma germana ŝtato

Tuj post la finfina malvenko de la faŝismo, la 8-an de majo 1945, la komunistoj kaj socialdemokratoj komune kun aliaj civitanoj de kontraŭfaŝisma koncepto ekkaptis la prezentitan ŝancon en la oriento de Germanio kaj komencis profundan kontraŭfaŝisme-demokratian transformadon de la tuta vivo. La plej grava antaŭkondiĉo por tio estis la unuigo de la laborista klaso, la fondo de marksisme-leninisma partio: la 21-an/22-an de aprilo 1946 estiĝis la Socialista Unueca Partio de Germanio (SUPG). Ekde sia komenco ĝi aplikis la sciencan instruon de Marks, Engels kaj Lenin al la kondiĉoj, en kiuj ĝi laboris. En la oriento de Germanio sub la gvidado de la partio de la laborista klaso ĉiuj restaĵoj de la faŝismo estis konsekvence forigitaj kaj la fundamentoj por nova, kontraŭfaŝisme-demokratia vivo estis konstruitaj:

– Militkrimoj estis severe punitaj laŭ la decidoj de la aliancanoj en la Konvencio de Potsdam el la jaro 1945.
– La potenco de la monopolistoj kaj armadkonzernoj kiel la ĉefaj kulpuloj, respondecaj por la neniiga dua mondmilito, estis likviditaj per plebiscito. Iliaj entreprenejoj estis konfiskitaj kaj fariĝis proprieto de la popolo.
– La terposedaĵoj de la junkroj kaj grandbienuloj, kiuj ĉiam estis grava apogo de la germana militarismo, estis transdonitaj per demokrata agrarreformo en la manojn de kamparlaboristoj kaj malriĉaj etbienuloj.
– La burĝa privilegio je kleriĝo estis rompita kaj al ĉiuj infanoj el la popolo, antaŭ ĉio al gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj, ebligita la vizito de lernejoj kaj universitatoj.
– La faŝisma ŝtataparato estis disrompita kaj komenciĝis la starigo de demokrata ŝtatpotenco, servanta nur al la interesoj de la laboruloj.
– En kamaradeca kaj taktplena kunlaboro la laborista klaso kaj ĝia partio envicigis ĉiujn aliajn klasojn kaj tavolojn en la laboron por la kontraŭfaŝisme-demokratia konstruo, forĝis firman ligon kun la laborantaj kamparuloj kaj sukcesis entuziasmigi la kulturlaborantojn kaj intelektulojn por aktiva partopreno en la komuna agado.

Ŝanĝo en la historio

La fondo de GDR signis ŝanĝon en la historio de la germana popolo kaj de Eŭropo:
– Unuafoje estiĝis germana ŝtato, kiu ĉesigis ĉiun ajn agresivan politikon kaj likvidis la fundamentojn por la regado de tiuj, kiuj respondecis pri du mondmilitoj kaj pri la faŝismo;
– estiĝis ŝtato, kiu ekstermis la imperiismon kaj militarismon kaj per tio elradikigis la faŝismon, militon kaj barbaran ideologion pri rasa malamo, revenĝismo kaj ŝovinismo, ŝtato, en kiu la laboristoj kaj kamparanoj komune kun la progresema intelektularo praktikas la ŝtatan potencon;
– estiĝis ŝtato, kies tuta politiko celas al la konservado de la paco, kies eksterpolitika principo estas la agnosko de la ĝisnuna teritoria stato en Eŭropo kaj de la eŭropaj postmilitaj landlimoj, same kiel la senlaca agado por internacia malstreĉiĝo, armadlimigo kaj malarmado.

Tiu ĉi ŝanĝo en unu parto de Germanio signas la radikalan kaj finan rompon kun ĉio reakcia en la germana historio. Tiu ĉi ŝanĝo prezentas la kulminon de longa batalo de la plej bonaj fortoj de la germana popolo por nova, humanisma, progresema ŝtato.

Socialisma konstruado por la bono de la popolo

Konstruante la socialismon, GDR kontinue kreskigis siajn politikajn kaj ekonomiajn potencojn, kaj hodiaŭ, 30 jarojn post sia fondo, ĝi okupas dank'al tio lokon inter la dek gvidaj industriaj nacioj kaj estas ŝatata komercpartnero sur ĉiuj mondmerkatoj. Ĝi havas diplomatiajn rilatojn kun 125 landoj kaj agas en la kolektivo de socialismaj ŝtatoj kun plena firmeco por daŭra sekurigo de la paco, por ĉesigo de vetarmado kaj por malarmado kiel plej urĝa tasko en la internacia politiko. GDR staras solidare ĉe la flanko de popoloj en la batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo, kontraŭ apartigismo kaj rasa diskriminado.
En la socialisma industrio de GDR, en kiu ne ekzistas ekspluatado de homoj, oni produktas en 1979 dum unununura monato tiom, kiom dum la tuta jaro 1949. La naciaj enspezoj dum 30 jaroj preskaŭ okobliĝis.
Pri la kreskanta investforto de ĝia nacia ekonomio atestas la fakto, ke GDR en la jaro 1979 investis tiom, kiom entute en la jaroj 1949–1956 kune.
En la agrikulturo de GDR, komence de la 50-aj jaroj, la kamparanoj komencis kuniĝi en agrikulturaj kooperativoj. La socialismaj produktadrilatoj venkis en 1960 – kiel jam pli frue en la industrio – ankaŭ en la vilaĝoj. En ne tute 20 jaroj la kamparanoj, kiuj iam produktadis sur malgrandaj parceloj kaj en familia entrepreno, fariĝis nova klaso: la klaso de agrikulturaj kooperativanoj. Ili lernis gvidi laŭ socialisma kolektiva maniero grandajn ekonomiajn unuojn de pluraj miloj da hektaroj aplikante paŝo post paŝo industriajn metodojn en la kamparmastrumado kaj brutbredado. Sur tiu ĉi bazo oni atingis tian produktivecon de la agrikulturo, kiu ebligas, hodiaŭ plej vaste provizi la civitanojn de GDR per viando, ovoj, terpomoj kaj sukero de la propra produktado. Dum en la jaro 1950 unu kamparano en GDR produktis agrikulturaĵojn por kvin ĝis ses personoj, hodiaŭ dank' al la kooperativa kamparmastrumado kaj bestbredado kaj apliko de laŭindustriaj labormetodoj, tio estas 32 personoj. Ankaŭ la sekvantaj faktoj parolas per si mem: La nombro de laboruloj en la agrikulturo kun finita profesia kvalifiko plialtiĝis de 18,1 % en la jaro 1963 al 83,8 % en la jaro 1977. Ankaŭ la agrikultura produktado konsiderinde kreskis.

Lando de la realigitaj homaj rajtoj

La vivo de la homoj en GDR estas signita de sociala sekureco kaj certeco pri la estonteco. Realigitaj estas tiaj fundamentaj homaj rajtoj kiel la rajto je laboro kaj je kleriĝo, la rajtoj de la juna generacio je solida instruado, sencoplena laboro kaj libertempo, samrajteco de la virino, la rajto je partopreno en ŝtataj aferoj, la rajto je senpaga sanprotektado kaj multaj aliaj.

Senlaboreco, ankaŭ junulara senlaboreco, en la socialisma GDR neniam ekzistis.

– La deviga vizito de la dekklasa lernejo garantias al la gelernantoj klerigadon kaj edukadon laŭ hodiaŭa nivelo de la scienco.

– Al ĉiuj lernejfinontoj oni ebligas ellerni profesion.

– En la sfero de sanprotektado estas senpagaj la kuracistaj konsultadoj, kuracado en hospitaloj kaj medikamentoj. Iam timigaj popolaj malsanoj kiel tuberkulozo estas ekstermitaj. Morbilo, kokluŝo kaj difterito povis esti plene limigitaj per vakcinadoj. La mortokvotoj de suĉinfanoj malpliiĝis en la lastaj 20 jaroj de 59 al proksimume 13,1 je 1 000 naskiĝoj.

Unueco de ekonomia kaj sociala politiko

Kune kun la kreskanta ekonomia produktadforto de GDR ĉiam plialtiĝis la materia kaj kultura vivnivelo de la tuta popolo. Se ekzemple la meza monata salajro de laboristo aŭ oficisto estis en la jaro 1949 ĉirkaŭ 290 markoj, en la jaro 1978 tio jam estis 956 markoj. Ne malpli grava estas jeno: Dum preskaŭ du jardekoj restis senŝanĝaj la prezoj por varoj de baza ĉiutaga bezono, por trafikaj tarifoj, lupagoj kaj servolaboroj. La plej sukcesa etapo en la socia evoluo de GDR fariĝis la 70-aj jaroj. Karakteriza por tiu ĉi periodo estas la strikta plenumado de ekonomia kaj sociala politiko kiel firma unueco kun la celo, fari ĉion por la bono de la laborista klaso kaj de la aliaj laboruloj.

Tiu ĉi vojo gvidis al kontinua kaj dinamika plialtigo de la produktado en la tuta popola ekonomio, kiu samtempe ebligis pluan plialtigon de la vivnivelo per ampleksaj social-politikaj paŝoj en la intereso de ĉiuj laboruloj:

– ekrealigo de ĝis nun en la historio de GDR plej ampleksa programo pri novkonstruado kaj modernigado de loĝejoj, per kiu oni solvos ĝis 1990 la loĝejan problemon en GDR;

– plua stabileco de prezoj por varoj de baza ĉiutaga bezono, lupagoj, servolaboroj kaj tarifoj en la trafiko;

– ampleksa subteno al laborantaj virinoj kaj patrinoj, al infanriĉaj familioj kaj al junaj geedzecoj;

– plua evoluigo de la sanprotekta kaj sociala aferaro, de la popolklerigado, de la kulturo, de la eblecoj por libertempo, ripozo kaj sporto, inkluzive de plua plilongigo de libertempo por ĉiuj laboruloj je almenaŭ tri tagoj ekde la 1-a de januaro 1979.

Ŝtato de la paco kaj de kontraŭimperiisma solidareco

Jam de 30 jaroj GDR agas per sia plena forto por la sekurigo de la paco. Komune kun la Sovetunio kaj la aliaj socialismaj ŝtatoj ĝi pledas por plua realigo de la politiko de paca kunekzistado, por finigo de la vetarmado kaj por efektivaj paŝoj al armadlimigo kaj malarmado. GDR estas ankaŭ estonte preta, en kunlaboro kun aliaj pacamaj ŝtatoj, kun ĉiuj progresemaj kaj demokrataj fortoj kiel ankaŭ kun la vastaj popolamasoj doni novajn impulsojn al la realigo de la Fina Akto de Helsinki kiel unueca tuto.

De post la konferenco pri sekureco en Helsinki GDR faris ĉirkaŭ 90 kontraktojn kaj interkonsentojn kun nesocialismaj partoprenintaj ŝtatoj kaj prezentis multnombrajn proponojn pri starigo de reciproke utilaj rilatoj.

Se la fondo de la unua pacama germana ŝtato en la jaro 1949 signifis ŝanĝon en la historio de Eŭropo, oni povas 30 jarojn pli poste konstati: La ekstera politiko de GDR kontribuas merite al la granda ŝanĝo, kondukanta de la malvarma milito al internacia malstreĉiĝo. Situanta en la koro de Eŭropo, ĉe la limo inter du kontraŭaj sociaj sistemoj, ĉe la tuŝlinio inter la du plej potencaj militaristaj grupiĝoj de nia tempo la socialisma GDR montriĝas kiel ŝtato de paco.

GDR staras solidare ĉe la flanko de ĉiuj fortoj en la mondo, kiuj batalas por libereco, demokratio kaj sociala progreso.

Tr. D. Berndt

POR LA INTERNACIA JARO DE LA INFANO 1979

J. DAŜDONDAG, MONGOLIO

La kvin koloroj

– Ŝafido
Ŝafido
kiel vi
estiĝis tute blanka?
– Sendube mi estiĝis tiel blanka,
Ĉar mi naskiĝis fine de l'neĝo
– Kaprido
Kaprido
kiel vi
Estiĝis tute blua?
– Sendube mi estiĝis tiel blua,
Ĉar mi naskiĝis klaratage.
– Bovido
Bovido
kiel vi
Estiĝis tute ruĝa?
– Sendube mi estiĝis tiel ruĝa
Ĉar mi naskiĝis en la sunleviĝo.
– Ĉevalido
Ĉevalido
kiel vi
Estiĝis tute nigra?
– Sendube mi estiĝis tiel nigra,
Ĉar mi naskiĝis en la nokto.
– Kamelido
Kamelido
kiel vi
Estiĝis tute oranĝa?
– Sendube mi estiĝis tiel oranĝa,
Ĉar mi naskiĝis en la Gobi-dezerto.

Tradukis el la Mongola Lingvo Ts. Bold

Tempo – vi kuri volas

Tempo, vi kuri volas
kiel ĉiam vi kuris.
Akvoleva rado, rotacianta
kaj supreniganta sitelon post sitelo,
verŝante akvon en fosaĵojn.
Verdiĝas la tigo.
Akvoleva rado, rotacianta,
verŝante sangon en la vejnojn.

El ĝi knabino estiĝas.
Kun okuloj – miela mar',
kun lipoj – florfreŝaj,
kun abunda nigra harar'.
Kun manoj lavantaj ĉemizojn,
korvundojn kaj multnombran alian.

Akvoleva rado,
verŝante sangon en la vejnojn.
El ĝi knabo estiĝas.
Rekta kaj kuraĝa.
Lia kapo martelo estas
bestojn ne timas li.
Ne montoj nek terskuoj lin haltigas.
Malamikoj ne neniigas lin.

Akvoleva rado.
Popolo el ĝi estiĝas,
fariĝas granda
kaj al la temp' ĝian kuron ordonas

El verko de la egipta poeto Sala Ŝaĥin. Esperantigis H. Rothe, Karl-Marx-Stadt laŭ germana formo de Horst Teweleit.

Hermann Klenner

Homaj rajtoj

Ni publikigas parton el la studo de prof. d-ro Hermann Klenner pri aktuala temo ofte pritraktita. Certe la studo ĵetas interesan lumon al la problemo el vidpunkto grava por internacie agantaj homoj.

Abstraktoj rajtoj?

Ĉu estas jure permesite, ke iu ŝtato komencas dependigi la plenumon de sia malarmada devoligo aŭ la daŭrigon de la malstreĉiga politiko de tio, ĉu alia ŝtato adaptas sian komprenon pri homaj rajtoj al la propra?

Ĉu en la reciproka rilato de la ŝtatoj la homaj rajtoj estas instrumento de intervenado aŭ de kunlaborado? Apartenas al la groteskaj fenomenoj de la nuntempo kaj estas klarigeble nur el la ekspansiema karaktero de la imperiismo, ke la fakte kapitalistaj klasrajtoj, nomitaj „homaj rajtoj", estas krome prezentitaj kiel sisteme neŭtralaj, senspacaj kaj sentempaj eternaj rajtoj de internacijura deveno. La argumentadan modelon por tio oni cetere liveris ankaŭ jam dum la malvarma milito. Laŭ tio ĉiu homo, sendepende de la socio, en kiu li vivas, kaj de la ŝtato, kies civitano li estas, havas fundamentajn liberecajn rajtojn, disponigitajn aŭ ĉiuokaze agnoskitajn de la internacia juro, kontraŭ kies ofendo same iu ajn kiel ankaŭ UN rajtas interveni.[1])

Estas la interesoj de la imperiismo celanta mondregadon, kiuj staras malantaŭ la eltrovo de rajto je „humanisma" interveno[2]) apartena al ĉiu ŝtato, aŭ malantaŭ la alifunkciigo de la homaj rajtoj al „transnacia" formaĵo trarompanta la limlinion inter nacia kaj internacia juro kaj taŭga por finfine esti misuzata kiel „jura garantio de la okcidenta, libereca-demokratia ordo" sub eksplicita ekskludo de ĉiu socialisma komunumo.[3]) Se nome la burĝaj ŝtatoj havus la liberecon uzi sian evidente kapitalisman interpretadon de homaj rajtoj kaj de socio, en kiu ĉiuj liberecaj rajtoj de la homo „povas esti plene realigataj" (tiel artikolo 28 de la Deklaracio pri homaj rajtoj, nun aĝanta 30 jarojn), kiel argumentadon por konforme al la internacia juro enmiksiĝi en la aferojn de la socialismaj ŝtatoj, kiel laŭleĝan pretekston por agreso, tiam la internacia juro ververe estus farinta ege malavantaĝan servon al la afero de la paco. La marksisma-leninisma scienco pri internacia juro, tamen, rifuzis tiujn imputojn baziĝantajn sur imperiismaj interesoj aŭ ĉiuokaze subtenantajn ilin. Samtempe ĝi ellaboris koncepton pri homaj rajtoj konforman al la internacia juro de la nuntempo.[4]) Kontraŭe al la kosmopolite garnitaj planoj pri mondregado la internacia juro ne konas supernaciajn homajn rajtojn de la Unuiĝintaj Nacioj, same kiel ties organoj ne formas superŝtaton. Same kiel estus utopie vidi en UN organon de la mondrevolucio (kaj en la internacia juro ĝian norman instrumenton), same absurda estas ankaŭ la ideo interpreti UN kiel organon de la kontraŭrevolucio (eĉ se iuj farus ĝin tia, se ili povus, kion ili volas). La Unuiĝintaj Nacioj estas establo de la interŝtata kunlaborado de ŝtatoj de malsamaj socia ordo kaj evolua ŝtupo. La ĝenerale (t.e. inter kapitalismaj same kiel inter socialismaj ŝtatoj) agnoskitaj reguloj de la internacia juro, la reguloj pri konduto devigaj por ĉiu el la proksimume 150 ŝtatoj de ĉi tiu tero, celas

- la konservadon de la mondpaco kaj de la internacia sekureco,
- amikecajn rilatojn de samrajtaj ŝtatoj, baziĝantajn sur la rajto pri memdetermino kaj
- la internacian kunlaboradon en la solvo de ekonomiaj, kulturaj kaj humanismaj problemoj.

Tio rezultas sendube el artikolo 1 de la ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj de 1945 kaj el deklaracio pri la principoj de la internacia juro akceptita de la plenkunsido de la Unuiĝintaj Nacioj 1970.[5]) Tiuj fundamentaj enhavaj normoj estis finfine atingitaj kiel rezulto de jardekojn daŭrinta luktado de Sovetunio por la sukcesigo de la Lenin-a politiko pri la paca kunekzistado je la fino de la plej viktimriĉa milito en la historio de la homaro. Pro tio neniu rajtas disponi pri ili. La ĝenerale agnoskitaj reguloj de la internacia juro konkretigantaj tiujn principojn estis agnoskitaj de la socialismaj landoj en iliaj konstitucioj (USSR: art. 29; GDR: art. 8 kaj 91) kiel valida juro. Kontraŭe al kelka demagogia imputo kaj al ne malmultaj naivaj supozoj notu bone, ke katalogo da elformulitaj homaj rajtoj **ne** apartenas al tiuj ĝenerale agnoskitaj reguloj de la internacia juro. Tio ja ne devus mirigi. Ĉar la internacia juro, kiel ĉiu juro, ne povas esti pli alta ol la materiaj sociaj cirkonstancoj, en la kazo de la internacia juro ankaŭ ol la grado de matureco en la internacia evoluo kaj en la klasdisputoj tion permesas. Same kiel la en ŝtata juro ankaŭ la interŝtata juro ne ŝvebas ekstere aŭ supre de la socia evoluo. Kiel kondutreguliga instrumento ĝi estas esprimo de la volo de regantaj klasoj, do, ĝia enhavo laste rezultas el ties materiaj vivkondiĉoj.

En la epoko de la mondvasta transiro de la kapitalismo al la socialismo, en kiu, kiel Lenin tion esprimis, la du proprietaj sistemoj provizore kunekzistas samrajte[6]), tute evidente ekzistas ne interakordigeblaj, do kontraŭaj sociaj kaj pro tio ankaŭ respektivaj juraj ordoj: la b u r ĝ a jurordo, kies angula kolono ĝuste estas la privata proprieto je la produktiloj, kiu, do, konservas la potenco-kaj-senpotenco-strukturon de la kapitalisma socio, kaj la s o c i a l i s m a ŝtat- kaj jurordo, kies angula kolono estas la socia proprieto je la pruduktiloj, kiu, do, reguligas la procezon de sociigo, de ĉiuflanka demokratiigo. Nerezignebla elemento de tiu socialisma jurordo estas la fundamentaj rajtoj de la unuopulo, lia rajto je memdetermino, kiuj estas formitaj kiel esprimo de la memdetermina rajto de la popolo. Tiuj ĉi reale humanismaj rajtoj de la homo en la socialismo distingiĝas fundamente disde la vorte humanismaj rajtoj de la homo en la kapitalismo, de juro liberecкuliso de ekonomie devigaj cirkonstancoj, kiuj havigas absolutajn barojn al la ĉiuflanka evoluo de homoj, senkonsidere al la fakto, ke tiuj burĝaj fundamentaj rajtoj entenas la plej progreseman parton de la burĝa jurordo, pri kies sukcesigo estas kondukata akra batalo inter demokratoj kaj aŭtoritatuloj.

Katalogo de kodigitaj homaj rajtoj, konstruita transe de ĉi tiu kontraŭeco de la klasaj kaj homaj rajtoj, povus esti nur supertempa kaj supertera skalo, do normigita iluzio.

La koncepto de UN pri homaj rajtoj

Kvankam ne ekzistas ĝenerale deviga katalogo de homaj rajtoj en la internacia juro (al kiu ĉiu ŝtato kaj ĉiu interŝtata organizo, kiel ekzemple la Unuiĝintaj Nacioj, estus ligita, kiu, do, estus forprenita de kontrakta aliformado), tamen la homrajtaj problemoj estas kampo, sur kiu la ŝtatoj estas ne nur rajtigitaj, sed ankaŭ devoligitaj al internacia kunlaborado. En la plej grava nuntempa fonto de la internacia juro, en la ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj (art. 1 kaj 55) la homaj rajtoj estas nomitaj inter la problemgrupoj, al kiu etendiĝu la internacia kunlaboro de la ŝtatoj. La plenkunsido estas alvokata instigi studojn kaj doni rekomendojn sur tiu kampo (art. 13), la ekonomia kaj sociala konsilio estas rajtigita, ankaŭ doni respektivajn rekomendojn (art. 62) kaj establi specialan komisionon pri homaj rajtoj (art. 68). Fine la

kaj internacia juro

membroj (t.e. hodiaŭ preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la tero) sin devoligas entrepreni la paŝojn necesajn por tio (art. 56).

Laŭ tio en la pasintaj tridek jaroj kaj rezulte de la internacia klasbatalo la plenkunsido povis akceptigi, parte kontraŭ la longdaŭra rezisto de la imperiismaj landoj, tutan vicon da rezolucioj, deklaracioj kaj konvencioj. Ili respegulas en sia tuto tendence progreseman evoluprocezon kaj helpis akceli ĝin. Al tiuj dokumentoj apartenas precipe:

- la Ĝenerala Deklaracio pri Homaj Rajtoj de 1948 (morale legitimita, do jure ne deviga deklaro pri intencoj);
- la konvencio pri la malebligo kaj punado de la genocido de 1948 (valida ekde 1951; 82 membro-ŝtatoj);*)
- la konvencio de 1952 pri la politikaj rajtoj de la virinoj (valida ekde 1954; 84 membro-ŝtatoj);
- la internacia konvencio de 1965 pri la forigo de ĉiuj formoj de la rasa diskriminacio (valida ekde 1969; 97 membro-ŝtatoj);
- la internacia konvencio de 1966 pri ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj (valida ekde 1976; 46 membro-ŝtatoj);
- la internacia konvencio de 1966 pri civitanaj kaj politikaj rajtoj (valida ekde 1976; 44 membro-ŝtatoj);
- la konvencio de 1968 pri la neaplikeblo de preskriptaj dispozicioj al militkrimoj kaj al krimoj kontraŭ la humaneco; (valida ekde 1970; 21 membro-ŝtatoj);
- la internacia konvencio de 1973 pri la batalo kontraŭ kaj la punado de la Apartheid-krimo (valida ekde 1976; 38 membro-ŝtatoj).

Usono ratifikis el tiuj konvencioj ĝis nun nur la konvencion pri la politikaj rajtoj de la virinoj. FRG ĝis nun ne ratifikis la konvencion pri la neaplikeblo de preskriptaj dispozicioj al militkrimoj kaj al krimoj kontraŭ la humaneco. La kontraŭ-Apartheid-konvencio estas ĝis nun ratifikita de neniu kapitalisma ŝtato. GDR, kiel la plimulto de la socialismaj landoj, estas kontrakta partnero de ĉiuj diritaj konvencioj. La elformiĝo de la homrajta koncepto de la Unuiĝintaj Nacioj, prezentiĝanta precipe en ĉi tiuj dokumentoj, permesas kelkajn ĝeneraligojn.

U n u e : La taskoj de la Unuiĝintaj Nacioj pri la homaj rajtoj deduktiĝas el ĝia pacosekuriga funkcio. Tio estas konsekvencriĉa konstato. Sed ke ekzistas organa interrilato inter militpolitiko kaj ofendo de homaj rajtoj, estas evidente: Antaŭ ol la germanaj faŝistoj distretis la memdeterminan rajton de la popoloj en Eŭropo, ili distretis la memdeterminan rajton de la germana popolo. Aŭ, por resti en la nuntempo: Trafe la ĉijara speciala plenkunsido de la Unuiĝintaj Nacioj prijuĝis en sia deklaracio pri Namibio (ĉe nevoĉdono far ĉiuj gravaj kapitalismaj ŝtatoj!) la neleĝan okupon de Namibio fare de Sudafriko kiel minacon al la mondpaco kaj la internacia sekureco.[7])

El tiu kaŭza interrilato inter amasa ofendo al homaj rajtoj fare de ŝtato internen kaj ĝia agresa politiko eksteren rezultas la primara homrajta komisio de la Unuiĝintaj Nacioj, kies centra celado ja vere estas la konservado de la paco. En la ĉarto de UN (art. 55), en la ĝenerala deklaracio pri homaj rajtoj de 1948 (preambulo), sed ankaŭ en la Fina Akto de la Helsinki-konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo de 1975 (principo VII) la interliga konekso inter realigo de homaj rajtoj kaj konservado de la paco estas reguligita: La garantio de la homaj rajtoj per la internacia juro estas interplektita kun la devo de la ŝtatoj al paco kaj ilia agnosko de la memdetermina rajto de la popolo. Kaj tio signifas ankaŭ, ke la internacijura principo de suvereneco, la decidlibereco de la ŝtato apliki la superan suverenan potencon en la formado de siaj internaj kaj eksteraj aferoj, ne permesas nuligi la memdeterminan rajton de la propra aŭ de iu alia popolo. La memdetermina rajto de la popoloj implicas la rajton je reala demokratio internen kaj la rajton je paco eksteren. Samkiel la unuopulo povas esti libera nur tie, kie li kunregas en komuneco kun aliaj, tiel ankaŭ popolo povas esti libera nur, se ĝi ne estas subpremata de la regantaj klasoj de aliaj popoloj, kaj se ĝi mem ne subpremas aliajn popolojn.[8])

Tiusence la ĝenerale valida internacijura devoligo, sufiĉe ofte aldone kontraktita plur- kaj duflanke, al politiko de la paca kunekzistado, kiu ja litere fariĝis demando de transvivado por la loĝantaro de tiu tero, estas de e l e m e n t a h o m r a j t a s i g n i f o. Do, povas esti parolate nur pri manko de respondosento, se oni asertas, ke la homaj rajtoj estas neglektataj, se la paco estas farata dominanta substanco de politiko.[9]) Kaj la faktoj, tiel, kiel ili reale estas, surkapiĝas, se en koncerna usona senata komitato oni asertis sen kontraŭdiro, ke antaŭaj registaroj de la lando estis malhelpitaj per la malstreĉiga politiko zorgi pri la homaj rajtoj en la socialismaj landoj.[10]) Kvazaŭ tio estus ĝiaj konstitucia komisio kaj internacijura rajto. Ĉu eble Sovetunio interŝanĝu sian neskueblan politikon de kunekzistado kontraŭ politiko de konfrontado, sian konservadon de la paco kontraŭ subfosado de la paco pro tio, ĉar ĝi frontas decide kontraŭ tio, ke en Usono oni komencis ree forigi la rajtojn je pli granda samrajteco batale akiritajn precipe de la koloruloj en la sesdekaj jaroj?[11])

D u e : En la duobla katalogo de la politikaj kaj ekonomiaj rajtoj de 1966 (en ambaŭ art. 1) la memdetermina rajto de la popoloj okupas la unuan lokon. Ankoraŭ la Ĝenerala Deklaracio pri Homaj Rajtoj de 1948 eĉ ne menciis la memdeterminan rajton de la popolo. Tio akcelis tiun (falsan) interpretadon, ke la homrajta koncepto de la Unuiĝintaj Nacioj sekvas la individualisman strukturmodelon de la burĝaj konstitucioj, laŭ kiu la homaj rajtoj prezentiĝas kiel limoj de la popola suvereneco, kiel neita memdetermina rajto de la popolo.

Per tio ke nun al la memdetermina rajto de la popolo estas asignita tiu alta rango, estiĝis ankaŭ la ligo inter la ĝenerale agnoskitaj reguloj de la internacia juro kaj la homrajtaj katalogoj interkonsentitaj inter la ŝtatoj: Konforme al la UN-ĉarto (art. 1 kaj 103) la rajto de la popolo pri memdetermino apartenas al la g e n e r a l e d e v i g a j b a z a j p r i n c i p o j d e l a n u n t e m p a i n t e r n a c i a j u r o ! La tiel konstatita interkovrigo de la g e n e r a l e agnoskitaj kaj de la p l u r f l a n k e kontraktitaj normoj de la internacia juro rilate al la homaj rajtoj havas ne nur strukturan, ĝi havas antaŭ ĉio enhavan signifon: La rajto de popolo je memdetermino, t.e. ĝia per neniuj tradicio aŭ konvencio forigebla rajto decidi sen enmiksiĝo de ekstere pri sia politika, ekonomia kaj kultura evoluo (ankaŭ pri sia jura kaj homrajta sistemo!), donas al la homrajta koncepto de la Unuiĝintaj Nacioj demokratian, kontraŭkoloniisman, kontraŭrasisman kaj pacakcelantan direkton. Do, se la registaro de FRG ĝuste en sia raporto pri homaj rajtoj al la Unuiĝintaj Nacioj ne pretas akcepti la efektivigon de la memdetermina rajto de la popolo de GDR,[12]) ĝi malobeas per tio al tiu dispozicio de la internacia konvencio pri civitanaj kaj politikaj rajtoj de 1966 (art. 1), kiu samtempe estas konsistiga parto de la ĝeneralaj reguloj de la internacia juro, kiu,

*) Tiu ĉi kaj la sekvaj indikoj pri la nombro de la membro-ŝtatoj rilatas al la komenco de 1978.

do, estas ne forkondiĉebla, kaj pro tio ankaŭ laŭ la Bonn-a konstitucio (art. 25) estas konsistiga parto de la okcidentgermana jurordo. Kiel estis konstatite ankaŭ de burĝa flanko, troviĝas, de kiam du ŝtatoj ekzistas sur la iama teritorio de Germanio (kaj tion la Unuiĝintaj Nacioj agnoskis), du subjektoj kiel portantoj de la memdetermina rajto: la popolo de FRG kaj la popolo de GDR.[13])

En seminario okazigita de la Unuiĝintaj Nacioj en Dar es Salaam pri la necesaj vojoj kaj metodoj por la akcelado de la homaj rajtoj en Afriko estis trafe ĝeneraligita la sperto, ke la interparolado pri la homaj rajtoj restos tie de tute akademia naturo tiel longe, kiel la afrikaj popoloj ne povas libere decidi pri siaj politikaj aferoj, pri sia kultura evoluo kaj pri siaj naturaj riĉaĵoj.[14])

Ĉar laŭ la valida, deviga internacia juro ĉiu ajn formo de koloniisma kaj rasisma regado de minoritato prezentiĝas kiel konstanta malobeo al la rajto de la popolo je memdetermino kaj per tio al la baza normo de ĉiuj homaj rajtoj, la antaŭjara plenkunsido de la Unuiĝintaj Nacioj agis nur konsekvence, kiam ĝi konstatis (kun 112 voĉoj, sed kontraŭ la voĉoj de FRG, Francio, Grandbritio kaj Usono), ke la nacia liberiga movado en Sudafriko „havas neforpreneblan rajton daŭrigi sian batalon por la potencakiro per ĉiuj disponeblaj kaj adekvataj rimedoj de sia elekto, inkluzive la armitan batalon".[15])

La elekto kaj la – evolucia samkiel revolucia – ŝanĝo de la socia (inkluzive de la jura) ordo estas legitima afero de la popolo!

T r i e : La provoj de kapitalismaj ŝtatoj kaj teoriistoj, konstrui la homrajtan koncepton de la Unuiĝintaj Nacioj kiel internaciigitan burĝan modelon de homaj rajtoj, ekz. en la formo de kosmopolita ĉievalida koncepto, fiaskis. Jam la definitiva akcepto de la rajto de la popoloj je memdetermino en la internaciaj konvencioj de 1966 demonstris la principan aliecon de la internacijura koncepto pri homaj rajtoj kontraŭe al la burĝe jura. Tiu alia kvalito montriĝas ankaŭ en tio,

- ke la nedivideblеco de la homaj rajtoj estis akceptita, t.e. ke povis esti sukcesigita la ekkono (jam la ĝenerala homrajta deklaracio de 1948, art. 23, enhavis la rajton je laboro), laŭ kiu plena efektivigo de la politikaj rajtoj neeblas sen la ĝuo de la ekonomiaj rajtoj;
- ke nun, alie ol ankoraŭ en art. 17 de la ĝenerala homrajta deklaracio de 1948, la privata proprieto je la produktiloj ne plu estis vicigita inter la plurflanke interkonsentenda kodigo de la homaj rajtoj de 1966;
- ke – escepte de malmola kerno da rajtoj, kiel ekzemple la malpermeso torturi, sklavigi, arbitre mortigi aŭ limigi la konscienan liberecon (internacia konvencio pri la civitanaj kaj politikaj rajtoj de 1966, art. 4) – la homaj rajtoj ne estas formitaj malhistorie-absolute: ekzemple la libereco de opinio ne permesas la disvastigon de rasismaj aŭ militpropagandaj ideoj (samloke, art. 20).

Per tio estas fakte malakceptita tiu stato, en kiu la akordigebleco de homa rajto kaj kapitalisma profito estas la kerno de la afero. Ne regularo por la libera konkurenco inter la proprietulo kaj la senpropraĵulo pro la ekonomia potenco, inter la posedanto de gazeto kaj la aĉetanto de gazeto pro la ideologia potenco, inter la reganto kaj la regato pro la politika potenco, sed la kundecidado de la individuo interne de la memdetermino de la popolo – jen kion almenaŭ celas la homrajta koncepto de la Unuiĝintaj Nacioj.

Kun tiu sukceso, atingita en ĉiuflanka klasbatalo kaj diplomatie sekurigita, la kapitalismaj landoj tute ne ĉesigis siajn provojn, uzi por si la homrajtan koncepton de la Unuiĝintaj Nacioj, anstataŭ servi ĝin. Unue oni reklamaciis por si la ĝeneralan deklaracion pri homaj rajtoj de 1948 kaj limigis la homajn rajtojn al la „libera mondo".[16]) Poste oni sin lulis en la espero, ke eblas pere de la Unuiĝintaj Nacioj konverĝigi la diverĝantajn konceptojn pri homaj rajtoj sur unu ebeno, kies angulaj kolonoj ĉiuokaze estu burĝaj.[17]) Sed nun je la pinto ŝajne staras la maltrafa atendo, ke eblas unuflanke per interpretado pritondi la koncernajn plurflankajn kontraktojn pri homaj rajtoj je la kapitalisma pasinteca mezuro kaj aliflanke poste ŝajnigi tion kiel „kernon de estonta mondkonstitucio", al kiu alniveligi oni postulas de la socialismaj ŝtatoj. Malgraŭ tio, ke la elstara antaŭjara rezolucio pri homaj rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj, ja vere akceptita de la plenkunsido kun 123 voĉoj ĉe nur 15 sindetenoj, konsideras necese turni estonte la saman atenton al la ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj kiel al la politikaj rajtoj[18]), la internacia konvencio pri ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj de 1966, samranga al la internacia konvencio pri politikaj rajtoj de la sama jaro, estas reduktita de duonoficiala FRG-flanko al jure praktike nedeviga, nekontrolebla propagandprogramo[19]).

Estus sensencaĵo voli atendi, ke la homrajta koncepto de la Unuiĝintaj Nacioj eble estas socialisma. Sklaveco kaj servuto estas internacijure malpermesitaj, sed ĉe ni ankaŭ la kapitalismo (GDR-konstitucio, art. 2). Supozi, tamen, pri la homrajta programo de la laborista movado, ke eblas loki ĝin sur la saman denominatoron kun la profitmaksimumigo de privatigitaj produktilposedantoj, signifas pensi preter la sociaj realaĵoj de nia epoko.

Notoj:

1) Tiel: H. Lauterpacht, International Law and Human Rights (Internacia juro kaj homaj rajtoj), London 1950, p. 148 sekv.

2) Tiel: J. Humphrey, The international law of human rights (La internacia juro pri homaj rajtoj), en: The Present State of International Law (La aktuala stato de la internacia juro), Kluwer 1973, p. 78

3) Tiel: A. Khol, Zwischen Staat und Weltstaat (Inter ŝtato kaj mondŝtato), Vieno 1969, p. 381

4) Komp. Bernhard Graefrath, Die Vereinten Nationen und die Menschenrechte (La Unuiĝintaj Nacioj kaj la homaj rajtoj), VEB Deutscher Zentralverlag (Germana Centra Eldonejo), Berlin, 1956, p. 21 sekv.; A. P. Movĉan, La internacia protekto de la homaj rajtoj, Moskvo 1958 (ruse); H. Bokor, Human Rights and International Law (Homaj rajtoj kaj internacia juro), en: Socialist Concept of Human Rights (Socialisma koncepto de la homaj rajtoj), Budapest 1966, p. 267; M. Srnská, The International Protection of Human Rights (La internacia protekto de la homaj rajtoj), en: Law and the Developing Countries (Juro kaj la evoluantaj landoj), Prag 1973, p. 1–57; V. A. Kartaŝkin, La internacia protekto de la homaj rajtoj, Moskvo 1976, p. 193 (ruse)

5) Ambaŭ dokumentoj estas presitaj en: Die Entstehung der UN (La estiĝo de UN), Staatsverlag der DDR (Ŝtata Eldonejo de GDR), Berlin 1974, p. 199 sekv. kaj p. 336 sekv.; komp. P. A. Steiniger, Oktoberrevolution und Völkerrecht (Oktobra revolucio kaj internacia juro), Staatsverlag der DDR, Berlin, 1967, p. 43 sekv.

6) Komp. V. I. Lenin, Entwurf einer Entschließung des Gesamtrussischen Zentralexekutivkomitees zum Bericht der Delegation auf der Genuakonferenz (Projekto de decido de la tutrusa centra plenumkomitato pri la raporto de la delegitaro en la konferenco de Ĝenovo), verkaro, vol. 33, Dietz Verlag (Eldonejo Dietz), Berlin 1962, p. 343

7) UN-dok: A/RES/S. 9/2 de la 4-a de majo 1978, tiel akceptita de la plenkunsido kun 119 voĉoj, ĉe 21 sindetenoj

8) Komp. Friedrich Engels, Flüchtlingsliteratur (Fuĝintula literaturo), Marx/Engels, verkaro, vol. 18, Dietz Verlag, Berlin 1962, p. 527; V. I. Lenin, Über das Selbstbestimmungsrecht der Nationen (Pri la memdetermina rajto de la nacioj), verkaro, vol. 20, Dietz Verlag, Berlin 1961, p. 415

9) M. Kriele, Die Menschenrechte zwischen Ost und West (La homaj rajtoj inter oriento kaj okcidento), Kolonjo 1977, p. 57

10) Human Rights – Hearings before the Subcommittee on Foreign Assistance of the Committee on Foreign Relations, United State Senate, 4. März 1977 (Homaj rajtoj – Aŭskultadoj antaŭ la subkomitato pri eksterlanda asistado de la komitato pri eksterlandaj rilatoj, Usona senato, 4-a de marto 1977), Vaŝingtono 1977, p. 7

11) N. Glazer, en: E. Kamenka/A. Tay (ed), Human rights (Homaj rajtoj), London 1978, p. 87 sekv.

12) En: UN-Dok: CCPR/C/1Add 18 de la 30-a de novembro 1977, germane en: Der Schutz der Menschenrechte in der Bundesrepublik (La protekto de la homaj rajtoj en la Federacia Respubliko), Wuppertal 1978, p. 7

13) Tiel (ĉe cetere tute devianta opinio): F. Ermacora, Die Selbstbestimmungsidee (La ideo pri memdetermino) Vieno 1974, p. 50

El letero de esperantisto el Portoriko

Karaj samideanoj, ĉi-tiel mi volas esprimi mian personan elkoran saluton al ĉiuj gesamideanoj kiuj estas skribintaj al mi pro anonceto verŝajne aperigita en „der esperantist".
Bedaŭrinde mi ne povas respondi al ĉiuj kiuj interesiĝas pri mia hejmlando. Tamen, mi ŝategus sciigi ĉiujn – skribintoj kaj neskribintoj – pri kelkaj faktoj rilate al Portoriko.
Portoriko signifas kolonian situacion ekde 1898 kaj hodiaŭ, projekton de plena aneksado al Usono per kondiĉoj de senpera kaj/aŭ (laŭbezone) nerekta subpremo, je kiuj Usonaj registaraj instancoj estas submetintaj la ĉefgenton de tiu-ĉi antilia lando dum sepdeknaŭ jaroj.
Ekzemple, Esperanto estas antaŭlongege konata koncepto en Portoriko. Jam dum la jaro 1904 oni eldonis ĉi-tie libron de originale verkita poezio Esperantlingve (**La Dua Kreanto** de Luis Negrón Sanjurjo en la urbo Ponce). Sed nuntempe la Esperanto-movado ja estas praktike neekzistantaĵo, pro tio ke Esperanto tute ne priservas la interesojn de la korporaciaj fortoj, kiuj superregas la hodiaŭan ekonomian strukturon de Portoriko. Do oni trovas multajn antaŭjuĝojn ĉi-tie pri Esperanto: „Kial lerni Esperanton...? La nura internacia lingvo ja estas la angla..." „Esperanto? Ne ridigu min... ĝi nur estas lingvaĉo de komunistoj kaj frenezuloj kiuj ne volas akcepti la universalecon de la angla..." Tiaj antaŭjuĝoj nur estas kelkaj el la repertuaro kiu amase karakterizas la kolonian mensostrukturon de la portorikanoj dank' al la efektiva kontrolo de ĉiuj komunikadrimedoj en la klasika kolonio de Ameriko nome „Puerto Rico, U.S.A.", oficiale nomita anglalingve „the Commonwealth of Puerto Rico", sed hispanlingve ĝia oficiala nomo estas nenio malpli ol „Estado Libre Asociado de Puerto Rico". „Commonwealth" signifas komunumon kaj „Estado Libre Asociado", asociiĝintan liberan ŝtaton; sed tio tute ne estas la okazo de Portoriko ekde 1898.
Portoriko signifas sepdeknaŭ jarojn de politika kaj ekonomia koloniismo, kiujn tiu hispane parolanta hejmlando estas suferinta sub la superregado de la usona imperiismo.

Hugue Rodríguez Ramírez
Portoriko

Recenzo

V. Varankin, Metropoliteno,

Originala romano, 2a eldono, eld. T. Keleth (TK), Kopenhago 1977, 252 p.

La Eldonejo TK jam eldonis kelkajn tre gravajn verkojn kaj akiris profilon ne nur pro la zorga elekto de publikigindaj manuskriptoj sed ankaŭ pro la perfekta teknika prezento (kiu kompreneble rezultigas altajn prezojn).
Surprizo por mi estis la lastatempa reaperigo de la fama kaj tamen apenaŭ konata originala romano „Metropoliteno" de Vladimir Varankin (1902–1937). Varankin estis docento por okcidenteŭropa historio kaj direktoro de la Moskva Pedagogia Instituto por fremdaj lingvoj. Ekde 1921 li estis seninterrompe membro de la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio. Varankin verkis multajn studojn pri Esperanto kaj ĝia movado, i.a. „Teorio de Esperanto" (Moskvo 1929, 70 p.) En 1933 aperis lia originala romano „Metropoliteno" ĉe EKRELO en Amsterdam (komence de 1934 pro la faŝisma potencpreno en Germanio EKRELO iris de Leipzig al Amsterdam).
Laŭ William Auld tiu romano „apartenas al la malmultaj vere elstaraj romanoj, originale verkitaj en Esperanto". Auld pravas. La romano traktas tre vivoproksime interesan temon: La juna soveta inĝeniero Vitalij Zorin, laboranta en Moskva oficejo, ricevas la taskon studi la konstruadon de la germana metroo (metropoliteno) en Berlin, por poste povi konsili al la Moskvaj instancoj pri konstruado de metroo en la soveta ĉefurbo.
La leganto sekvas la historion en du interkruciĝantaj agosferoj: Vitalij restante en Berlin skribas romanon reflektante en ĝi samtempe la vivon en Moskvo kaj la spertojn en Berlin. Tiel la leganto multon ekscias pri la nefacila unua jardeko de soveta potenco, dum kiu ankoraŭ ekzistis korupcio, etburĝeco, materia mizero, ĉiuj hereditaj el la cara tempo. Sed samtempe Varankin montras la pli kaj pli oftajn venkojn super tiuj restaĵoj kaj pentras optimisman perspektivon, inter alie per la senpartiulo Zorin kaj la patriano Ivagin.
Tiu ebeno de la romano estas tre valora, ĉar ĝi estas realisma. (Multaj maldekstruloj, inter ili cetere Lanti, ne komprenis, ke la soveta ŝtato dum dek jaroj ne povis forigi malriĉecon, almozpetantojn, materian mizeron k.t.p., ke dum tiuj dek jaroj ne eblis salti el la carisma tempo tuj en paradizajn cirkonstancojn.) Samtempe, kaj tio estas tre interesa por germano, la heroo priskribas siajn travivaĵojn en Berlin. Tiu Berlin estis politika bolejo. La klasbatalo furiozas. La laboristoj strikas, eĉ armite batalas kontraŭ la polico de Zergiebel.
Vitalij havas kontakton kun komunistoj ruĝfrontanoj, kun socialdemokratoj kaj aliaj.
Trairas la tuton amrilato al germana knabino Alice.
Interesuloj pri la historio de Sovetunio kaj de la laborista movado trovas interese pentritajn bildojn. La romano legiĝas tre facile kaj flue. La lingvo estas preskaŭ ĉiam senriproĉa. (Tamen nerusa esperantisto kaj slavisto supozeble trovus kelkfoje slavan influon, i.a. en la uzo de la adverbo kaj en la sintakso).

Detlev Blanke

14) UN-Dok: St/TAO/HR 48 de la 5-a de novembro 1973, p. 9 (§ 43)

15) UN-Dok: RES/A/32/105J de la 14-a decembro 1977, cifro 3

16) Tiel: H. Guradze, Der Stand der Menschenrechte im Völkerrecht (La stato de la homaj rajtoj en la internacia juro), Göttingen 1956, p. 1

17) Tiel: R. Sandmeier, Rund um die Universale Erklärung der Menschenrechte (Ĉirkaŭe de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj), Bern/Munkeno 1963, p. 123

18) UN-Dok: RES/A/32/130 de la 16-a de decembro 1977, germane en: Schriften und Informationen des DDR-Komitees für Menschenrechte (Skribaĵoj kaj informoj de la GDR-komitato pri homaj rajtoj), Berlin, kajero 1, 1978, S. 51

19) Ch. Tomuschat, Die Bundesrepublik Deutschland und die Menschenrechtspakte der Vereinten Nationen (La Federacia Respubliko Germanio kaj la homrajtaj paktoj de la Unuiĝintaj Nacioj), en: Vereinte Nationen (Unuiĝintaj Nacioj), vol. 26, Bonn 1978, kajero 1, p. 2

El „Einheit" 11/78, Berlin, trad. D-ro Karl Schulze

INTERVJUO KUN NUMERO „P 23407"

La intervjuon faris Janusz Sulzycki el Elblag/Pollando kaj ĝin afable disponigis por la publikigo en „Paco". Red.

Dum mia unua renkontiĝo kun s-ano Albin Makowski mi eksciis hazarde, ke li instruis Esperanton en nazia koncentrejo. Tio ŝajnis al mi tiom eksterordinara ke mi neniam antaŭe provis eĉ imagi tion. Precipe impresis min lernolibreto de Esperanto, kiun li verkis en la koncentrejo mem. Tuj mi ekpensis pri la neceso intervjui tiun ĉi homon por sciigi eble plej multajn homojn pri ankoraŭ unu epizodo el la tre malluma periodo, ne nur de nia movado, sed el la tuta historio de la homaro. La renkontiĝo estis tamen tre mallonga kaj niaj vojoj disiĝis. Kaj jen pasis 50-jara datreveno de esperantiĝo de s-ano Makowski kaj en la sama tago (la 23-an de aŭgusto 1978) li fariĝis 70-jarulo. Venis do la ĝustega momento, kiun mi ne rajtas preterlasi.

Demando (D): S-ano Makowski, jam multaj monatoj forpasis ekde kiam mi renkontis vin unuafoje. La informo, ke vi provis aktive agadi por Esperanto en hitlera koncentrejo sonis al mi preskaŭ nekredebla. Jen ĉiupaŝe minacas morto kolektanta abundegajn rikoltojn, la kaptitoj pro malsato, malsanoj kaj malvarmo aspektas kiel vivaj skeletoj kaj en tia cirkonstanco instrui Esperanton? Al tiu temo ni ankoraŭ revenos kaj nun bonvolu diri iom pri la jaroj de via junaĝo, kiam vi fariĝis esperantisto.

Respondo (R): Jes, la tempo kuregas. La 23-an de aŭgusto 1928 okaze de mia 20-jara naskiĝfesto mia bona amiko Józef Osowicki donacis al mi E-lernolibron, sur kies titolpaĝon li skribis: „Nenio bona, nobla en tiu ĉi mondo atingeblas sen longaj doloro kaj penado" (laŭ poeto Z. Krasinski)
En la tago de via naskiĝfesto donacas al vi en aŭgusto 1928

via: Jozefo



Albin Makowski, 70jara.
Foto: Alfons Kleina

Kaj la donacita al mi libreto montriĝis grava turnopunkto en mia vivo, kies grandan parton mi poste dediĉis al la Internacia Lingvo. Jam dum la gimnaziaj jaroj mi kun kelkaj amikoj organizis E-rondon, kiu funkciis memstare, ĉar tiam en nia Chojnice-urbo neniu instruisto okupiĝis pri Esperanto. Mi memoras ankoraŭ la nomojn de la amikoj el nia unua gimnazia E-rondo: J. Osowiecki, Z. Najdowski (– mortis en la Stutthof- koncentrejo en majo 1943), E. Popek (mortis: marte 1978), C. Pankiewicz, fratoj: Franciszek kaj Jan Wysocki, L. Zakrzewski (pafmortigita de hitleranoj) kaj ankaŭ mia fratino – Agnieszka Makowska. Ni fondis la rondon jam en 1926 sed tamen la daton de mia 20-a naskiĝfesto, aŭguste 1928, mi traktas kiel komencon de mia esperantiĝo, ĉar de tiam mi komencis aktive agadi.
Estas aparte interese kiel unu simpla donaco povas grave influi ies vivon, ĉu ne?

D: Nu, jes. Eble sen tiu ĉi donaco ni neniam renkontiĝus . . .

R: Poste aperadis en „Gazeta Pomorska" („Pomerania Gazeto") artikoloj pri nia agado, pri la kunvenoj, renkontiĝoj, novajoj pri la eksterlanda E-movado k.t.p. Ekde la n-ro 265 de „GP" el 17. 11. 1933 mi fariĝis respondeca redaktoro de la gazeto. Tiam de tempo al tempo sur la fronta paĝo aperadis miaj artikoloj, en kiuj mi avertis pri la proksimiĝanta milito. Nia kluba laboro bone prosperis, sed super Eŭropo ekis kolektiĝi la nigraj nuboj. La terurega tempesto komenciĝis la 1-an de septembro 1939. El tero, kiun tramarŝis la okupanto ekfontis sangriveroj. Ĉia kultura agado devis ĉesi, multaj aktivuloj estis tuj mortigataj kiel „danĝera socielemento". Ankaŭ multaj esperantistoj perdis la vivon. Alvenis granda nokto de la historio. Tamen kontraŭ la kruela sorto la homoj provis iel normaligi sian vivon. Ankaŭ mi. En 1941 mi edziĝis . . .

D: Sed longa feliĉo ne estis al vi destinita . . .

R: Bedaŭrinde. 17. 11. 1943 mi estis arestita kaj 8. 6. 1943 oni enkarcerigis min en Stutthof-koncentrejon. La nomo tie ne estis jam grava, ĉar anstataŭ ĝi ĉiu kaptito estis simple numerigita. Mi ricevis la numeron „P 23 407". Ne eblas priskribi kiel kruelan sorton kapablas prepari homo al homo. Eĉ kelkcentpaĝa libro ne enhavus la tragedion de 120 000 homoj, kiuj trairis la pordegon de la koncentrejo. Kaj Stutthof ja estis nek la plej granda nek unusola. Homo, kiu mem tion ne travivis, neniam povos plene kompreni la sorton de la kaptitoj en nazia koncentrejo.

D: Mi kredas, ke jam neniam plu la homoj devos tion sperti. Fakte, mi legis rememorajojn de la koncentrejanoj kaj


Rok XIII
Nr. 266
DZIENNIK POMORSKI
CHOJNICE, sobota dnia 18 listopada 1933 r.
Hitler rokuje z Polską
Pałac wilanowski - rezydencja P. Prezydenta Rz-plitej

La gazeto, kiun A. Makowski ĉefredaktoris
Foto: B. Krystyna Augustymak

LA ESPERANTA ANGULO

Hector Hodler.

Al nombro de meritplenaj personoj en historio de Esperanto apartenas sendube sviso Hector Hodler. Jam kiel gimnazjano li komencis studi Esperanton kaj baldau fondis gazeton en tiu chi lingvo. En 1904 j. Hodler komencis eldonadi internacian organon en Ghenevo s. t. „Esperanto", kiu baldau popularighis en tutmonda esperantistaro. En 1908 j. li fondas gravan organizajhon Universala Esperanto Asocio, konata kiel U. E. A. Kiam venis la mondmilito Hodler pere de sia organo tre multe helpis al diversaj malfelichuloj, detranchitaj de siaj patrolandoj kaj familioj. Bedaurinde la grava pulmomalsano en la jaro 1920 elshiras lin por chiam el niaj vicoj. Antau sia morto Hodler testamentis tutan sian havajhon en valoro ca 100.000 svisaj frankoj al U. E. A. Persono de Hodler vivas daure en memoro de esperantistoj, char vivas U. E. A. lia chefverko pri kiu inofrmojn ni donos sekvantfoje.


Naszych Przyjaciół i Zwolenników

Esperanto-angulo en „Pomerania gazeto"
Foto: B. Krystyna Augustymak

ĉio ĉi ŝajnis al mi kavazaŭ ia malreala infero, kiu neniam povus okazi sur nia planedo. Ja tamen la atestantoj vivas ankoraŭ, restis fotoj, filmoj, arkivaj dokumentoj. Ni devas longe tion memori kaj memorigi, por ke la historio jam neniam plu ripetiĝu tiumaniere. Mi forte kredas, ke la homoj neniam plu devos sperti tion.
Kiam vi eniris la pordegon de Stutthof, tiam troviĝis jam tie la kaptitoj de multaj nacioj, ĉu ne?

R: Ho, jes. Krom poloj estis tie ankaŭ rusoj, germanoj, ĉeĥoj, danoj, italoj, estonoj, litovoj, latvoj kaj judoj. En la loĝbarakoj kaj dum la laboro estis miksitaj diversnaciaj grupoj. Regis tie severe ankaŭ „internacia lingvo" – la germana. Ĉiujn ordonojn kaj informojn oni anoncadis germane. Ho ve al la bedaŭrindulo, kiu ne tuj ilin deĉifris. La vipo aŭ bastono forte enkapigis la „vorttrezoron".

Foto: B. Krystyna Augustymak


ESPERANTO
W DZIESIĘCIU LEKCYACH.
DOKŁADNY PODRĘCZNIK Z ĆWICZENIAMI, WZORAMI SKŁADNI I WYPISAMI Z POEZYI I PROZY.
WEDŁUG PROF. T. CARTA I J. BORELA
OPRACOWAŁ EMIL PFEFFER.
LWÓW – ZŁOCZÓW.
Nakładem i drukiem księgarni Wilhelma Zukerkandla.

D: Kaj en tia cirkonstanco vi kuraĝis entrepreni la instruadon de Esperanto?

R: Vidu, tio estis savmaniero kontraŭ psika degenero kaj bestiĝo – tiu plej danĝera koncentreja malsano. Tio estis memdefenda sinteno: disigi la pensojn el la psikrompiga ĉiutageco, forgesi pri la koncentreja tragedio, pri minacanta ĉiupaŝe morto. Okupigo de la menso per io valora, kultura aktivado instigis la kaptitojn al kunlaboro, devigis ilin akcepti aktivan teniĝon, kiu sekve plifortigis psike – do tio donis la eblecon travivi.
Por ke la bildo estu kompleta oni sciu, ke agado de nia Esperanta grupo estis nur unu el la formoj de kultura aktivado de la kaptitoj. Sentiĝis tie granda soifo al literaturo. De mano al mano cirkulis fragmentitaj poparte libroj de Mickiewicz, Conrad, Sienkiewicz, Wells, Tolstoj, Fine de 1944, kiam eĉ la koncentrejaj gardistoj konsciiĝis pri la baldaŭa malvenko de la hitlera armeo, vigliĝis ankaŭ la kultura aktivado. Okazis eĉ deklamaj vesperoj kaj komikiluziaj programoj. Precipe interesaj kaj popularaj fariĝis prelegoj de Jan Rostafiński – profesoro pri natursciencoj el Varsovio. Li multe prelegis pri siaj vojaĝoj, pri astronaŭtiko, pri vivo de L. Pasteur k.t.p.
Pastroj vespere kaj matene aranĝadis sekrete komunajn preĝojn, sanktajn mesojn (i.a. dum antaŭkristnaska nokto). Ankaŭ ili aŭskultadis preĝkonfesojn kaj disdonadis la sanktan komunion. Al multaj kaptitoj la religiaj praktikoj estis grava morala kaj psika apogiloj.

D: Sed ni revenu al via Esperanta agado, kiu precipe interesas niajn legantojn. Ĉu vi povos pli larĝe tion rakonti?

R: Aŭtune 1943 dum teraj foslaboroj mi interparolis kun d-ro L. Duszyński. La interparolo direktiĝis al la temo de fremdaj lingvoj. D-ro Duszyński flue sciis kelkajn lingvojn, i.a. la hispanan kaj li montris ekintereson kiam mi diris ke mi scias la Internacian Lingvon – Esperanto. Ni faris eksperimenton: li parolis al mi hispane kaj mi en Esperanto. La rezulto estis surpriza, ĉar la simileco de la du lingvoj estis tiel granda, ke ni parte komprenis unu la alian. Pri niaj fremdlingvaj interparoloj ekinteresiĝis pli kaj pli da kaptitoj. Tio kaŭzis, ke vintre 1943–44 mi komencis fari sekrete prelegojn pri Esperanto. Kelkdek personoj eĉ emis ĝin lerni. Tamen mi timis, ke nia agado ne tro disvastiĝu ĉar tio povus finiĝi tragedie. Ni estis ja kaptitoj en la koncentrejo, kie ĉiu kultura agado estis tute malpermesita. Printempe 1944 mi komencis kaŝe skribi E-lernolibreton de Esperanto kaj verki el memoro la gramatikon de nia lingvo. Kaj tiam komenciĝis tiuj specifaj E-lecionoj. Nia grupo de la adeptoj de la Internacia Lingvo renkontiĝadis en la barako post mizera vespermanĝo.
Ankaŭ dum la laboro ni provis mallaŭte paroli en Esperanto. Ravis nin la simpleco kaj melodieco de la Internacia Lingvo.


D: Ĉu vi memoras ankoraŭ la nomojn de viaj kolegoj, kiuj partoprenis tiujn ĉi lecionojn?

R: Multaj nomoj forflugis el mia memoro sed kelkajn amikojn mi ankoraŭ memoras: W. Rac – kuracisto, J. Dunajski – bankoficisto, M. Kalutta – instruisto, Duszyński, fratoj Porozyński. De tempo al tempo venadis al ni ankaŭ aliaj kaptitoj i.a. prof. Jugurtis – eksministro pri financoj en la registaro de Litovio kaj pastro Lipiunas, kiu konis perfekte kelkajn lingvojn.

Post la liberigo niaj vivovojoj disiris. **Eble tiu ĉi artikolo helpos ligi kontakton kun miaj amikoj el la koncentrejo?**

D: Ŝajnas, ke nur unu deziregο regis en la kapoj de la kompatindaj homoj: travivi la militon kaj eble plej frue forkuri el tiu infera loko. Kiel do klarigi, ke eĉ en tia situacio Esperanto vekis la interesiĝon?


R: Fakte, niaj paroloj en kaj pri la Internacia Lingvo, pri amikeco inter ĉiuj popoloj tute maltaŭgis al tiu mondo ĉirkaŭita per elektra pikildrato, kie oni ĉiupaŝe piedpremis homan dignon, kie morto akompanis al ni ĉiuhore kaj kie homa vivo ne pli valoris ol vivo de rato. Tamen ni sciis, ke tiu infero „artefarita" de homo ne povas longe daŭri, ke venos paca tempo, kvankam ne ĉiuj el inter ni ĝisvivos ĝin. Ni kredis, ke post fino de la milito la homoj memorante pri la tragedio konstruos novan ordon, en kiu ĉiuj kunvivos amike sendepende de raso, nacieco aŭ vivkoncepto. Tio estis pasiigaj aferoj, kiuj nin kuraĝigis kaj kredigis je la bono kuŝanta profunde en la homo. Ni interparolis pri nova vivo post la liberigo, ni kreis planojn por estonteco. Kaj pensoj pri alveno de tiu tempo dolĉigis nian amaran ĉiutagan vivon.
Kaj ĝuste ĉi tie, en la mondo plena je timo kaj rasa malamo la granda ideo de d-ro Zamenhof – pri la neceso de la reciproka estimo kaj frateco inter homoj de diversaj nacioj – plenbrilis kaj montris sian valoron kaj taŭgecon en socio multnacia. Ni intencis pere de Esperanto krei grupon de bonvolemaj homoj. Ne estis do hazardo, ke la unuaj tekstoj de la verkita far mi E-lernolibreto traktis pri homo mem, pri beleco de la mondo, el kiu oni nin forprenis, pri gento, patrujo kaj universala lingvo. Malgraŭ, ke la naciismo kaj rasa malamo atingis tie sian kulminon rezultigante nepriskribeblajn kruelaĵojn.



Pri la ĉiutaga vivo: Dudek kvin batoj. Desegnita de Kapito.

D: Eĉ en koncentrejoj ekzistis rezista movado. Kiel ĝi funkciis ĉe vi?

R: Se iu diros al vi pri organizita ribelo en koncentrejo, kolektado de armiloj, k.t.p. – metu tion inter fabelojn. Tio estis nereala. Ĉia rezistomovado estis tie en ege malfacila situacio kaj ĉiumomente minacis ĝin malkovro kun ties plej teruraj sekvoj.[1]) Tamen solidareco inter la kaptitoj estis. Se iu ricevis el hejmo pakaĵojn kun manĝaĵoj tiam parton de ĝi li tuj disdonis al la amikoj. La kaptitoj rajtis skribi leterojn al siaj familioj nur en germana lingvo, kiun ja multaj ne sciis. Tiam ni helpadis al la „kontraŭ-germanlingvaj kodiloj". Kelkaj kaptitoj havis eblecon kaŝe aŭskulti radiokomunikaĵojn el Londono aŭ Moskvo kaj baldaŭ post tio pri novaj malvenkoj de la hitlera armearo eksciis la tuta koncentrejo.



Auszug aus der Lagerordnung:


Der Lagerkommandant

Geliebtste Kläschen mit Maria und Eltern! Ich wünsche
Euch viel Glück und Gottessegen und, daß wir uns
bald gesund und glücklich wieder sehen werden. Das Paket
mit Landbrot und Wurst sowie das mit Kuchen gut
erhalten. Ihr habt mir sehr große Freude gemacht. Jetzt
schickt mir höchstens 2 Brote. Sage auch Agnes, daß sie
um mich keine Sorgen haben soll. Ich bin satt und
durch Dich, meine Liebe, vollständig versorgt. An sie
schreiben kann ich nicht, weil ich nur 2x schreiben
darf und kenne nicht ihre Adresse. Ich grüße sie.
Etwas Seifenpulver! Das Hand. u. Strümpfe sehr schön!
Maria Küss vielmals für den Weihnachtsbaum, Äpfel, Kü-
chen sehr geschmeckt. Brief am 23.XII. erhalten. Danke
für alles herzlichst. Unser Kindchen möchte ich so ger-
ne haben wie früher. Aber es kommt wieder. Bin gesund
und lebe für Euch Alle! Grüße und Küsse Dein Abi.

Germanlingva letero de A. Makowski el la koncentrejo al la familianoj. Foto: privat

D: Kiaj travivaĵoj precipe firmiĝis en via memoro?

R: En julio 1944 kelkaj altrangaj oficiroj organizis atencon je Hitler, kiu – bedaŭrinde – iuhazarde tion travivis. Cetere niaj „radiospecialistoj" sufiĉe frue disfamigis tion tra la koncentrejo. Poste oni konstruis en Stutthof novan specialan subkoncentrejon kiu estis eksterordinare gardata kaj izolita de la cetera parto de la koncentrejo. Tien oni enkarcerigis familiojn de la oficiroj, kiuj kuraĝis levi la manojn al la „ŝtatestro". Fine de la somero 1944 alvenis transportoj el la Varsovia Insurekcio.
Tamen plej drama tago por ĉiuj estis la 25-a de januaro 1945. Tiam komenciĝis perpieda evakuado de Stutthof, t.n. „marŝo de l' morto" – por multaj jam la lasta. Pli ol 25 000 kaptitojn oni dividis je ĉ. 1 200 – pesonaj kolonoj. Ĉiun kolonon akompanis armigitaj soldatoj kun speciale dresitaj hundegoj. Por la vojo ĉiu kaptito ricevis 0,5 kg da pano kaj pecon da margarino. Kaj ni komencis vadi tra la dike kovritaj per neĝo kampoj dum 15–20 grada frosto de mateno ĝis krepusko. Ni dormadis en garbejoj kaj bovostaloj.
Malsato kaj elĉerpiĝo faligadis amase la marŝantojn. Ĉiam pli kaj pli ofte pafo de la gardisto finadis ies turmenton. Nur en februaro 1945 en nia 1 100 – persona kolono 800 kaptitoj mortis pro tifo kaj malsato. Feliĉe Kaŝuboj (loka loĝantaro) donadis al ni manĝaĵon kaj vestojn.
Nokte 11. 3. 1945 soveta armeo liberigis nin, kiuj estis jam perdantaj lastan esperon.



Koncentrejo Stutthof (1941) Foto: Muzeo Stutthof

Aleksejo Zarycki

La plej bela lingvo.

Versaĵojn de Heine legadis mi kaj,
Revulo juna estante,
Mi vidis la rokon kun in' Lorelei
Ĉe Rejno-river' situanta.

Kaj kvazaŭ dum sonĝo sonoris la kant'
De la belulin' en ĉielo.
La lingvo germana al juna aŭdant'
Sonora tre ŝajnis kaj bela.

Sed kie ĝi estas, volum' de poet',
Legita kun granda plezuro?
Vundita nun mi kuŝas ĉe arbustet'
Kaj tankoj jen preterveturas.

La tankojn postsekvas en kamp' soldatar',
Pereas labor' kamparana,
Fremdlandaj vestaĵoj, sen ajna erar'
Mi aŭdas la lingvon germanan.

Mi raŭkon, koleron nun aŭdas en ĝi,
Ĝi tiel malbele sonoras,
Ke fermus prefere l'orelojn tuj mi,
Senmovas nur man' pro doloro.

Ne estis delonge ĉi-tio, amik',
Per sonĝ' rememor' ofte skuas . . .
Fenestron, malfermas fenestron jen mi,
Rigardas al mar' mi, ĝi bruas.

Situas apude germana urbet'.
Urbdomo, preĝejo malnova.
La fumo de ŝipo en mara kviet'
Kaj mevon post ĝi mi tuj trovas.

Ni gaste alvenis al tiu-ĉi land'
Pro bona amika impeto.
Ĉu volas vi kanti, mastrino?
Pri kant'
Ĉe mi estas unu nur peto –

La kanton germanan vi kantu, virin',
Nur pri Lorelei, jam konatan.
Verŝajne kunkantos laŭeble mi vin
Kun sento amika kaj frata.

La kanton malnovan komencis jen mi
Kaj ŝajne orbrilas la vortoj.
Komprenis mi: estas parol' de amik'
La lingvo plej bela kaj forta.

El la belorusa lingvo tradukis Adam Pavlukovec.


D: Plimulto de la koncentrejanoj ne ĝisvivis tiun momenton. Kaj malgraŭ la difektita sano denove vi komencis la aktivan agadon . . .

R: Hejme atendis min la edzino kun filineto. Krome mi decidis fini studadon de juro ĉe N. Kopernik – Universitato en Toruń. Nia E-rondo komencis denove funkcii kaj ekaperis artikoloj pri Esperanto en nia gazeto.
Hodiaŭ en Stutthof ekzistas ŝtata Martirologia Muzeo, kie ankaŭ mi ĉiceronis. Nur somere 1964 mi gvidis tra la muzeo pli ol 2 000 turistojn. Nun la aĝo kaj sano ne permesas al mi tiel moviĝi, do mi la tutan pasion direktas al mia ĉehejma muzeo. Ĝi estas unu el la plej riĉaj muzeoj de nia regiono, ĉiutage venas ĉi tien vizitantoj kaj de tempo al tempo aperas eĉ ĵurnalistoj. Poste mi ricevas la artikolojn el tiu aŭ alia gazeto.

D: Oktobre 1976 dum XIX-a Tutpollanda E-Kongreso vi ricevis Oran Insignon de Merita Esperantisto. Do oni alte pritraktas vian poresperantan agadon.

R: Tio estis por mi kortuŝa momento. Mi alte taksas tiun ĉi honorigan insignon por mia modesta laboro en la plej malfacila periodo de nia historio.

D: La 23-an de aŭgusto 1978 vi festis du datrevenojn: la 70-an de via naskiĝo kaj la 50-an de via poresperanta agado. Bonvolu do akcepti elkorajn bondezirojn: multe da sano kaj ĝojo pro via senĉesa aktivado.



Objektoj el Stutthof:
1. originala n-ro de A. Kakowski; P 2 3407,
2. Ligna skatoleto,
3. Esperanto-lernolibro, skribita en la koncentrejo (Stutthof 1944),
4. skribilo.

Foto: B. Krystyna Augustymak

1) Tamen la historio konas multajn faktojn pri liberigaj movadoj en koncentrejoj. Verajn faktojn ekz. priskribas la romano de Bruno Apitz „Nuda inter lupoj", kiu 1974 aperis ankaŭ en Esperanto, trad. de d-ro Karl Schulze, lingve reviziita de J. Grum. La red.

KURT DAVID, verkisto

Ankoraŭ fekundas la sino...

Pere de la sekcio pri internaciaj rilatoj de nia asocio mi estis dum la lasta tempo laŭ propra deziro plurfoje en Düsseldorf kiel observanto ĉe la Majdanek-proceso. Dek kvar iamajn SS-anojn de la komandeja stabo oni akuzas pri partopreno en la murdigo de 250 000 homoj (historiistoj parolas pri unu miliono!).
Komence mi ne havis literaturajn ambiciojn; mi veturis tien ĉar inter la akuzitoj estas ankaŭ virinoj, iamaj SS-gardistinoj. Mi simple volis vidi ilin, volis rigardi en iliajn vizaĝojn, kaj ankoraŭ hejme mi multe pensis pri tio, kiel tiuj virinoj – nun patrinoj kaj avinoj – kondutus post tridek tri jaroj. En mia alie ja ne eta fantazio multon mi imagis – sed tion ne: ke ili ankoraŭ povas ridi, ridi! – ke ili ŝajnigas kvazaŭ la proceso ne tuŝas ilin, ke ili en la juĝejo pro enuo trikas aŭ kroĉtrikas, legas gazetojn, solvas krucenigmojn, subridas, rakontas ŝercojn, senŝeligas oranĝojn kaj eĉ akceptas manpremojn de simpatiantoj el la aŭditorio aŭ promenas, brako en brako kun siaj kamaradoj, en la juĝejan kantinon, kie tamen ne pendas tiu devizo kiel en la SS-kazino de Majdanek: Ni laŭdu tion, kio hardigas!
Cetere estis tre facile por mi stari vidalvide al ili kaj rigardi en iliajn vizaĝojn. Ĉiuj estas liberaj! Ĉiuj! Mi do tramveturis kun ili, eltramiĝis kun ili en la düsseldorfa Heinrich-Heine-Aleo – kompreneble ĉiam en konvena distanco; kiu ja iras al la juĝejo kune kun amasmurdistoj, kvankam – ankaŭ tion mi diru – neniu en mia ĉirkaŭaĵo estus rimarkinta tion, ĉar tutcerte ĉimatene mi estis la sola pasanto, kiu sciis, kiu iris tie antaŭ aŭ malantaŭ li. La naskiĝdomon de Heinrich Heine ni ĉiam preterpasis, ĉar la düsseldorfa Supera Tribunalo staras en centkelkpaŝa distanco de ĝi en la Mühlen-strato. En unu el tiuj matenoj mi havis la strangan plezuron, ke unu el la SS-sinjorinoj, la supera gardistino Orlovski – ni ja jam sufiĉe ofte estis vidintaj nin en la asizejo – ĉe la pordo de la Supera Tribunalo deziris al mi „multan ĝojon". Ridetante ŝi aldonis: „Kontraŭe al vi mi ja havas la tutan cirkon ĉi tie senkoste!"
Ĉe la vestgardejo en la juĝejo ni kelkfoje staris kune en unu vico, antaŭ mi do tiu Orlovski, kiu antaŭe en kolonja gastejo ankoraŭ bedaŭris, ke tro malmultaj estis gasmortigitaj kaj plendis pri sia „tiam nur duonfarita laboro"; apud mi Rosa Süss, la akuzitino, pri kiu la akuza akto diras, ke ŝi rekaptis la infanojn, forkurintajn de la gasmortigejo. Ŝi faris tion, logante tiujn malsatajn infanojn per pano, por poste mem alporti ilin al la gasmortigejo; kaj la akuzitino Lächert, en Majdanek nomita „Sanga Brigida".
Ili ĉiuj metas siajn mantelojn, ĉapelojn aŭ ĉapojn sur la tablon de la vestgardejo, kaj por mi estas preskaŭ ne priskribebla sento, vidi pendanta mian mantelon unu aŭ du hokojn apud la iliaj.
Unu advokato kaj do defendanto, kiu tuj frapas mian atenton, portas rimenan fermilon de la Hitlera Junularo – kun hokokruco kompreneble – kaj li tre atentas porti talaron kaj ĵaketon malferma, por ke oni vidu lian pensmanieron. Nazio el plej malpura akvo li estas, kaj li ne ofendiĝas, se oni diras tion al li; novnazio en la plej pura senco de la vorto, ĉar tiu d-ro Bock havas la saman aĝon kiel nia paco en Eŭropo.
Sed alia advokato, kiu speciale kaptas mian atenton, estas malnova nazio. Lia nomo: Stolting II el Frankfurto ĉe Majno. Tiu advokato – komplico de la akuzitaj amasmurdistoj – estis specialjuĝisto jam en la okupita Pollando. La kondamnojn al morto, kiujn li verdiktis – kaj hodiaŭ denove verdiktus, kiel li asertis antaŭ jaroj – li mem partoprenis ĝis la ekzekuto, mi volas diri, ke li ĉeestis, kiam lia ekzekutisto Bordt senkapigis siajn viktimojn per hakilo. En Düsseldorf mi vidis lin kiel advokaton kun klientaro kaj – neniel minacata per profesia malpermeso. Bestoamiko li ankaŭ estas – kompreneble – kaj prezidanto de ĉiuj bestprotektaj societoj en FRG.
Nur tio jam devus sufiĉi por kompreni, ke mi ne miris, kiam en la tribunalejo junulo ŝovis de malantaŭe flugfolion super la tablon en miajn manojn. Mi nun jam sciis, kio legeblus sur ĝi: „Ili denove ekzistas, la nacisocialistoj en Federacia Respubliko" – kaj: „Ek al Berlino, la malnova regna ĉefurbo" – kaj: „Ni estas la nacisocialistoj de la nova generacio". Intertempe mi ankoraŭ ĉiam aŭskultas la nacisocialistojn de la malnova generacio. Ili ĵus akre kaj senhonte atakis la eksperton de la tribunalo, politologon, historiiston d-ro Scheffler, konsultita jam en multaj prikoncentrejaj procesoj kaj timata de akuzitoj kaj defendantoj pro nekoruptebla kompetenteco kaj precizeco. La tiel nomata malmola kerno de la tiea defendantaro, do kelkaj malnovkaj novnazioj komence malakceptas la eksperton – pro antaŭjuĝo. Unue li laŭeble pruvu, ke lia deveno estas arja, ke li ne havas „judan avinon"; fine lia doktorpatro ja estis judo. Kaj krome tio: La eksperto d-ro Scheffler cetere ja foje deklaris: „... la milito, komencita de Hitler en 1939 ...". Tio estas, laŭ novnazio d-ro Bock, nenio alia ol „propagando de aliancanaj venkintoj post 1945". Ĉi lastan la tribunalo decideme refutas, ĉar ja estas certa fakto, ke Hitler komencis la Duan Mondmiliton. Koncerne la eksperton, kiu pruvu sian arjan devenon, la disputo daŭras dum semajnoj.
Mi ankaŭ aŭdas malŝarĝigan atestanton, kaj mi ne misparolis, iaman SS-gardiston. La tribunalo demandas lin pri liaj sentoj, se junaj virinoj dum mortpafado surgenuiĝis kun siaj beboj antaŭ li kaj petegis pri la vivo de siaj infanoj. Lia respondo: „Pri tio mi ne meditis. La venontan tagon tio jam estis forgesita."
Forgesita? La aŭditorio en la asizejo pleje estas nur tre malmulte okupita. Sur la ĵurnalista benko mi sidas ofte kun nur du aŭ tri raportistoj de progresemaj gazetoj. Aliaj enrigardas nur por minutoj kaj tuj malaperas denove. Ili diras: „Kiu ankoraŭ volas legi tion?" Sed kelkfoje ankaŭ venas instruisto kun sia lerneja klaso, kaj la infanoj estas tre seriozaj, mirigitaj. Eble ili tute ne komprenas pri kio temas, se

en la juĝejo ĵus estas diskutite, ĉu estas certe, ke oni vere bruligis homojn en la krematorioj de Majdanek. Eble temis pri bestoj? Kaj: Per kio distingiĝas la odoroj por povi pruvi, kion oni bruligis tie? Tian disputon – horon post horo – aŭdas la lernantoj.
Pri tiuj lernantoj mi memoris, kiam mi dum unu el miaj düsseldorfaj juĝejaj tagoj legis traktatojn de lernantoj de 9-a klaso de diversaj naŭklasaj mezlernejoj, presitajn en la gazeto „Frankfurter Rundschau".
La temo de la traktatoj: „Kion mi aŭdis pri Hitler . . ."
Mi citas: „Adolf Hitler dum la Respubliko de Vajmar estis rigardata gvida forto . . . La tiama saluto por Hitler estis: Heil Hitler – kaj ekzistis la tiel nomata hokokruco. La infanoj tiam ne estis kiel ni nuntempe, ili devis labori kaj helpi hejme. Hitler estis severa al siaj anoj kaj ĉiuj respektis lin . . . La najbaroj deziras, ke li ankoraŭfoje revenus . . . Ankaŭ en la milito Hitler estis granda. Liaj soldatoj estis kuraĝaj kaj eĉ ridis, kiam ili marŝis en la militon.
Regina/9-a klaso"

Dieter Bossmann, diplomita pedagogo, instruisto por elementaj kaj mezlernejoj en FRG, skribas en la antaŭparolo al siaj cent tiaj kolektitaj traktatoj: „Ĉiuj lernantoj forlasos la lernejon dum la jaro 1977 – ilia nivelo de scioj do apenaŭ ŝanĝiĝos ankoraŭ –".
Post ĉiuj citaĵoj tiun de verkisto, komunisto, kiu skribis raportaĵon, „Raportaĵon sub la mortpendigilo":
Homoj, mi amis vin! Estu singardaj!

El „Neues Deutschland"

Trad.: D. Dungert

ERICH WEINERT (1946)

Jam foje estis tia komenciĝo

Apenaŭ la miljara regno[1]) forpompis,
jen ili rampis tuj el la ruin';
svastikon forjetante, ili trompis
denove homojn per mensogrutin'.

Kun plenaj pantalonoj estis pretaj,
interfratiĝi kiel bona demokrat'.
Pacemaj ili ŝajnis kaj diskretaj,
prezenti tiel sin al nova ŝtat'.

Tute subite estis nur oferoj,
tuj pretaj por aniĝ' al sanktarme',
kaj jam aperis homaj ekzempleroj,
kaj laŭte vokis la „avsolvo te"![2])

Do kiu tiom da toler' elpensis?
Tra malfermita malantaŭa pord'
alvenis ili, komenciĝis la negoc'
en politik', ekonomi', eksport'.

Sieg-Heil![3]) Pasinta la unua ŝoko!
Je amnestio oni trinkas dum banked',
kompensas la ektimon nur per moko
kaj trovas truojn eĉ en leĝa ret'.

Jam tra la maŝoj iris tiu bando.
Nelonge, preta estas pafoklub'.
Anstataŭ la purigo de la lando
lavata estas la nazia rub'.

Impertinente ili sin federis,
bedaŭris plej profunde ja en preĝ',
ke tro malmultaj en KZ[4]) suferis
kaj volas sturmi Moskvon al sieĝ'.

Denove ili rajtas provi frapojn
– ankoraŭ kaŝe, tute sen kontrol' –
kaj lernas celi malagrablajn kapojn,
pretaj al uzo kontraŭ la popol'.

Murdintoj ricevas liberecon,
serĉitaj longe, ekde jar' kaj tag'.
Refoje oni ŝatas tiun specon,
sed punas forkuradon de la flag'.

En ombro de la homa forgesemo,
en sia hieraŭa idiom'
skribaĉas ili, plena de blasfemo
kaj kalumnio de l'honesta hom'.

Antaŭ katedroj ili rajtas sidi,
ne estas forpelataj per baston';
eĉ ili rajtas pompe ja rezidi,
kaj devus laboregi sen pardon'.

Ĉu do por tio niaj bravaj koroj
batalis, sangis plena de aflikt',
ke tiuj brunaj[5]) nazigesinjoroj
bonfartas nun, eĉ helpe de edikt'?

Jam foje estis tia komenciĝo!
Kaj kiel ĉesis, bone konas vi.
Estimo estos nur kun la kondiĉo,
ke vi forigos ilin el soci'!

1) La germanaj faŝistoj deklaris, ke ilia regno daŭros mil jarojn.
2) Latine: Mi absolvas vin! (Formulo je la konfeso por absolvado de pekoj)
3) Saluto de la germanaj faŝistoj.
4) Mallongigo por koncentrejo. (Konzentrationslager)
5) Bruna estis la farbo de la faŝistaj uniformoj.

Traduko de Manfred Arnold

Esperanto-libro por kultura datreveno de UNESKO

Kadre de la kulturaj datrevenoj de Unesco ekde la 22. VII. 78 ĝis la 22. VII. 79 oni solenas en la mondo Jaron de Janusz Korczak. Ĝi intence kuniĝos parte kun la Jaro de la Infano, proklamita dum 1979, ĉar Korczak estis granda amiko de la infanoj kaj nelacigebla batalanto por la infanaj rajtoj. La Korczak-Jaro estas omaĝo al la granda filo de Pollando, pedagogo, edukisto kaj verkisto kies eduk-teorioj kaj praktiko fariĝis konataj mondskale, speciale en la pedagogiaj medioj. **Kun ĝojo ni povas nun komuniki, ke okaze de la Korczak-Jaro en Pollando aperos libro pri J. Korczak ankaŭ en Esperanto.**

La famo de Korczak fontas el du faktoroj – li estas kreinto de propra edukskolo, kiun studas kaj disvastigas internacia movado; sed inter pli vasta publiko diskonigis lian nomon lia morto – dum la II-a mondmilito li decidis iri en la gaskamerojn de la hitlera mortotendaro en Treblinka por ne forlasi „siajn" mortkondamnitajn infanojn el la juda orfejo en varsovia geto. Malgraŭ plurfoja ebleco fuĝi el la geto helpe de polaj amikoj. Tiele plej profunde demonstris J. Korczak sian komprenon de la ligo inter proklamata teorio kaj vivpraktiko.
La jubileaj solenadoj ne havas nur festan karakteron. Okazas ankaŭ pluraj sciencaj konferencoj, en kiuj specialistoj pritraktas la sciencan kaj – intime kun ĝi ligitan – literaturan kreadon de Korczak. La plej granda tia internacia konferenco okazis en Varsovio en oktobro 1978. Aperos ankaŭ novaj diverslingvaj studoj pri li kaj pliaj biografiaj libroj.
Al la ĉi-lastaj apartenas la E-lingva libro menciita supre. Verkis ĝin elstara pola pedagogo Álicja Szlazakowa kaj tradukis en Esperanton Jerzy Uśpieński. La libro havas simplan titolon: „Janusz Korczak", sed ĝi estos tre bunte eldonita far la „Eldonejoj Pedagogiaj kaj Lernejaj". Tio estas kvazaŭ negranda albumo riĉe ilustrita per historiaj fotoj kaj per grafikaĵoj, i.a. de alilandaj artistoj, kiuj omaĝis Korczak per siaj verkoj. La teksto estas vive skribita biografio, riĉe dokumentita per citaĵoj el la verkoj de Korczak kaj aliaj materialoj. Ĝi prezentas ne nur la heroon, sed samgrade lian verkon, liajn ideojn kaj idealojn tre aktualajn en la nuna epoko de valor-kaoso. Ne sen emocio la aŭtorino prezentas la komprenon kaj opiniojn de Korczak pri la esenco, graveco kaj komplikeco de la infan – kaj junaĝo en la procezo de la homa maturiĝo. La profunda, realisma kaj kunsentema kompreno de la homo permesis al Janusz Korczak formuli principojn pri la homa edukado kaj memedukiĝo, kiuj taŭgas ne nur por edukistoj. Ilin povas – eble eĉ devas! – apliki la gepatroj kaj ĉiuj homoj, kiuj deziras plibonigon de la interhomaj rilatoj. Pro tio ĝuste la scio pri J. Korczak, la kono de liaj pensoj kaj ideoj esprimitaj en la pedagogiaj verkoj sed ankaŭ en la riĉa porinfana (sed ne sole!) literatura verkaro estas tre populariginda. La „Korczak-Jaro" pruvas tion.

Por la esperantistoj estos certe interesa informo, ke Korczak estis aktiva simpatianto de Esperanto. En la studentaj jaroj li kolegumis kun la filo de dro Zamenhof, Adamo. Plej verŝajne li konis la aŭtoron de Esperanto. Kaj li devis kompreni la valorojn de la IL por la internacia kunagado de la infanoj, konsiderata de Korczak unu elinter gravaj eduk-faktoroj. Pruvas ĉi tion i.a. la fakto, ke la iniciatita de li kaj longtempe gvidata, unua en Pollando infanjunulara gazeto (kiun junularo redaktis k. verkis) la fama „Malgranda Revuo" („Maly Przeglad") aperadis en Esperanto! Tio okazis unufoje jare, la 18-an de majo, en la Tago de Bonvolo, sed en tiu ĉi tago la kompleta numero de la gazeto estis esperantlingva. Skribas pri tio ankaŭ Alicja Szlazakowa.
Pro tiuj kaj aliaj motivoj la libro – aperanta ankaŭ en la lingvoj: angla, franca, germana k. rusa – la plej multajn legantojn devas trovi inter la esperantistoj. Parenteze ni aldonu, ke la E-versio havas la plej altan eldonkvanton kaj tio dank al la financa helpo de Pola Esperanto-Asocio. La libro aperos komence de la 1979 j.

J. Uspienski

Alicja Szlazakowa:

„JANUSZ KORCZAK"

La vivhistorio

La vivo de Janusz Korczak serpentumas tra la eksterordinare gravaj, turnopunktaj periodoj de la historio de Pollando.
La jaroj de lia infaneco, maturiĝado kaj junaĝo, de la ekstarto en la profesia kaj socia laboro, la kristaliĝado de la interesoj kaj streboj, la difinado far Korczak de la celo kaj senco de sia vivo, la fiksiĝo de la pozicio de fama kuracisto kaj ekbrilo en literaturo – ĉio ĉi okazis en la periodo de la nacia mallibereco de Pollando disŝirita inter la tri okupintoj.
Post la I-a mondmilito, kiam Pollando reakiris liberecon, Korczak jam estis 40-jara kaj li eniris la pintan periodon de sia krea aktivado. La intermondmilita jardudeko de Sendependa Pollando (1918–1939) donas al la Elstara Pedagogo novajn eblojn, novajn perspektivojn de la agado, riĉigas la pedagogian kaj literaturan vivakiraĵon.
La tempoj, en kiuj vivis Korczak, ankaŭ alimaniere influis formiĝon de lia personeco, de la viv-enhavo, de la opinioj, strebadoj. La periodo, en kiu okazis la maturiĝado de la juna kuracisto, intensa evoluo de la interesiĝoj kaj scioakirado – estis transiro de la XIX kaj XX jarcentoj, signifa periodo en la historio de la pedagogia penso. Ekfloras tiam pedagogio kiel scienco, okazas impeta disvolviĝo de diversaj teorioj psikologiaj, aperas programoj kaj principoj de renovigo de edukado kaj instruado. Disvolviĝo de biologiaj, sociaj, psikologiaj sciencoj, perfektiĝo de esplorkapabloj kaj iloj ne restas seninflua je la interesiĝoj pri la infano kaj pri la kompleksa problemaro de ĝia evoluo.
La vojon por la novaj fluoj kaj tendencoj preparas internaciaj kongresoj kaj pedagogiaj organizaĵoj. La postmilitaj alvokoj direktataj al la homoj de la tuta mondo, estas vokado pri helpo al la infanoj suferantaj pro mizero. Fondiĝas la Internacia Asocio de la Zorgo pri Infano, kiu proklamas la Ĝenevan Deklaracion de Infanaj Rajtoj. Ĝi traktas pri la rajtoj de la infano, pensigas, devontigas.
La plej vivsignifaj problemoj de la monda pedagogio penetras al Pollando. Ankoraŭ restas vivantaj ĉi tie la tradicioj de la progresema penso pedagogia de la XIX-a jarcento, la ideoj proklamataj de la polaj verkistoj reprezentantoj de pozitivismo – Bolesław Prus, Eliza Orzeszkowa, Adolf Dygasiński. La sentemajn korojn kaj imagopovon de legantoj influas la literaturaj bildoj pri la sorto de malriĉulaj infanoj urbaj kaj vilaĝaj. Versaĵoj de pola poetino Maria Konopnicka apelacias al la homa

konscienco per la bildoj de la maljusto al infano; la infano, kiun ne puni, sed instrui necesas, al kiu oni devas montri koron kaj doni prizorgon por ke ĝi, senhejma, ne estu puŝita de la mizero sur la vojon kriman.
El la ideoj, okazaĵoj, travivaĵoj de tiu ĉi periodo elkreskas la figuro de Janusz Korczak – konsekvence kaj harmonie ligita kun ĝi. La pedagogia akiraĵo de Korczak respegulas la valorajn tendencojn de la epoko, kiel ankaŭ liajn proprajn pripensojn, kritikajn juĝojn, dubojn kaj postulojn. La valoraj kaj aktualaj ĝis hodiaŭ edukaj konsiloj de la Maljuna Doktoro estos objekto de ĉiuflanka scienca analizo en la planita kadre de la solenadoj de lia centa datreveno Internacia Sesio de Pedagogoj kaj ili estos prezentitaj en monografia sintezo.

Nun ni enrigardu en la historion de lia vivo.

Ĉe la fino de la vivo

„... vivi komforte mi ne povas. Mi hontas, ke mi havas manĝaĵon, sciante, ke infanoj malsatas kaj mi sentas abomenon pri mia rideto, kiam ĉirkaŭe mi havas turmentitajn infanajn vizaĝojn. Mi vokas pri la digno de la infano. Kaj prave iu min demandis: Kaj kiu hodiaŭ estimas la homon?
... Ĉinujo, Albanio, Hispanujo, jen la etapoj de mia ĉagreno. Germanujo? Kaj kio en plej proksima tempo?" – li demandis maltrankviligita pro le reeĥoj el la Okcidento ...
„Tia stato kiel la nuna ne povas pli longe daŭri. Estas la sola konsolo. Tio ne estas frenezo de l'mondo, prefere ĝia krueleco. Sed ĉu ŝanĝo estas ebla? Mi frekventas devigan kurson de kontraŭgasa defendo por kuracistoj ...
Estas granda ĉagreno. Mezepoko? Jes, tiam la timo pri fino de la mondo – nun pri mondmilito. Tiam: pesto malsanoj. Nun la gasoj ... Tiam kaj nun malsato. La malsato de infanoj. Homo hontas esti sata". Li do estis kelkfoje ekscitita, ironia, plena je sarkasmo kaj mokemo – la individualisto kun sendependa penso, malamiko de iu ajn dogmo. Ĉiam bonvolema, absolute sincera kaj verdira, kuraĝa kaj sprita. Kun la duonfermitaj okuloj de miopulo, iom distrita, kun malgaja rideto – la pensulo kun la koro tenera kaj sentema. Li ĝuis la ĝeneralan estimon. Ĉirkaŭis lin ĉiam la amo de la infanoj, la amikeco de la kunlaborantoj kaj rekono.
Oni atribuis al li la Laŭrokronon de la Akademio de Literaturo. Distingis per la Ordeno Polonia Restituta. Kiam la politika atmosfero fariĝis ĉiam pli streĉita, kiam alvenis al Pollando sciigoj pri la kreskanta en la Okcidento ondo de la rasismo kaj la antaŭanonciĝanta atako kontraŭ Pollando kaj minaco de la milito estis proksimaj – Korczak ricevis proponon translokiĝi al Palestino. Li vizitis Palestinon dufoje. Tamen li ne decidiĝis forlasi la gepatran landon. Li ne forlasis Pollandon. Restis sur la posteno en Varsovio.
La artileriaj obusoj kaj bomboj, kiuj falis la 1-an de septembro 1939 sur Pollandon igis Korczak surmeti la militistan uniformon kun la rango de majoro de la pola armeo. Tamen pro la aĝo kaj sanstato li ne estis mobilizita. Tiam – en la septembro – al timigitaj infanoj ekparolis denove per radioaparatoj la konata al milionoj de aŭskultantoj voĉo de la „Maljuna Doktoro". Li alvokis al rezisto, al helpo, trankviligis, klarigis al la infanoj, kiel ili kondutu en la aparte danĝeraj kondiĉoj.
Li pansis vunditojn. Infanojn perdiĝintajn kaj timigitajn, ofte vunditajn li portis el stratoj al la prizorgaj kaj pansaj ejoj. Li helpis al la infanoj de sia orfejo savi ilian komunan domon de bruligaj bomboj, li konsolis, fortikigis anime, kun humoro li likvidis la streĉon de hororo kaj timo infana.
Post la milit-operacioj, post la enmarŝo de la germana armeo en la ĉefurbon de Pollando la situacio en la Domo de Orfoj fariĝas tragika pro la likvido far la germanoj de ĉiu ajn karitata agado. Kun obstino kaj despero akiras Korczak la rimedojn por vivteno de siaj infanoj. Li aperigas „Alvokon al la loĝantaro de Varsovio", en kiu li postulas oferojn por la Domo de Orfoj, ĉar „La infanoj estas nia estonteco". Ne atentante pri la enkondukita de la okupantoj kruela teroro kaj pri minacanta al li danĝero li kolektas donacojn por la orfejo. Donacantoj estis ankoraŭ multaj ...
En novembro de la 1939 la hitleranaj invadintoj ordonis al la pola loĝantaro kun juda deveno surmeti ĉe maniko distingajn brakbendojn blankajn kun la blua stelo de Ciono. Korczak ĝin ne surmetis. Li ankaŭ ne demetis la uniformon de pola oficiro.
Kiam en novembro de la 1940 j. hitleranoj starigis izolitan, fermitan judan geton en Varsovio, la korĉaka Domo de Orfoj ricevis ordonon translokiĝi al la geto – al la postlerneja domo ĉe la strato Chłodna 33. Kune kun la infanoj volis iri al la geto la pola domgardisto Piotr Zalewski. Dum 20 jaroj li laboris en la Domo de Orfoj ... Oni memorigis al li la arjan devenon. Li estis tiam dolorige batita de germanoj kaj en aŭgusto de la 1944 j. mortpafita sur la korto de la Domo de Orfoj.
Dum la translokado de la orfejo al la geto Korczak estis batita kaj turmentita de hitleranoj kaj oni fermis lin en la malliberejo Pawiak – pro la kontraŭstaro, kiam ĝendarmoj estis forprenantaj kamionon kun terpomoj destinitaj por la orfejo. Post kelkaj monatoj elaĉetis lin kontraŭ kolektita sufiĉe malfacile mono liaj edukitoj ... Eltirita el la malliberejo Korczak povis tiam savi sin forkurante. Li havis multajn amikojn en la „arja" flanko. Tamen li revenis al siaj infanoj, al la geto malantaŭ la altan muron, konstruitan far la germanoj, ekipitan per vitrorompaĵoj kaj pikildrato. La muron oni starigis en la mezo de la urbo ĉirkaŭante ĝian parton. Interne, fermite, sub gardistaro ĉe la pordegoj, oni amasigis nekredeble grandan nombron da homoj ...
La situacio en la malsatigita geto estis senespera. Malvesteco, mizero, ekzantema tifo, minimumaj porcioj de nutraĵo, kadavroj de mortintoj sur la stratoj. Pro fuĝo el la geto – mortpuno. Pro ajna helpo al la judoj, – dono de rifuĝejo, neinformo pri estado, livero de nutraĵo, kaŝo de juda infano – minacis al la poloj ankaŭ mortpuno. Eĉ tiaj brutalaj reprezalioj estis aplikataj ekskluzive en Pollando verdiktita far la okupanto je biologia detruo kaj pereo. Sed la mortpuno malmultajn timigis. Polaj familioj kaŝtenis milojn da judoj. Inter la infanoj de la Nia Domo, Maryna Falska – malnova kunlaborantino de Janusz Korczak – kun endanĝerigo de la vivo kaŝis judajn infanojn. La ĝenerala situacio en la atmosfero de teroro, en la maro de malfeliĉo – estis tragedia.
Kiam en iu malfacila momento Korczak timis pri komuna histerio de la infanoj, li notis en la „Memorlibro":
„Tiel povus esti! Sed venkis la konfido de la infanoj al la gvidantaro. Ili kredis, ke nenio minacas, se la doktoro estas trankvila. Mi ne estis tre trankvila".
En tiaj kondiĉoj realigas ankoraŭ Korczak la revon de la Reĝo Maĉjo – la propran revon – pri la verda standardo de la infanoj – la simbolo de solidareco kaj espero.
En la 1941 jaro la infanoj de Korczak havas jam propran verdan standardon. En la sama jaro, la okan de junio, ĉe la tombo de d-ro Eliasberg, mortinta prezidanto de la Societo „Helpo al Orfoj" – ĉe la standardo de la Domo de Orfoj Janusz Korczak faris kun la infanoj ĵuron „ke ili vivos kaj laboros konforme kun la vero kaj justeco".
Sub la dato 29.a de majo 1942 li notis en la „Memorlibro": „Antaŭ momento Semi alportis al mi al la lito leteron: ĉu tiel estas bone?
„Al Respektinda Pastro Paroĥestro ĉe la Paroĥo de ĉiuj Sanktuloj. Ni afable petas Est. Pastron Paroĥestron pri bonvola permeso kelkfoje viziti la ĝardenon ĉe la preĝejo en sabatoj en la matenaj

horoj, se eble fruaj (horo 6.30–10.00). Ni sopiras pri iom da aero kaj verdaĵo. Ĉe ni estas sufoke kaj malvaste. Mi volas ekkonatiĝi kaj amikiĝi kun la naturo. Ni ne damaĝos la kreskaĵojn. Ni varme petas pri ne rifuzo de nia peto.
Zygmuś, Semi, Abraŝa, Hanka, Aronek", Tamen ankoraŭ vivigas lin la espero pri transdaŭro kune kun la infanoj. Daŭre li savas, laŭ la ebloj, la normalan antaŭan vivstilon de la Domo de Orfoj.
En tiaj kondiĉoj ekestas la skribata dum noktoj, de majo ĝis aŭgusto 1942 tragika „Memorlibro", la skuanta dramo de la lastaj viv-monatoj de la „Maljuna Doktoro", entenanta la plej sincerajn konfesojn, mallongajn pensojn, notitajn rapide sur la fono de rememoroj kaj okazaĵoj el la tuta vivo. En la notajoj el la 15.a de majo 1942 jaro ni legas:
„... mi amas la varsovian Vistulon kaj deŝirita de Varsovio mi sentas mordan sopiron.
Varsovio estas mia kaj mi estas ĝia. Mi diros eĉ pli: mi estas ĝi. Kune kun ĝi mi ĝojis kaj tristis, ĝia bonvetero estis mia bonvetero, ĝia pluvado kaj kotaĵo ankaŭ estis la mia. Kun ĝi mi estis kreskanta".
Varsovio plurfoje penis savi Korczak, forpreni lin el la geto. Maryna Falska preparis sekuran kaŝejon en bone konspirita ejo. La tuta operacio estis akurate preparita. Oni plurfoje transdonis al li paspermeson por forlaso de la geto, interalie venadis al li kun tia permeso lia amiko Igos Neverly-Abramow. La poloj priservantaj la aŭtomobilojn de la san-servo kelkfoje proponis transporti lin kaŝe. Sed Janusz Korczak esprimadis sian miron, eĉ indignon, ke oni povas ion tian proponi, kiel forlaso de la infanoj, kiujn oni ne povis jam savi.
La 18.an de julio 1942 en la Domo de Orfoj okazis ankoraŭ spektaklon de „Poŝto" de Rabindranath Tagore...
Kelkajn tagojn poste – en la naskiĝtago de Janusz Korczak – la 22.an de julio la germanoj komencis likvidadon de la varsovia geto. En transport-grupegoj po kelkmiloj da personoj ĉirkaŭitaj de ĝendarmoj, tra malplenigitaj pro la hororo stratoj oni kondukis la loĝantaron al transŝarĝa placo (Umschlagplatz) ĉe Stawki-strato, lokigis en varvagonojn kaj veturigis al mortotendaro, al la gaskameroj de Treblinka.
Laŭdire Janusz Korczak ĝis la fino ne volis kredi pri tio, ke tia sorto povas atendi ankaŭ infanojn, ke la krueleco de hitleranoj atingos eĉ tian ŝtupon... Specifa estas la lasta enskribo en la Memorlibro sub la dato 4.a de aŭgusto 1942:
„Mi priverŝas florojn. Mia kalvaĵo en la fenestro – tiel bona celo. Li havas karabenon. Kial li staras kaj rigardas trankvile? Li ne ricevis ordonon- Aŭ eble kiel civilulo li estis instruisto en vilaĝo, notario, stratbalaisto en Lajpzigo, kelnero en Kolonjo? Kion li farus, se mi kapsvingus al li? Amike salutus per la mano? Eble li eĉ ne scias, ke estas tiel, kiel estas?
Li povis veni nur hieraŭ defore..."
Kiel karakteriza por la sinteno de Korczak al la mondo kaj homoj estas ĉi tia pensmaniero. Ĝuste tial Korczak mem ne povis ekkredi, ke „estas tiel, kiel estas". Kaj tiel estis. Ĝuste tiel: Kun la unuaj transport-grupoj al la mortotendaro en Treblinka iris ankaŭ grupoj da infanoj el 30 orfejoj kaj internulejoj – ĉirkaŭ 4 000 infanoj kun la edukistoj, en ĉi tiu nombro:
la Domo de Orfoj el la strato Twarda, kun la estro, Dabrowski, kaj lia edzino, la Infan-Domo el Dzielna-strato kun la heroa fratino Abel kaj la juneta ĉarma kuracistino Noemi Wajsman, kiu kun indigno rifuzis transiron malantaŭ la murojn de la geto, la Infan-Domo el Mylna-strato kaj multaj, multaj aliaj duoninternulejoj, kleriĝejoj. Kiam venis la vico por la Orfo-Domo de Korczak – ekiris marŝantaro de infanoj (ekde 7 ĝis 18 jaroj) en ordigitaj vicoj, kun la verda standardo de espero. – Eble la infanoj pensis, ke estas forveturo al somerumado? Povas esti. Tutcerte Sinjoro Doktoro la unuan fojon ne diris al la infanoj la veron. Komence – la plej junaj, kondukataj de doktoro Janusz Korczak, en la fino – la plej aĝaj kun lia fidela laborkunulino Stefania Wilczyńska kaj cetera personalo. Tiele ili iris renkonte al la morto...
Janusz Korczak estis modesta homo. Li parolis pri si, ke li nur plenumas la devojn, laŭ la eblecoj...

Tr. Jerzy Uspienski

NI KURAĜE DIRU...

Estas preskaŭ regulo, ke esperantistoj hezitas respondi je gravaj demandoj, precipe je tiuj, kiuj nuntempe tremigas la tutan mondon. Ili sin ĉiam kaŝas malantaŭ la tiel nomata neŭtraleco. Tia „neŭtraleco", neŭtraleco en plena senco de l'vorto, kiel ili diras, ne nur ke ne estas neŭtrala, sed ĝi plej aktive helpas ĉiuspecan reakcion. Tiamaniere la vorto „neŭtraleco" egalrajtas la vorton „reakcio".
Egalrajtigi la esperantan movadon kun la reakcio signifas labori kontraŭ la movado mem.
La nuntempaj generacioj, kiuj spertis la kruelaĵojn de la mondmilito, ĉu aktive partoprenintе sur batalkampo, ĉu malsatante malantaŭ la batal-linioj, ne povas resti neŭtralaj rilate al tiu grava demando kia estas la milito.
Estas fakto, ke ĉiu povas ellerni Esperanton, estas fakto ke ĉiu ĝin povas uzi, sed ankaŭ restas fakto, ke ni devas aktive batali kontraŭ ĉiuspecaj misuzoj de Esperanto, se ni volas ke ĝi restu forta, ke ĝi progresu.
Antaŭmilite, en la unuaj komencoj de l'disvastiĝo de Esperanto, en Parizo oni kaptis aron da ŝtelistoj, kies oficiala lingvo estis Esperanto. Neniu saĝa homo povis pro tio kritiki Esperanton, sed ankaŭ neniu saĝa homo povis klopodi disvastigi Esperanton inter ŝtelistoj, pensante ke per tio li helpas la movadon.
Se tio estas logika rilate ŝtelistojn, kial ni ne estu konsekvencaj rilate ĉiujn, kiuj volas malbonuzi Esperanton?
Sed, ho ve! Niaj puraj „neŭtraluloj" ne nur ke ne batalas kontraŭ tiaj aperaĵoj, ili eĉ laŭdas la ideologiojn, kiuj malpermesas la uzadon kaj disvastiĝon de Esperanto. Ĉu ili opinias, ke homoj fariĝinte esperantistoj ĉesis esti ankaŭ homoj?
La esperantista movado ne povas esti ia senvertebra kreitaĵo, kiu ĉiam skuiĝas kiel la vento blovas. Kontraŭe, ni devas esti konsciaj, ke nia movado, kreitaĵo de la socio, devas ĉiam kaj ĉie klare, senhezite kaj kuraĝe reagi je ĉiu socia transformiĝo, taksante ĉu tia transformiĝo estas utila aŭ ne rilate nian movadon, Konsekvence, se ni taksis, ke iu afero estas malutila al la movado, ni devas aktive batali kontraŭ ĝi.
Ĉu ni tiam ne perdos nian neŭtralecon? Kontraŭe, defendante nian movadon de ĉiuspecaj malamikoj ni pli forte ligos nin ĝuste je tiu batalkampo de defendo de Esperanto.
Kaj ĉar hodiaŭ la vorto milito ne nur ŝvebas ĉie en la aero, sed fakte milito jam ekzistas sur nia terglobo, ni devas rilate ĝin, rilate militon, klare diri, ke nia movado estas ĝia malamiko. Ne gravas ĉu tiu milito estas formale proklamita aŭ ne, sed gravas ke homa sango vere fluas.

B. Borjan en „Honore al ili"
Memorlibro pri falintaj jugoslaviaj esperantistoj 1941–1945,
Zagreb 1976, p. 93–94

ERICH KÄSTNER – aktiva humanisto

Ne estas facile, klasifiki Erich Kästner en la literaturo. Li mem konfesis, parolante antaŭ la PEN-klubo, ke lia verkaro estas multflanka kaj kontrasta, ke li ne estas klasifikebla en unu speco de literaturisto. Li ĉiam sin sentis kiel pedagogo.
Erich Kästner, filo de butikista paro,



Foto: Zentralbild

plenkreskis en epoko tre kaosa. La gepatroj ebligis al li la viziton de gimnazio, sed la imperiestro postulis de li, ke li pli frue forlasu la lernejon, por fariĝi soldato kaj kunebligi neeblan militan venkon. Ĉefserĝanto per troa servemo zorgis, ke Erich Kästner fariĝis kormalsana kiel junulo. Kaj tiu ĉi ĉefserĝanto faris el la soldato Kästner la militkontraŭlon. Kelkaj el liaj unuaj poemoj tion atestas. Ili estas la plej amaraj, verkitaj de li.
Li fariĝis instruisto kaj vizitis la seminarion, ĉar tio estis la sole ebla vojo por neriĉulo, havigi al si modestan ekziston. Sed la postmilita senvaloriĝo de la germana regno eĉ ne ebligis al li la finstudadon. Do, li fariĝis aŭtoro. Lia idealo: Gotthold Ephraim Lessing, la kuraĝa disputinto por realeco. Kaj la unua romano de Erich Kästner pruvis, ke li ne nur ŝatis sian idealon, sed konkuris kun tiu. Tiu ĉi romano „Fabian" estis publike tiel akre kritikita, ke Kästner ne restis nekonata. Li ŝatis karakterojn, kiuj kuraĝe en ŝajne senespera situacio atake defendis siajn vidpunktojn kaj venkis (ekz. Martin Luther). Kiam la faŝismo ekregis en Germanio ankaŭ la libroj de Erich Kästner estis bruligitaj. Li estis fiera, ĉar li vidis, ke preskaŭ ĉiujn eminentulojn el la germana literaturo trafis la sama sorto. Poste oni malpermesis al li la verkadon. Tiun ĉi epokon li uzis por noti en siajn notlibretojn la okazintaĵojn. Multaj skizoj el la jaroj 1933 ĝis 1947 pruvas tion. Li senmaskigis la faŝismon, sed li defendis tiujn, kiuj tiam ne estis tiel kuraĝaj, kontraŭstari ĝin. Li mem konfesis, ke li ne povus garantii kiel li estus kondutanta kiel arestito dum torturado. Li tre estimis la konsekvencajn kaj rektajn kontraŭfaŝistojn.
Kiel pedagogon oni devas alte taksi la verkinton de infana literaturo. Li realigis la postulon, ke oni skribu por infanoj pli bone, ol por plenaĝuloj. La fakto, ke lia romano „Emil kaj la dedektivoj" estas uzata en aliaj landoj kiel instrumaterialo por moderna germana lingvo, pruvas, ke li restis nesuperita en la infanliteraturo. Kelkaj el liaj infanromanoj estis filmigitaj, kio ja ne okazas kun ĉiuj literaturaĵoj.
Por ni, kiel pacamantoj, Erich Kästner estis granda kaj bona helpinto. Li senmaskigis la faŝismon. Per siaj infanromanoj li helpis semi pacamon kaj humanismon en la korojn de la infanoj. Ni esperu, ke tiuj ĉi semadoj ne estos senfruktaj.
La dudek trian de februaro 1979 ni metis florbukedon sur lian tombon kaj ni dankis al li.

Rudolf Zimmermann

ERICH KÄSTNER Parolas maljunulo

Infano estis mi. Jes, kiel vi.
Mi estis vir'. Kaj maljunulo nune.
Forpasis temp'. Ankoraŭ vivas mi.
Volonte mi forgesus ĉion kune.

Infano kiel vi. Nun elĉerpite.
Tro longa viv' fariĝas fine aĉa.
Se morto venus, bone, aprobite.
Mi estas laca! Alinome: saĝa.

Mi vidis multon en la mondteatro.
Infano estis mi. Jes, kiel vi.
Mi estis viro kiel via patro.
Plej ofte malvaloris, kredas mi.

Por vi ja estus rakontinda multo,
Ankoraŭ nekonata historie.
Vi serĉus en la libroj sen rezulto,
Ĉar la esenca parto mankas tie.

Milito estis. Kaj ni spertis ĝin.
Sufero venis. Kaj ni spertis: kial.
La grandaj trompoj ne plu trompis nin.
Fantome ni ekkonsciiĝis: tial.

Esperis ni. Sed vana la espero.
Malforta stelo restis la raci'.
La posteuloj pensis ĝin ĥimero.
La posteuloj lernis ne de ni.

Nun venas vi. Maleblas ŝanĝi sorton.
Ne povas helpi mi, deziras morton.
Laŭvole faru! Sed memoru jen:
Racio ja postulas propran forton,
Stulteco nur ofertas sin sen pen'!

El la germana:
Horst Michling (GFR)

Recenzo

„La Morto de la ĉielarko", elektitaj poemoj kaj artikoloj,

estas titolita lukse aspektanta volumeto, kiun eldonis HEA en 1977 omaĝe al la centenario de la „post Petőfi plej signifoplena kaj grandformata fenomeno en la hungara liriko".

Endre Ady.

Ora parafo de la poeto ornamas la ruĝan ledosimilan bindaĵon kaj sur la papera kovrilo videblas lia portreto.
Oni devas esti konanto de historiaj faktoj kaj ŝatanto de literaturo por profunde ekkoni la valoran enhavon de tiu ĉi verko, kiun redaktis Vilmos Benczik kaj kies tradukon prizorgis plej parte Kalman Kalocsay kaj Imre Baranyai, Vilmos Benczik, Marton Fejes, Peter Rados, Ferenc Szilagyi.
La enkonduka biografio estis skribita antaŭ 15 jaroj (1962) de Kalman Kalocsay, sekvas 42 diverstemaj poemoj de Endre Ady. Pasiaj amsentoj, melankoliaj kvazaŭ popolkantaj sonoj alternas kun batalpretaj alvokoj kaj ardantaj la patrujon adorantaj rimoj. Ne malpli interesaj kaj altnivelaj estas la 10 artikoloj de Vilmos Benczik (unu el ili de Kalman Kalocsay), per kiuj la historiaj cirkonstancoj trafe estas lumigitaj. Ili donas klarigan fonon por la multkolora ĉielarko de la poemoj. El la brilaj artikoloj al mi plej plaĉas „Aŭtobiografio", „Morto de la Naciismo", „Tertremo" (de V. B.) kaj „Hungara Problemo" (de K. K.), kaj la poemoj kaj la artikoloj estas kronologie ordigitaj, el kio rimarkeblas la evoluo de Endre Ady de nura poemkreanto al filozofa meditanto ĝis politika luktanto.
Per postvortoj de Vilmos Benczik, notoj kaj enhavtabelo finiĝas tiu leginda, kleriga verko.
Povus esti, ke nun, esperantigita, la poezio de Endre Ady fariĝos komuna trezoro de la tutmonda popolo.

H. Sauerbrey

ERICH WEINERT (1933)

La fablo pri la dia mondordo

Okazis jena antaŭ multa temp':
En iu val' kun sia familio
potisto vivis, plena da feliĉ'.
Li sidis ĉe la disko, formis potojn
kaj portis ilin al la kamparanoj;
por tio li ricevis laŭ bezono:
legomon, ledon, panon aŭ viandon.
Malgrandan domon eĉ posedis li
kun korto, ĉar libera estis grund'.
La potargilon prenis li el tero.

Do iun tagon venis fremda vir'
kaj diris: „Vidu, dum plej multa temp'
vi kuras ja por vendi viajn potojn.
Sed aŭdu la proponon: Donu ĉiujn
finitajn potojn, kaj mi ilin vendos.
Al vi mi donos malpli, estas vere,
ĉar ankaŭ mi deziras gajni iom,
sed vi kapablos fari ja trioblon,
se vi ne perdos tempon per kurad'."

„Vi pravas!", diris pie la potist',
Do vendu vi! Estos por mi pli bone."
La viro diris: „Sed vi mem ne rajtos
al iu vendi potojn, sed nur mi!"
Potisto diris: „Sankta estu
la kontrakt'!"
La fremda viro vendis nun la potojn.
Sed baldaŭ li postulis la duoblon;
al la potist' li donis nur kvaronon,
Ĉar tiu povis fari ja pli multe!

Tiel okazis, ke la fremda vir'
bezonis baldaŭ grandajn deponejojn,
por stapli tri kvaronojn de profit'.
Kaj ĉar al li abunde kreskis, kion
li gajnis per la potoj, dungis li
du fiajn homojn, kiuj ne inklinis
por iu ajn labor'. Kaj li parolis:
„Ĉe mi bonfartos vi, servantaj min.
Ci estu pastro, ci ekzekutisto!
Vi aŭdis jam la kamparanajn plendojn,
ke mia gajno estu ja maljusta.
Kaj la potist' eĉ volas ne labori.

Elpensu, mia pastro, tian leĝon,
ke tiu ordo, kiun mi dekretis,
devenis do de Di', kaj malobeo
alvokos nepre ĉiopovan punon.
Kaj vi, ezekutisto, akompanu
la predikanton de doktrin'. Kaj ĉiun
grumbladon tuj respondu per la glav'!"

La du proklamis ĉie la doktrinon.
La kamparanoj estis tre bonkoraj,
kaj ili diris: „Tiel estos bone!
Ĉar venis ĝi de Dio, ni agnoskos."
Ja ili vidis: kreskis la mizer'
kaj la riĉulo vivis en abund'.
La aĉetantoj multe devis pagi
kaj en mizeron falis la potist'!
La riĉa viro prenis teron,
bruton, domojn,
al serv' devigis la malriĉiĝintajn.
Sed kie ili kune konsiliĝis,
aperis tuj la pastro kaj avertis,
ke ili ne rezistu dian ordon.
Jen ili diris: „Tiel estos bone!"

Sed ofte sin demandis ili kaŝe,
feliĉon de liber' rememorantaj:
Ĉu tio povas esti dia vol'?
Sed ili – kiuj ne kuraĝis kredi,
ke tiu farus malsinceran ludon,
sin apoganta sur la vort' de Dio;
kaj ke ekzekutist', servanta al riĉul',
de li oficon havus, ne de la ĉiel' –
silente do akceptis la oferon.

Ho, estus ili tiom kuraĝintaj
anstataŭ kredi al doktrinoj falsaj,
ja estus ekkonintaj kontraŭsencon.
Ses kamparanoj pugnoj ja sufiĉus,
malsuprenŝiri supran etpotencon,
antaŭan liberecon revenigi
kaj ĉion al popol' apartenantan!

La fablo aĝas pli ol mil da jaroj,
sed jam ne estas komprenata ĝia senc'.

Tradukita el la germana de Manfred Arnold

Recenzoj

25 Jaroj –

Antologio de Belartaj Konkursoj; eldon. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1977, 207 p.

Tiu ĉi antologio, enkondukita per salutvortoj de prof. H. Tonkin, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj finita per mallonga skizo pri la Belartaj Konkursoj de UEA fare de Baldur Ragnarsson, nuna prezidanto de la juĝa komisiono, prezentas 54 premiitajn konkursaĵojn de la Belartaj Konkursoj de ties komenciĝo ĝis la fino de 1975, inter ili 36 originalaj kaj 7 tradukitaj poemoj kaj 11 originalaj prozaĵoj. Ĉar laŭ la informo en la menciita skizo oni atribuis en tiu periodo entute iom pli ol 300 premiojn, la antologio estas nur elekto, kiun prizorgis William Auld (poezio) kaj Vilmos Benczik (prozo). Bedaŭrinde mankas indikoj pri la principoj de la elekto. Ĉu oni supozu, ke la redaktoroj sekvis sian personan guston aŭ ŝaton, tiumaniere submetante la jam premiitajn verkojn al dua prijuĝo? Kiel ajn, ili elprenis proksimume egale grandan parton el la tri rangoj de la premioj (22 unuaj, 20 duaj, 11 triaj premioj kaj 1 honora mencio). Tiuj elektitaj konkursaĵoj estas nepre legindaj. Pri tio jam atestas kelkaj famekonataj aŭtornomoj, ekz. Majorie Boulton, William Auld, Lina Gabrielli, Clelia Conterna, Albert Goodheir, Nicolino Rossi, Victor Sadler, Edvin de Kock, Jiři Kořinek, Violin Oljanov, E. V. Tvarožek, Tibor Sekelj ktp. Do, la antologio estu rekomendata al ĉiu, kiu ŝatas okupiĝi pri originalaj literaturaĵoj kiel gravaj elementoj por la fortigo kaj disvastigo de Esperanto en la kultura kampo.

D-ro Karl Schulze

Johannes Linnankoski:

La kanto pri la fajr-ruĝa floro, Finna Esperanto-Librejo, Kuopio, 1978 131 p., trad. E. Kuoppala kaj J. Jäntti

Tiu belaspekta libro prezentita al ni de FEL pentras bildon pri la kamparana vivo en Finnlando fine de la 19a jarcento. La juna filo de bienulo forlasas la gepatran domon kaj dum kelkaj jaroj laboras kiel flosisto sur diversaj riveroj. Li estas tipa heroo: venkas en la amo, en la laboro, en la vivo. Neniu povas rezisti, ĉiujn li superas je kuraĝo kaj forto. En la rakontado alternas liaj (enuaj pro ripetado) amaventuroj kun interesaj respeguloj de la kamparana kaj flosista vivmanieroj, kompletigitaj per skizaj popolaj fabeloj.
La traduko ne estas altkvalita. Ne pro la multnombraj neologismoj (kvankam la apliko de „fado" kaj „integra" ŝajnas al mi tre stranga en beletristiko) sed pro nekutimaj („plimaljuneco", p. 12; „kampanulo", p. 21) kaj finnlingvecaj parolturnoj, kiuj ne ĉiam estas facile kompreneblaj kaj tial ne subtenas la folkloran parolkarakteron de la traduko („tiam nin prenas la pajlopano", p. 16; „misdisa").

Michael Lennartz

Recenzo „Bulgarino"

Traleginte la belege ilustritan, varian revuon „Bulgarino", en 1978 eldonita de la Komitato de la Bulgaraj Virinoj, mi tuj rememoras jenan eldiron de Karl Marx: „La socia progreso ekzakte mezurebliĝas per la pozicio de la virino".
Sur 32 paĝoj oni renkontas la nuntempajn bulgarinojn, kiuj ĝuas en la plej diversaj profesioj kaj en la familio egalrajtecon. La Bulgara ŝtato per leĝoj garantias ĝin al ili, tute egale ĉu ili estas edzino, patrino, dommastrino aŭ artistino, verkistino, sciencistino aŭ iu alia „profesiistino".
Ankaŭ modaj proponoj, „Kulinara Atlaso", rakontoj kaj spritaĵoj pri la „saĝeco de la jaroj", urboj kaj pitoreskaj pejzaĝoj estas prezentataj.
Kelkaj historiaj retrospektivaj rigardoj faciligas la komprenon de la evoluinta Bulgario kaj ties socian progreson.
Evidentiĝas, ke la bulgarinoj estas plene protektataj kaj agnoskataj ŝtatanoj de progresema ŝtato.

H. Sauerbrey

„La plej nobla okupo de la homo estas la homo"

asertis Gotthold Ephraim Lessing, kies 250-an datrevenon de la naskiĝo ni ĉijare solene omaĝas.

La 22an de januaro 1729 li naskiĝis en Kamenz kiel plej aĝa filo de pastro. Post la unua instruado ĉe la patro kaj en la urba latina lernejo la talentita 12-jarulo ricevis stipendion en la fama princa lernejo „St. Afra" en la urbo Meißen. Tie li akiris la fundamenton de sia klereco. Krom la malnovaj lingvoj li studis matematikon, geografion kaj historion. Antaŭtempe li povis fini la lernejon. Laŭ la juĝo de la tieaj instruistoj „li estas ĉevalo, kiu devas havi duoblan nutrajon".
Sekvante la deziron de la patro li studis en Leipzig teologion. La fama Leipziga universitato tiam estis unu el la unuarangaj centroj de la klerigo en Germanio. La tiea vigla spirita vivo instigis lin prepari sin al artosciencaj kaj natursciencaj studoj por fariĝi universitata docento. Konstatinte „ke libroj klerigas min – sed neniam ili farigas min homon", li decidis okupiĝi kiel sendependa verkisto por tiamaniere influi la evoluon de la burĝaro. Multe instigis lin la geaktoraro de Karoline Neubert. Ili prezentis lian unuan komedion „La juna scienculo". Sekvis restadoj en Wittenberg kaj Leipzig, kie li vivtenis sin per recenzoj de libroj kaj kritikoj de teatraj spektakloj kaj tradukoj. Krome li verkis kelkajn dramojn kaj fablojn, per kiuj li kritikis la



Foto: Zentralbild

regantan sociordon kaj la prusan despotismon. Kiel unua li kreis la unuan burĝan dramon de la germana literaturo. Tio signifis, ke unuafoje ne princaj aŭ dukaj moŝtoj staris en la fokuso de la tragedio, sed simplaj homoj estis la herooj kun noblaj pasioj kaj idealoj.

Li liberigis la germanan literaturon de la francaj tendencoj kaj fariĝis la pioniro de la realista Germana Nacia Teatro. En „Leteroj rilatantaj la plej novan literaturon" li postulis reformon de la germana teatro kaj transformigon al realisma teatra arto.
En Breslaŭ, kie li dejoris kiel sekretario, estiĝis lia vivoplena realisma komedio „Minna von Barnhelm", kiu apartenas al la klasikaj komedioj de la germana literaturo. Trafe li kritikis la prusajn vivcirkonstancojn en la 18a jarcento.
De 1767 ĝis 1769 li agis kiel dramaturgo ĉe la nove fondita Nacia Teatro en Hamburg. Per „Hamburga Dramaturgio", t.e. kolekto de 104 detalaj pritraktoj de prezentadoj en la Nacia Teatro, li kreis la teoriajn fundamentojn de science motivigita realisma germana teatroarto.
En Wolfenbüttel li pasigis siajn lastajn vivojarojn (1770–1781) kiel bibliotekisto de la Duko de Braunschweig. Tie estiĝis la tragedio „Emilia Galotti", pasia defendo de la homa digno kontraŭ feŭda arbitro.
Lia lasta dramo „Nathan la Saĝulo" kvazaŭ estas lekcio pri humanismo kaj toleremo. Montriĝas resume la 3 profesioj de Lessing: filozofo – verkisto – juĝisto.

Hella Sauerbrey

„La knaboj de Paŭlo-strato"

La konata – ĉefe inter teatraj fakuloj – hungara dramisto Ferenc Molnár en 1978 100-jariĝis. Omaĝe al li reeldonis Hungara Esperanto-Asocio tiun lian verkon el la tutmonda junulara literaturo: La knaboj de Paŭlo-strato.
Ĝi estas stabile bindita broŝuro de 180 paĝoj, 18,5 x 11 cm, kun filmfoto avers- kaj dorsflanke.
La unua eldono de tiu libro aperis jam en 1937, la dua neŝanĝita nun, en 1978. El mallonga antaŭvorto ni ekscias, ke Molnár – filo el grandburĝa familio – debutis per felietonoj, sed baldaŭ pruvis sian talenton per romanoj kaj sukcesaj teatraĵoj, kiuj havigis al li konatecon en Eŭropo. En la tridekaj jaroj li elmigris al Usono, kie li mortis en 1952, riĉa sed tre sola.
Lia romano „La knaboj de Paŭlo-strato" estas skribita en la unuaj jaroj de nia jarcento kaj tio estas rimarkebla: Tiom da „kavalireco" inter militetantaj knabgrupoj ne plu imageblas. La temo de lia verko: La travivaĵoj de grupo da lernantaj knaboj, kiuj posedas belegan ne prikonstruitan terenon – la grundon – kiun ili fine sukcese defendas kontraŭ alia konkerema knabgrupo. Entute intereskapta kaj samtempe emocia romaneto, bone legebla. El lingva vidpunkto ĝi estas preskaŭ modela, sed per tiu modeleco montras la limojn de Esperanto: La tradukinto ne sukcesis traduki laŭnuance la esprimojn el la knaba slango de Budapeŝto komence de nia jarcento. Tial ĉiuj paroloj efikas iom tro puraj, kvazaŭ filtritaj tra filtrilo, kiu retenis la akcesorajn spicojn. Aliflanke tio estas avantaĝo por progresantoj: ili bone komprenos ĉion. Bedaŭrinde ni nenion ekscias pri la tradukinto Ladislao Somlai.
La recenzinto ĝenerale ne entuziasmiĝas pri la nunaj oftaj „re"-eldonoj. La temoj ofte ne plu indas la elspezojn je mono kaj papero. Sed en ĉi tiu kazo li opinias, ke la novaperigo de tiu romaneto povas esti pliriĉigo de nia librostoko.
Konklude: Libro, bone kaj relative facile legebla ankaŭ de neperfektuloj, kun interesa temo por multaj esperantistoj, taŭga por pliperfektiĝo de ĉiu. Ĝi indas stari en nia biblioteko kaj esti uzata ofte.

Wilfried Hofmann

LA GOLŜOTISTO

A. Gladilin

Antaŭ kelka tempo nia futbalo ŝajnis malsani. Ĉiuj ludoj finiĝis per nulo al nulo. La spektantoj malkonsente grumblis. En la sportgazetaro furiozis opiniobataloj. Oni skribis, la avanuloj[1] estas nekapablaj ŝoti golojn; kaj la trejnistojn oni akuzis pro la emo al nure defenda ludo, pro la strebo al la rezulto „sendecida". En la amaso de tiaj opinioj mi trovis rimarkon de fame konata trejnisto: „Donu al mi futbaliston, kiu ne povas kuri, kiu ne povas alludi la pilkon, kiu ne povas dribli, sed kompare al ĉio ĉi en ĉiu ludo ŝotas unu golon – kaj mi estus feliĉa!"
Mi meditis. Ĉion, kion la trejnisto menciis, mi ne povis. Kaj ŝoti golojn? Tio devas esti lernebla. Mi trejnis tutan jaron. Mi ŝotis el la kuro, el la staro, kun antaŭkuro, kun trompo, en falo. Ĉiam mi celis nur al la dekstra aŭ maldekstra supera angulo. Iom post iom mi perfektiĝis. Tuj post ekpuŝo de la pilko ĝi jam troviĝis en la reto. Ĉe mi ekestis reflekso: pilko – ŝoti – golo.
Post tiu jaro mi iris al tiu fame konata trejnisto kaj diris: „Bonan tagon. Mi estas tiu, pri kiu vi revas. Mi ne povas kuri, ne povas alpuŝi la pilkon, kaj la dribladon mi timas. Sed mi garantie ŝotos unu golon po ludo." Nature li ridis. Sed la teamo ne havis kaŭzon por ridi: malmulte da poentoj, negativa golbilanco, la estraro minacis al la trejnisto lin maldungi „propradezire". Kun unu vorto – la tento estis granda.
Kiam oni permesis mian partoprenon en ekzerca ludo mi ŝotis unu golon. Kiam oni lasis min ludi en la dua teamo mi denove ŝotis golon. Kaj kiam mi finfine ludis en la unua teamo mi ŝotis en ĉiu ludo unu golon. Unufoje mi eĉ tri pilkojn sendis en la reton, sed tion mi neniam ree provis, ĉar mi trostreĉis miajn fortojn. Mi havas ja tute nenian forton. Malgraŭ tio la trejnisto insistis: „Petrov, kara, vi devas ŝoti pli da goloj!" Sed kial? Tion ni ne kontraktis. La trejnisto diskutis pli kaj pli laŭte, sed poste li trankviliĝis. Unu golo po ludo ja estis certa.
Komence ĉio estis facila. Mi senfare staris proksime ĉe la golejo, neniu puŝis al mi la pilkon, kaj la kontraŭuloj ne



atentis min. Por ili mi estis tute neinteresa. Nur la golulo rigardis min de tempo al tempo kiel superfluan akcesorajon. Sed tiam – iam dum la ludo – miaj kamaradoj kuris kun la pilko al mi. Mi kuris kelkajn paŝojn kun ili kaj ŝotis senhezite al la golejo. La golulo devis preni la pilkon el la maŝoj. Pli poste oni atentis min. En ĉiu ludo mi ricevis gardanton. Sed kia senco estis en tio? Tiu ĉi gardanto lernis ludi, li kutimas kuri, ŝoti kaj dribli. Sed mi nur staris senfare. Daŭris ne longe, li ekenuis kaj kuris for. Kaj jam venis mia ŝanco el la profundo de la placo, mi ŝotis – kaj sur la lumtabulo aperis mia nomo. Memkompreneble mi ĉiam evitis la „ĉeflankan pozicion".
Nun du defendantoj gardis min. Sed unue tio estis bela avantaĝo por mia teamo (ni havis do unu kuranton pli) kaj due: ankaŭ tiuj du ne povis haltigi min. Mi staris ja nur sur mia loko kaj faris nenion. Tio estis por ili tute nekutima, por tio oni bezonas specialan trejnadon. Mi ŝajnigis indiferenta, kantaĉis modkanton. Sed se mi rimarkis, ke miaj gardantoj tiom ascedis, ke la makzeloj krakis, mi eksprintis. Ŝoto. – Kaj la golulo devis preni la pilkon de post si.
Aĥ vi, miaj gamboj! Por vi fariĝis kutimo, senhezite ŝoti, kvazaŭ aŭtomate, en la suprajn angulojn. Por la golulo tio estis terura. Normale li supozas, al kiu angulo estas celate. Ĉe mi li povas nenion diveni, ĉar mi mem ne scias antaŭe, kien. Tamen li povas kelkfoje kapti, sed venas alia ŝanco – naŭdek minutoj estas longa tempo. Tial mi nun ne plu staradas. Kredu min, oni laciĝas starante tiom longe. Miaj gamboj ne estas popolpropraj, mi devas ilin domaĝi. Ĉe bona vetero mi kuŝigas min sur la gazonon, sunbrunigas min aŭ legas libron. Kiel bona sportisto mi devas studi. Mi elektis la medicinon. Multon mi devas lerni. Proksimume dek kvin minutojn en ĉiu ludduono mi povas uzi tiucele, ĉu tio ne bonas? Se pluvas, mi kunportas mian ombrelon – la libroj ne malsekiĝu, ĉu ne?
Komence, kiam mi unuafoje kuŝigis min sur la gazonon, tio ne plaĉis al miaj kamaradoj. Ili eĉ faris kunvenon. Nekamaradeca mi estus! Ĉiuj kuras kaj penas ŝvitante kaj Petrov kuŝas kaj subfosas la moralon de la junaj ludantoj! Sed mi diris mian opinion malkaŝe. Per mi ni komencas ja ĉiun ludon kun unu golo antaŭ la kontraŭulo. Kaj la junaj ludantoj lernu unue ŝoti golojn!
Komence fajfis la spektantoj, se mi streĉis mian ombrelon aŭ komforte sidigis min kun iu libro. Sed pli poste ili trankviliĝis kaj nun ili venas aparte pro mi, por vidi min kiel numeron en cirko.
Sed mia persona gardanto nun estas en pli malagrabla situacio ol antaŭe. Li devas stari apud homo, kiu kuŝas kaj legas. Li estas priridata de la spektantoj, li fariĝas nervoza. Fine li kuras iom al la mezo por malstreĉi la muskolojn, kaj mi eksaltas, ricevas la pilkon, ŝotas kaj iras reen. La kriado en la stadiono diras al mi: golo!
Futballudo sen goloj estas neinteresa. Kaj mi ĝojas, ke la spektantoj vidantaj min ne senĝue perdas sian valoran tempon, ili revenas kontentaj al sia ĉiutagaĵo. Kia feliĉo, ke neniu intencas forigi la futbalon. Kvankam – restus ja ankoraŭ la glacihokeo!

trad. W. Hofmann

1 – avanulo = atakanto (G. Stürmer)



R. Amundsen Foto: Zentralbild

Aleksandr Logvin

Post 50 jaroj...

Fine de majo 1928 la mondo estis maltrankviligita per sciigo pri polusa tragedio de Nobilé. Lia direktebla balono „Italia" pereis apud Ŝpicbergen.
En porsava operacio partoprenis 22 aviadiloj kaj 18 ŝipoj. Antaŭ ĉiuj sin direktis al loko de la katastrofo norvego Larsen. La sveda piloto Lundberg trovis grupon de Nobilé, ĵetis al viktimoj varmajn vestojn, nutraĵon kaj poste liveris grave vunditan Nobilé al naĝanta bazo „Citta di Milano". Grupo de vundita Malmgren estis trovita de rusa piloto Ĉuĥnovskij kaj savita de ŝipo „Krasin".
Sed ne estis trovita grupo de Alessandri. Tial Roald Amundsen sindonema, ĉiam preta sin ĵeti en vojon, decidis serĉi la viktimojn. Li flugis per la franca aviadilo „Latam", akompanata de lia amiko Ditriĥsen kaj francaj aviadistoj: Gilbo, Vallet, Brazi kaj De-Kuvervil.
18. 6. ili forflugis kaj ne revenis. Ses semajnojn daŭris serĉado. Senrezulte. Ili pereis. Kiel tio okazis? Neniu scias... Pri Amundsen, la fama esploristo de arktaj landoj, kiu unue atingis la Sudan Poluson, lia eminenta sampatriano Fritjof Nansen diris: „En li vivis ia eksplodema forto. Sur la nebula firmamento de norvega popolo li ascendis per radianta stelo". Kaj ni aldonu: malĝoja pereo de Amundsen, sed per heroa morto finiĝis lia bela vivo!

Omaĝe al Roald Amundsen en nekonatecon...

El nord' kirloventa,
al homoj de l'mond'
alvenis alarmo fatala:
rompiĝis, pereis
balono de Nobilé –
febla fragila „Italia"...

La ŝipoj eŭropaj
kaj aviadiloj
sin ĵetis, por savi viktimojn.
Norvego kaj svedo
kaj ruso al „SOS"*)
revokis kaj savis „l'animojn".

Nebule kaŝitaj
en neĝo, en mar'
foriĝis por ĉiam detaloj
de la eksplodinta
sur la glaciar'
legenda kaj trista „Italia"...

Sed restis – ho ve! –
netrovita grupet',
kaptita de ŝtormo en foro...
Sciante pri tio
la hom' de l'impet'
revokis per nobla koro!

Kaj Amundsen flugis
sur franca „Latam",
por savi kolegojn ĉi-foje.
Sed baldaŭ la mondon
konsternis la fam':
„Latam" malaperis survoje...

– Kio estis al vi?!
– „Latam"! „Latam"!
Demandis la ter' emocia...
Sed en oceano
radio-gam'
ekĉesis pro spasmo glacia...

Pereis plej brava
heroo de l'arkto,
natur-esploristo genia.
Norvegoj plorpetis:
„Ho, serĉu Roaldon!
Ho, savu Roaldon nian!"

Sed mutis nebulo.
Nenia respond'.
La arkta dezerto silentis.
La mevoj forflugis
al la horizont'.
Kaj ŝajnis – ne kriis – lamentis...

Venkinto de l'vasto,
de l'Suda Polus',
la homo de vol' de kuraĝo!
Vin logis arkano
de nekonatec',
vin vokis eventa vojaĝo.

Teruraj obstakloj
kaj baroj sen fin',
tempest-karuselo senĉesa,
sed por vi Poluso
ja kvazaŭ destin' –
tiranta, amata, impresa.


Vi flugis el kara,
el blua fjord'!
kaj plu ne revenis al domo...
Nun restis post homo
nur la rememor',
monumento kaj monda renomo.

Se kredi legendon –
la blanka mev' –
anim' de marist' pereinta...
Ho, kiom da mevoj
en la ocean!!!
Gloron al homo sinoferinta!

Moskva, 26. 3. 78

x) „SOS" – „Save our souls" – „Savu niajn animojn" – radio-signalo de malfeliĉego. Antaŭ ĉiuj la signalon de „Italia" akceptis en Arĥangelsk radio-amatoro Ŝmidt.

ERNEST MILLER HEMINGWAY (1899-1961)



Antaŭ 80 jaroj, la 21an de julio 1899, naskiĝis en Oak Park, proksime de Chikago (Usono), Ernest Miller Hemingway, laŭ publika opinio unu el la plej enigmaj, misteraj kaj eminentaj verkistoj de nia jarcento. Jam dum lia vivtempo kelkaj personigis lin kun la interesaj, aventuremaj homoj de liaj rakontoj kaj ekvidis en li heroon kaj naturknabon. Aliaj opinias lin fanfaronulo, kiu nepre ne similis al tiuj fortaj, tute naturaj agantoj, kiujn ofte li priskribis en siaj verkoj.

Ne estas nia tasko juĝi pri ĉi tiu kontestata eminentulo, kiu ankoraŭ hodiaŭ, postmorte, prezentas enigmojn al siaj biografoj. Estas verŝajne, ke partiecaj malamo kaj favoro konfuzas lian veran karakterbildon. Eĉ pri lia morto, la 2an de julio 1961, oni enigmas; ĉu estis akcidento, ĉu sinmortigo.

Estu, kiel ajn! Fakto restas, ke Hemingway estas unu el la plej mondfamaj verkistoj, kies libro-eldonoj ĉiam estas elĉerpataj, ankoraŭ nuntempe.

Se ankaŭ valoro kaj kvalito de liaj verkoj diferencas, ĉiuj ili montras esence humanisman sintenon.

Li estis Nobel-premiito, pasigis siajn lastajn jarojn en Kubo kaj konfesis sin esti samideano de la revolucio de la 1959a jaro. En aprilo 1938, en Barcelona, li skribis la sekvan rakonteton, instigite de la tiamaj eventoj en Hispanio.

ERNEST HEMINGWAY

Multjarulo ĉe ponto

(Tradukita el: „Taschenbibliothek der Weltliteratur: Ernest Hemingway „49 stories" Band 1 – Aufbau Verlag 1977)

Maljuna viro kun ŝtalkadritaj okulvitroj kaj polvegaj vestaĵoj sidis ĉe la rando de la strato. Pontono-ponto transkondukis la riveron kaj ĉaroj kaj kamionoj kaj viroj, virinoj kaj infanoj transiris ĝin. Muloĉaroj suprenŝanceliĝis sur la krutan borddeklivon malantaŭ la ponto kaj soldatoj helpis kaj apogis sin ŝovante kontraŭ la radradioj. La kamionoj penige klopodis por alveni al ĉio kaj la kamparanoj piedbatis en la polvo profunda ĝis maleoloj. Sed la maljuna viro sidis tie senmove. Li estis tro laca por antaŭeniri.

Mi estis komisiita transiri la ponton, esplori la pontokapon kaj konstati, kiun punkton la malamiko estis atinginta. Tion mi estis farinta kaj revenis trans la ponton. Tie nun ne estis tiel multe da ĉaroj kaj ankoraŭ nur malmulte da piedirantaj homoj, sed la maljuna viro ankoraŭ estis tie.

– „De kie vi venas" – mi demandis lin
– „El San Carlo" – li diris kaj ridetis.

Estis lia hejmloko kaj pro tio faris ĝojon al li, mencii ĝin kaj li ridetis.

– „Mi estas paŝtinta bestojn –" li klarigis.
– „Bone" – mi diris kaj ne tute komprenis.
– „Jes" – diris li – „sciu, mi postrestis por paŝti la bestojn. mi estis la lasta, kiu forlasis la urbon San Carlo". –

Li aspektis nek kiel ŝafisto, nek kiel bovopaŝtisto kaj mi atente rigardis liajn polvajn nigrajn aĵojn kaj lian grizan polvan vizaĝon kaj liajn ŝtalkadritajn okulvitrojn kaj mi diris:

– „Kiaj bestoj estis?" –
– „Diversspecaj" – li klarigis kaj kapskuis – „Mi devis postlasi ilin". –

Mi observis la ponton kaj la afrikaspektan landon de la Ebro-delto kaj estis scivola, kiel longe daŭrus ankoraŭ, ĝis ni ekvidus la malamikon kaj dum la tuta tempo mi aŭskultis la unuajn bruojn, kiuj ĉiam denove anoncas la misteran okazaĵon, kiun oni nomas „havi kontakton" kaj la viro ankoraŭ sidis tie.

– „Pri kiuj bestoj temis?" – mi demandis.
– „Sume pri tri bestoj" – li klarigis – „Estis du kaproj kaj unu kato, krome kvar paroj da kolomboj". –
– „Kaj vi devis postlasi ilin?" – mi demandis.
– „Jes, pro la artilerio. La kapitano ordonis al mi foriri pro la artilerio". –
– „Kaj ĉu vi ne havas familion?" – mi demandis, observante la transan ekstremaĵon de la ponto, kie kelkaj lastaj ĉaroj rapidegis malsupren de la borddeklivo.
– „Ne" – li diris – „nur ĉi tiujn bestojn mi havas, kiujn mi nomis. Kompreneble al la kato okazos nenio. Kato povas zorgi pri si mem, sed mi ne povas imagi, kio fariĝos kun la aliaj". –
– „Kaj via politika starpunkto?" – mi demandis.
– „Mi ne estas politika" – li diris – „mi havas 76 jarojn, nun mi estas irinta 12 kilometrojn kaj mi kredas, ke nun mi plu ne povas iri". –
– „Ĉi tie ne estas bona loko por resti" – mi diris – „se vi povus fari tion, tie supre, kie debranĉiĝas la strato al Tortosa, tie estas kamionoj." –
– „Mi volas atendi iomete" – li diris – „kaj poste mi iros. Kien la kamionoj veturas?" –
– „Direkto al Barcelona" – mi diris al li.
– „En tiu direkto mi konas neniun" – li diris – „sed mi tre dankas. Ankoraŭfoje tre belan dankon!" –

Li rigardis min tute senesprime kaj lace, tiam li diris por partoprenigi iun al sia doloro: „Al la kato ne okazos io, tion mi scias, por la kato oni ne bezonas zorgi. Sed la aliaj. Kion vi opinias pri la aliaj?" –

– „Nu, verŝajne ili trasuferos ĉion." –
– „Ĉu vi opinias tion?" –
– „Kial ne?" – mi diris kaj observis la transan bordon, kie ĉaroj ne plu troviĝis.
– „Sed kion ili faros dum artileripafado, ĉar oni ordonis al mi foriri pro la artilerio?" –
– „Ĉu vi lasis malfermita la kolombejon?" –
– „Jes" –
– „Tiam ili forflugos". –
– „Jes, certe ili forflugos. Sed la aliaj? Estas pli bone ne mediti pri la aliaj" – li diris.
– „Se vi estas ripozinta, tiam vi iru!" – Mi urĝigis lin – Ekstaru, kaj provu iri!" –
– „Dankon" – li diris kaj ekstaris, ŝanceliĝis tien kaj reen kaj tiam li sidiĝis malantaŭen en la polvon.
– „Mi estas paŝtinta bestojn" – li diris monotone, sed ne plu al mi – „Mi nur estas paŝtinta bestojn". –

Oni ne povis fari ion kun li. Estis Paska Dimanĉo, kaj la faŝistoj ŝoviĝis antaŭen kontraŭ Ebro. Estis griza, malhela tago kun profunde pendaj nuboj, pro tio iliaj aviadiloj ne estis en libera aero. Tio, kaj la fakto, ke katoj povas zorgi pri si mem, tio estis la tuta feliĉo, kion la maljunulo iam ajn havus.

trad. H. Buth
Foto: Zentralbild

William Gilbert

Esperanto kontraŭ naciaj lingvoj?

Ni ne devas kaŝi al ni ke Esperanto kaj la ideo mem de L. I. en nia epoko kolizias kontraŭ fortega muro de skeptikeco, en mondo kiu fariĝis pli pragmata kaj kies politika kaj kultura nivelo plialtiĝis. Ĝuste tiuj homoj, kiuj komencas havi internaciajn rilatojn kaj bezonus lingvon internacian, kontentiĝas per kelkaj nocioj de angla aŭ germana, ktp... aŭ konsideras ke ili povas lerni unu aŭ du fremdajn lingvojn, kaj ke tio sufiĉos. Al ili Esperanto aspektas kiel infaneca kaj utopia ludilo, se ili aŭdis pri ĝi, kaj estas evidente ke se oni vizitas Brition estas preferinde paroli la anglan... Se malgraŭ tio milionoj da homoj restas favoraj al la lingvo internacia, en ĉiuj popoltavoloj sed precipe, se mi ne eraras, ĉe laboruloj, tio restas pia deziro sen granda efiko por la progreso de Esperanto.

Al tio aldoniĝas certa ostracismo pro diversaj kaŭzoj kaj pretekstoj, kiujn mi ne volas analizi ĉi tie, kaj la konvinko ke studado de unu aŭ du naciaj lingvoj povas esti eventuale utila profesie, dum Esperanto restas la afero de revemuloj...

Kion fari en tiaj kondiĉoj? En MEM ni instigas la esperantistojn agi flanke aŭ interne de la organizoj: partioj, sindikatoj, movadoj, asocioj, kiuj konkrete batalas por la paco. Tio certe jam donis al nia movado certan prestiĝon kaj sekve estas objektive utila al plua disvastiĝo de Esperanto. Sendube la rezulto ankoraŭ ne estas spektinda, kaj ni ne estas la solaj homoj kiuj fakte laboras por la estonto. *Sed necesas demandi: ĉu ni defendas la pacon esence por plifaciligi la disvastiĝon de Esperanto?* Tiu, kiu serioze opinias tiel, ne estus vera pacbatalanto! Ni alportas nian modestan ŝtonon al la klopodoj de milionoj kaj milionoj da homoj tra la tuta mondo, por ke malaperu militoj el nia terglobo, *ĉar tio estas nia devo, kaj nur pro tio!*

Ni uzas Esperanton por helpi al tiu celo, al pli bona kompreno inter la popoloj, ne ĉar ĝi estus la sola aŭ eĉ la esenca ilo, sed ĉar ĝi estas *suplementa* ilo en la pac-batalo.

Kaj se tio rezultigas sukcesojn por nia lingvo, ni ĝojos kaj fieros pri tio, *sed kiel malgrandanima estus nia sinteno se ni fakte intencus esence utiligi la pac-batalon por Esperanto, dum tute male ni devas esence utiligi Esperanton por la pacbatalo!*

Tio dirita, ni estas esperantistoj, kiuj volas kompreneble disvastigi Esperanton. Samkiel Di-kredanto kaj ateisto defendas respektive sian kredon kaj sian filozofion. Kaj kvankam mi ne volus aspekti kiel nura kritikanto (mi klinas la kapon antaŭ la sindonemo de multegaj esperantistoj) ŝajnas al mi necesa diri ke, miaopinie, iuj aspektoj de la esperantista propagando turnas la dorson al la nuntempa realo kaj riskas havi negativan rezulton.

Mi pensas notinde pri la tendenco sisteme oponi Esperanton al la naciaj lingvoj, kvazaŭ oni volus kondamni la lernadon de tiuj lastaj. Ni vivas en epoko kiam la studado de fremdaj lingvoj ja estas realaĵo kiu respondas al certaj bezonoj de nia socio. Pli kaj pli da teknikistoj, ekzemple, devas nepre lerni la anglan aŭ la rusan aŭ alian lingvon, ĉar tio respondas al profesia neceso, ĉar ili laboros en alia lando, ktp... Kaj Esperanto tute ne kapablas, almenaŭ nuntempe, doni al ili la teknikan terminologion kiun ili bezonas aŭ la eblon komuniki kun la homoj de la elektita lando en maniero ĉiutaga, ĉiuhora kaj daŭra. Estus preferinde ekzameni serioze kaj detale la agad-kampon kaj de naciaj lingvoj kaj de Esperanto. Ankaŭ tie ĉi mi ne pretendas alporti solvojn. Simple ŝajnas al mi ke lernado de naciaj lingvoj ankaŭ havas siajn limojn, kiuj lasas al la L. I. tre vastan agadkampon, ke la internacia kaj la naciaj lingvoj fakte devus kompletigi unuj la aliajn, kaj pruvos tion la fakto, ke ne mankas poliglotoj kiuj lernis kaj praktikas Esperanton.

Tiuj ĉi kelkaj rimarkoj kondukas al la nuntempa kampanjo kontraŭ la „lingva imperiismo". Alia faco de la sama medalo. Ambaŭ facoj riskas sendube krei pli da misfido ol da simpatio ĉirkaŭ nia lingvo.

Fakte, antaŭ ol paroli pri lingva imperiismo, estus necese diri klare kion oni komprenas sub la vorto „imperiismo", kaj ankaŭ batali kontraŭ la imperiismo, ĉar la lingva problemo estas tute akcesora kompare kun ties sociaj, ekonomiaj, militaj misagoj. Tiam oni eble povos paroli pri „lingva imperiismo". Ekzemple pri tiuj koloniistaj potencoj, kiuj devigis la aŭtoktonojn paroli la metropolan lingvon kaj paralele malhelpis disvolviĝon de ilia kulturo, de ilia literaturo, eĉ kreon de skriba nacia lingvo... Sed ĉu la lernado de la rusa fare de Ukrajnanoj, kiel *dua* lingvo, ĉu la lernado de la angla, kiel *dua* lingvo, en francaj liceoj, estas kriterioj pri „lingva imperiismo"?

Jen problemo kiu ne devas lasi nian movadon indiferenta. Ĉu ne venis la tempo fiksi la pozicion?

Pacaktivulo 101, Sofia 1975

Kanto super lulilo (ok slovakaj aŭtoroj)

Eldonis ĉeĥoslovaka sekcio de MEM, Prago, 1976, 32 p.

Jen plia pruvo pri la idea riĉeco, per kiu niaj ĉeĥoslovakaj amikoj scipovas proksimigi al la tutmonda esperantistaro perlojn el sia nacia literaturo. Per sia nova, nepre rekomendinda eldonaĵo ili prezentas al ni verke kaj fote ok nuntempajn slovakajn verkistojn. La selekto, kvankam malgranda, tamen bone montras la variecon de temoj, la diversecon de stiloj kaj (dank' al la senriproĉa traduko fare de Magda Šaturova-Seppová, E. V. Tvarožek kaj Jiři Kořinek) la riĉecon de la lingvaĵo en la slovaka literatura kreado de la lasta duonjarcento. Troviĝas en la kajero kaj poemoj kaj prozaĵoj.

En la poemoj de Ludmila Podjarovinská (1872–1951) „Antaŭsento" kaj „En mia kor'" manifestiĝas la homeca varmo kaj sincereco de la unua slovaka virino-poetino, kiu por sia vivoverko estis proklamita Nacia artistino. La poemoj de Ján Smrek (1898, La knabino de la preseja maŝino) kaj de Laco Novomeský (1904–1976, Servistino) estas omaĝoj al virinoj peze laborantaj kaj tamen amindaj. Ján Kostra (1910–1975) sentigas en la poemo „Vizite post longaj jaroj" la melankolion de la maljunaĝo. La titoldona poemo „Kanto super lulilo" de Vojtech Mihálik (1926) impresas per klare progresemaj sinteno kaj eldiro.

La prozaĵoj de Josef Gregor Tajovský (1874–1940, Por aĉeti panon), Peter Jilemnický (1901–1949, La neplugita kampo – romanfragmento) kaj Ján Bodenek (1911, La blanka panjo de Ivĉjo – romanfragmento) distingiĝas per sociala aspekto kaj la klopodo priskribi la malfacilan vivon de la malsupraj tavoloj en la pasinta tempo kaj per tio kontribui al la plibonigo de la cirkonstancoj.

Entute la prezentita selekto vekas la deziron esti pli amplekse informita pri literaturo evidente riĉa kaj profunda. Havebla ĉe CLE.

D-ro Karl Schulze

Detlev Blanke

PRI LA „INTERNA IDEO" DE ESPERANTO

1. La problemo

Jam pli ol 90 jarojn ekzistas kaj evoluadas la internacia lingvo de L. L. Zamenhof. Pli kaj pli fortiĝanta movado klopodas disvastigi la lingvon kaj ĝin utiligi por plej diversaj celoj. La moderna Esperanto-movado troviĝas en fazo de adaptiĝo al la ŝanĝiĝanta monda situacio, kiu estas ĉefe karakterizata per la pligraviĝo en la tendenco-de la principoj de la paca kunekzistado kaj la scienc-teknika revolucio. Tiuj procesoj donas objektive pli kaj pli bonajn ŝancojn por sukcesa agado de la esperantistoj. Pro tio estas tute kompreneble, ke oni diskutas pri la *celoj* de la movado (ĉu nur disvastigi Esperanton aŭ ankaŭ sin engaĝi por aliaj celoj, kiel ekzemple kontraŭ lingva diskriminacio, rasismo, por la homaj rajtoj, aktive partopreni en la porpaca batalo ktp.), kaj pri la *vojoj kaj rimedoj* por atingi tiujn celojn. (Ĉu per amasa movado? Ĉu „de supre" helpe de politikistoj? Kian lokon havu la scienco? ktp.) Estas tute normale, ke en movadoj strebantaj al la realigo de idealoj, ekzistas diversaj kaj konfliktantaj idearoj, opinioj, vidpunktoj, despli, se temas pri movado havanta adeptojn en diverssociordaj landoj kun malsamaj ideologioj kaj filozofioj.

La internacia Esperanto-movado *en sia tuteco* ankaŭ strebas al la realigo de difinitaj idealoj.

Pro tio oni povas ĝenerale diri, ke ĉiu esperantisto, malgraŭ diversideologiaj konceptoj, adeptas minimume la idealon, ke unu lingvo fariĝu internacia kiel dua apud la gepatra, ke tiu estu planlingvo kaj ke ĝi, pro diversaj kaŭzoj, estu ĝuste la lingvo Esperanto iniciatita de L. L. Zamenhof.

Kvankam tiu menciita baza kaj sobra idealo estas ŝajne tute logika kaj konvinke motivigebla, oni scias el la spertoj, ke ĝi tamen estas malfacile realigebla en la tutmonda praktiko.

Krom tiu baza idealo de la internacia Esperanto-movado, ekzistas aro da pluaj idealoj pli malpli ligitaj al ĝi, kiuj ekde la tempoj de Zamenhof ĝis hodiaŭ havas fortan influon. Ni tion komprenos citante kelkajn demandojn kaj problemojn, kiuj ĉiam denove estas diskutataj:

1) *Kian rolon ludas la internacia lingva problemo ĉe internaciaj sociaj konfliktoj? (militoj, streĉitecoj ktp.) Kiomgrade internacia lingvo povus tute forigi aŭ mildigi tiujn konfliktojn? Kian etikon internacia lingvo havus por la tuthomara paco kaj progreso? Ĉu internacia lingvo principe kaj speciale Esperanto, povas certagrade interfratigi, solidarigi la homojn?*

2) *En kio konsistas la kaŭzoj de la*

speciala sukceso de Esperanto kompare al aliaj projektoj?
Ĉu nur temas pri lingvostrukturaj kaŭzoj? Aŭ ĉu ne la lingvo de Zamenhof mem disponas pri iu interna forto, iuj internaj celoj kaj ideoj, inspiritaj de Zamenhof mem, kiuj ĉiam denove entuziasmigis sennombrajn homojn, pelis ilin oferi kaj dediĉi siajn fortojn (eĉ karierojn kaj vivojn) por tiu Esperanto-movado?
Ĉu do Esperanto kiel lingvo havas ideologion tute specifan kaj propran nur al ĝi? Ĉu do la „interna ideo" de Esperanto ekzistas? Se jes, kio ĝi estas?
3) *Kaj sekve, ĉu la Esperanto-movado ankaŭ havas aŭ bezonas ideologion? Se jes, kian?*

Kiel ni vidas, la ĉefa problemo estas de lingvofilozofia karaktero: Ĉu lingvo havas propran filozofion, ideologion, animon, internan forton aŭ ne.
La reago je nur senpretenda malgranda diskuto de tiu problemo en „der esperantist" montris[1]), ke ĝi profunde tuŝas la esperantistojn, speciale homojn el la pli maljunaj generacioj, sed ne nur tiujn. La artikoleto sendube estis miskomprenebla kaj krome fuŝinterpretita, ĉu senkonscie aŭ malice. Do pli detala prezento necesas. Pro tio ni klopodas iom prilumi, se ankaŭ nur skize kaj ne elĉerpe, la motivojn pro kiuj homoj okupiĝas pri Esperanto, ni mencios kelkajn kaŭzojn por la sukceso de Esperanto, pritraktos la „internan ideon" ĉe Zamenhof kaj en la hodiaŭa vesto kaj rilatigos ĝin al modernaj lingvofilozofiaj konceptoj. Fine ni resumos nian propran opinion pri la demando, ĉu Esperanto havas ideologion aŭ ne, kaj klopodas montri, kio „io" do finfine nin, la esperantistojn, movigas, entuziasmigas kaj aktivigas.
Ĉi tiuj problemoj jen kaj jen estas tuŝitaj dise tra la Esperanta gazetaro. Superrigardaj studoj ankoraŭ mankas[2]). La sekva nur volas ekmovi la diskuton ne povante ĝin elĉerpi.

2. Motivoj por la okupiĝo pri Esperanto

Ankoraŭ mankas reprezenta enketo pri la motivoj, kiuj kondukis ĉe la unuopuloj al esperantistiĝo. Sed oni povas certe distingi tri grandajn motivo-grupojn. Ili ne havas saman signifon en la nuntempa movado kaj estis tute alie prijuĝendaj en la pasinteco. La rilatoj inter tiuj tri grupoj ŝanĝiĝis kaj daŭre ŝanĝiĝadas. Gravan rolon ludas la aĝo. Krom tio la distingo en tri grupoj estas pli de metodika valoro ol vere reala, ĉar en la praktiko ĉe la konkreta persono kompreneble efikadas samtempe diversaj motivoj el tiuj tri grupoj. Krome necesas substreki, ke ni deiras el la nuntempa movado.

1) Multajn homojn speciale allogis la praktikaj eblecoj partopreni pere de Esperanto en la internacia komunikado. Ili vidas en la planlingvo tre konvenan kaj taŭgan rimedon doni al siaj multaj interesoj internacian komponenton.
La komunikado en internacia skalo por multaj homoj signifas gravan *idean* kaj sekve *spiritan pliriĉigon* de iliaj personecoj, por ili malfermiĝis nova mondo. La edukaj kaj klerigaj valoroj de la praktika utiligado de Esperanto estas konsiderindaj kaj atendas sisteman kaj profundan priskribon.
Por tiuj homoj la problemo de la perspektivo de Esperanto ne estas nepre ĉiam unuaranga, ankaŭ ne nepre ilin interesas interlingvistikaj aspektoj de la monda lingvo-problemo. Esperanto ekzistas. La movado ofertas multajn agadeblecojn, do oni ekuzu la instrumenton! Ŝajne tiu *praktika aŭ pragmatika rilato al Esperanto* nuntempe kreskas, speciale inter la pli junaj generacioj. Tiu rilato al Esperanto estis la *ĉefa* (ne la sola) kondiĉo por tio, ke la Esperanto-movado entute progresis de Zamenhof ĝis hodiaŭ. Ĉu tiu aliro al Esperanto signifas mankon de idealismo, de entuziasmo?
Certe ne! Sin engaĝi por mirinde efika praktika instrumento de la internacia komunikado, kiu peras al sia uzanto multajn valorajn ekkonojn kaj emociajn travivaĵojn, tio ja postulas idealismon kaj entuziasmon.

2) Dua grupo ne unuavice vidas la praktikan instrumenton en Esperanto, sed la realigon de *longe konata idealo de la homaro;* la solvon de la internacia lingva problemo. Ni povas distingi du grupojn:

a) Iuj vidas en la funkcianta Esperanto la pruvon, ke *principe* planlingvo povas ofertiĝi kiel solvo. Ili vidas en Esperanto sufiĉan aŭ eĉ optimuman lingvon, sed ne nepre la sole eblan. Por ili Esperanto estas studenda ekzempligo de principa problemo. Gravas la principo kaj nur dualoke la konkretigo. Interlingvistoj, sciencistoj apartenas al tiu grupo. Tiu grupo havas *interlingvistikan*[3]) *rilaton al Esperanto.*
b) Aliaj identigas la principan solvon de la monda lingva problemo kun Esperanto. Nur Esperanto, pro plej diversaj kaŭzoj laŭ ili, nur ĝi kaj neniu alia planlingvo estos la internacia lingvo de la estonteco. Al tiu grupo apartenas multaj ardaj aktivuloj de la movado, nelacigeblaj propagandistoj. Tiu grupo havas *emociisman rilaton al Esperanto.* Ĉe la reprezentantoj de tiu dua grupo, diference al la unua, la praktika utiligado de Esperanto ne nepre dominas. Ili pli forte okupiĝas pri Esperanto kiel objekto de propagando. Ĉu oni povas diri, ke la anoj de grupo a) posedas malpli da entuziasmo kaj sindediĉo ol la grupo b)? Kiu scias kiom da sindediĉo postulas scienca laborado, tiu tion neniam asertus.

La problemo estas, kia sinteno por la daŭro alportos pli da sukceso en la ekstermovada mondo, tiu de la grupo a) aŭ tiu de grupo b).
Ŝajnas, ke la laŭleĝe kaj objektive kreskanta signifo de la scienco por la homa progreso lastatempe pli kaj pli videble favorigas la adeptojn de la grupo a).
Sed ni restu ankoraŭ iom ĉe la grupo b). La argumentado por Esperanto, por ĝia perspektivo, ofte estas portata de certa filozofio. La kaŭzoj de la internaciaj konfliktoj kaj militoj ne malofte estas prezentataj kiel kondiĉitaj ĉefe pro lingva diverseco, manko de internacia lingva kompreno. Unuigi la homaron plej bone povus, tiel oni argumentas, unusola komuna tuthomara lingvo (tiel ekzemple A. Lanti kaj SAT, kvankam kun malgranda influo en la movado) aŭ internacia dua lingvo apud la gepatra.
Tia argumentado por la perspektivo de Esperanto ofte renkontas skeptikismon, ne nur en sciencistaj rondoj sed ĝenerale. Kompreneble la idea fono, ĵus menciita, por multaj esperantistoj estas tre forta kaj vivodaŭra motoro, kiu movigas ilin labori senĉese por Esperanto. Kaj tio estas pozitiva fenomeno.

3) Lastatempe, ŝajne, pli kaj pli kristaliĝas plua grupo. Ekzistas homoj, speciale aŭ ekskluzive sciencistoj, kiuj en Esperanto tute ne unuaflanke serĉas praktikan instrumenton por internacia komunikado. Ili ofte eĉ skeptikas pri tio ĉu la mondo entute iam akceptos iun planlingvon, ĉu Esperanton ĉu alian. Sed ili pretas plene agnoski, ke planlingvo principe povas funkcii kaj ke Esperanto tre bone funkcias. Tiu fakto, ke homo konstruas lingvan skizon, kiun kolektivo pluevoluigas utiligante ĝin por komunikadaj celoj kaj ke tiu el projekto fariĝinta lingvo eĉ povas superi naciajn lingvojn en la internacia sfero de la komunikado, tiu fakto do estas por la menciitaj sciencistoj de plej alta intereso. La funkciado de Esperanto estas preskaŭ „jarcenta internacia lingvoscienca eksperimento",[4]) kiel substrekis Bokarjov kaj aliaj. El tiu eksperimento oni povas multon lerni por la ĝenerala lingvoscienco. En sia rilato al la planlingvoj dividiĝas lingvistikaj skoloj. Oni povas utiligi la planlingvon por tute ne movadaj celoj, nome ekz. kiel bazan lingvon por la fremdlingva instruado por atingi pli bonajn lernorezultojn en la alproprigo de naciaj lingvoj. Sciencistoj kiuj pro tio interesiĝas pri Esperanto havas *heŭristikan rilaton* al ĝi.

En la praktiko ĉe konkreta esperantisto samtempe efikadas diversaj motivoj. Tutcerte komune efikadas motivoj el la grupoj 1 + 2 kaj ofte sciencistoj el la 3a grupo forte interesiĝas pri la interlingvistika aspekto (2a).
Do la entuziasmo kaj la profundeco de la alligiteco al Esperanto ne nur estas motivigebla per la idealoj de interfratigado kaj interpacigado de la homaro per la tutmonda enkonduko de internacia planlingvo (2 b). Ja krome ekzistas pluaj tre gravaj motivoj, kiel ni povis montri, motivoj ne malpli entuziasmigaj.

3. Kaŭzoj por la relativa sukceso de Esperanto

Tre grave estus profunde esplori, kial ĝuste Esperanto estis tiu projekto, kiu fariĝis lingvo kaj malvenkigis ĉiujn aliajn projektojn. Por la celo de nia skizo sufiĉas mencii, ke la kaŭzoj de la sukceso de Esperanto estas a) lingvostrukturaj kaj b) eksterlingvaj.
Pri la lingvostrukturaj[5]) ni ĉi-tie ne traktos. Sufiĉas mencii, ke Esperanto eltenis la severan analizon de la lingvistoj kaj ke ĝiaj lingvaj ecoj en la praktiko plene pruviĝis sufiĉaj. Supozeble projektoj antaŭ Esperanto, da ili eble ekzistas kelkcent, kaj iuj post Esperanto el *lingvostrukturaj* vidpunktoj estas ne malpli bonaj ol Esperanto. La sukceso de Esperanto do sendube ankaŭ havas *eksterlingvajn* kaŭzojn, kiuj troviĝas en sociaj faktoroj.
Inter ili estas menciindaj jenaj:

1. La objektiva bezono al faciligita internacia komunikado flanke de la kapitalismo en Eŭropo fine de la 19a, komence de la 20a jarcento, certe bonvenigis la ideon de internacia lingvo. La malsukceso de Volapuko ne povis disbati la ideon. Sed tiu situacio principe validas por ĉiu-ajn pli malpli bone konstruita lingvo, do ne nur por Esperanto. Kaj konstrui lingvoprojekton estas multe pli facile ol ĝin enpraktigi.

2. Diference al Schleyer, la patro de Volapuko, Zamenhof bone komprenis la socian karakteron de la homa lingvo. Li sciis, ke ne li sole sed la tuta kolektivo de la uzantoj pluevoluigos la lingvon. Kaj tiel okazis.

3. Intuicie kompreninte la problemon de la normo kaj de la stabileco en lingvo, Zamenhof klopodis iniciati la kodigon, fiksigon kaj samtempe la evoluigon de la lingvo per tre postulemaj tradukoj kaj originalaj kreaĵoj. La ekzisto de tiu modelliteraturo, poste pli kaj pli kolektive kreita kaj kreata kaj la fiksigo (kodigo) de la „Fundamento de Esperanto" kiel netuŝebla sistemdokumento estis de eksterordinara graveco por la evoluo de samtempe pli kaj pli stabiliĝanta kaj fiksiĝanta lingvo. Tiun gravan problemon ĝis hodiaŭ komprenis nek la idistoj /Ido-anoj/ nek la naturalistoj, /Interlingue/-a/anoj/ kiuj kredis (ankoraŭ?) literaturon superflua. Se ili, eventuale, iom komprenis, jam estas tro malfrue returni la radon de la historio. Se la idistoj tuj estus kompreníntaj tiujn kaj la sekve menciotajn vidpunktojn, Ido povintus fariĝi eĉ multe pli serioza konkurinto de Esperanto ol ĝi fakte iam estis.

4. Esperanto estis rigardita kaj rigardata de la adeptoj kiel praktika instrumento tuj uzenda. Oni do ne arbitre kaj senĉese „pliperfektigis" la lingvon (kiel ĉe Ido) sed utiligis ĝin praktike, fidante al ĝiaj (feliĉe bonaj) kvalitoj. La movado ĝuste komprenis, ke nur la praktiko evoluigos kaj daŭre pliperfektigos la lingvon.

5. Gravan socian funkcion ankaŭ ludis la humanisma koncepto de Zamenhof, nome pacigi la mondon per unu komuna lingvo, interfratigi la homojn. Oni devas agnoski, ke la idea kunligiteco de la multaj unuaj esperantistoj al tiu „interna ideo" estis *de grava stabiliga etiko.* Kreiĝis la lingvoportanto („rondo familia"), antaŭkondiĉo por la uzateco kaj sekve de la evoluo de la lingvo.

Kvankam oni devas substreki la gravan signifon de la kunliga zamenhofa idealo por la kreado de firma kaj fidela lingvo-uzantaro kaj propagandistaro, precipe dum la unuaj 30 jaroj de la ekzisto de la lingvo, tamen tio ne estis la *sola* sed nur *unu el* la faktoroj, favorigantaj la sukceson de Esperanto.

4. La „interna ideo"

Ni ne senkaŭze montris, ke inter la motivoj por la lernado de Esperanto kaj la kaŭzoj por la sukceso de la planlingvo, gravan rolon ludis kaj ankoraŭ ludas lingvofilozofia sinteno de la uzantoj al la lingvo Esperanto mem, al ĝia socia rolo, al ĝia internacia efiko. Kiu estis la enhavo de tiu filozofia koncepto?

4.1. La koncepto de Zamenhof pri la „interna ideo"

E. Drezen[6]) klare montras en sia studo „Zamenhof" la historian socian medion, en kiu plenkreskis la iniciatinto de Esperanto kaj kiu influis lian koncepton pri la socia rolo de internacia lingvo.
Zamenhof mem skribis en sia letero pri la deveno de Esperanto al N. Borovko: „Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno (en Rusujo). Ĉi tiu loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj. Ĉiu el tiuj elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie impresiĝema naturo sentas la multpezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston: oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas; ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj ktp. Ĉi tio ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri ĉi tiu „doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos ĉi tiun malbonon.
Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉiu okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj."[7]) Zamenhof ne povis kompreni, ke la konfliktoj inter la nacioj en Bjalistoko estis sekvo de la carisma kolonia politiko. Por li la diverseco de la lingvoj estis la ĉefa kaŭzo de la malamo inter la nacioj. Forigi tiun malamon fariĝis lia vivcelo.
Kiel estas konate, Zamenhof antaŭvidis en sia filozofio *du* rimedojn por interpacigi la homaron: komuna lingvo kaj universala religio konata sub la nomoj „hilelismo" kaj „homaranismo"[8]).
La manko de komuna religio kaj lingvo estas laŭ la koncepto de Zamenhof la ĉefa kaŭzo por la konfliktoj sur la mondo.
Plej detale li prezentis tiun koncepton en sia memuaro „Gentoj kaj Lingvo Internacia", verkita por la kongreso de Rasoj 1911. Tie li skribas „La reciproka batalado inter la diversaj homaj rasoj kaj gentoj estas la plej granda malfeliĉo de la homaro . . . Kio estas la ĉefa, eble eĉ la *sola kaŭzo* de la malamo inter la gentoj?"[9]) Zamenhof citas diversajn eblajn kaŭzojn: „politikaj cirkonstancoj . . . konkurado ekonomia . . . malsameco de la geografiaj, klimataj kaj aliaj cirkonstancoj . . . ecoj de korpo . . . malsameco de la mensoj . . . malsameco de la deveno . . ."[10]) Sed ili ĉiuj ne estas la ĉefaj kaŭzoj por la malfeliĉo de la homaro.

„Kio do estas la vera kaŭzo de la intergenta diseco kaj malamo? El ĉio, kion mi supre montris, oni povas jam vidi, ke malgraŭ ĉiaj kvazaŭsciencaj teorioj pri rasaj apartaĵoj, klimatoj, hereda sango ktp. la veraj muroj inter la gentoj, la vera kaŭzo de ĉia intergenta malamo estas nur la malsameco de la lingvoj kaj religioj... *La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos en la homaro nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion.*"[11]) (elstarigo en la originalo – D. B.)

Kvankam Zamenhof sufiĉe skribis pri sia religia filozofio en la rusa kaj en Esperanto[12]), li tamen, i. a. pro forta kontraŭstaro de francaj ateismaj esperantistoj, ne klopodis ĝin altrudi al la movado.

Do restis plej forta en la movado precipe la lingvofilozofia flanko de lia ideologio, la koncepto pri la paciga rolo de internacia lingvo.

Jam en la Antaŭparolo al la „Unua Libro" li firmigis tiun vidpunkton:

„La diferenco de la lingvoj prezentas la *esencon* de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj, ĉar tio ĉi *antaŭ ĉio* falas en la okulojn ĉe renkonto de homoj: La homoj ne komprenas unu la alian kaj tial ili tenas sin fremde unu kontraŭ la alia"[13]) (elstarigo de mi – D. B.)

Sed eĉ kiel nacian, enŝtatan lingvon Zamenhof antaŭvidis sian neŭtralan lingvon. Li daŭrigas: „Kiu unu fojon provis loĝi en urbo, en kiu loĝas homoj de diversaj reciproke batalantaj nacioj, tiu eksentis sendube, kian grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, *ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj,* povus almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa."[14]) (elstarigo en la originalo – D. B.)

Cetere, estas interese konstati, ke tiu koncepto pluvivas eĉ ĝis hodiaŭ, nome en rondoj okupiĝantaj pri la minoritataj lingvoj. Dum la unua kongreso de Esperanto, 1905 en Bologne-sur-mer (Francio), Zamenhof aludis la idealon, kiu unuigis la kongresanojn:

„Mi salutas vin karaj samideanoj, ... kiuj kunvenis... por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de *granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.*"[15]) (elstarigoj miaj – D. B.)

Dum la sama parolado Zamenhof sin turnis al „tiu alta morala forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo" kaj prezentis „Preĝon sub la verda standardo", en kiu li denove firmigis la ideologian celon de la movado.

„Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
por reunuigi l'homaron.
Subtenu nin Forto, ne lasu nin fali,
sed lasu nin venki la baron";
...
...
„Ni inter popoloj la murojn detruos,
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos,
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
ekregos sur tero."[16])

Konkludo: Justa kaj amoplena estos la mondo post la detruo de la lingvaj baroj.

Same pure kaj klare ni trovas la idealon de Zamenhof en la himno de la Esperanto-movado, „La Espero": „En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko" (t.e. la mesaĝo de la internacia neŭtrala lingvo – D. B.), „al la mond' eterne militanta ĝi (la mesaĝo – D. B.) promesas sanktan harmonion. Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenanta unu la alian, la popolo faros en konsento unu grandan rondon familian..."[17]) Do la pacan homaron, la grandan rondon familian, oni kreos per la komuna lingvo.

Dum la II-a Universala Kongreso de Esperanto 1906 en Ĝenevo Zamenhof informis pri la teruraj pogromoj en Rusio, speciale ankaŭ en Bjalistoko kaj evidente jam rimarkis, ke la starigita celo estas sufiĉe malfacile atingebla: „Al vi kiel al esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas..."[18])

Ankaŭ ŝajne Zamenhof iom komprenis pri la ekzisto de diversaj fortoj en unu nacio (ni hodiaŭ parolas pri klasoj): „Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bjelostoko... oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado... Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj..."[19])

En la sama parolado Zamenhof kaj komprenas la tempan limigitecon, provizorecon de la ideologio, kiun li ligas al la Esperanto-movado, kaj samtempe difinas unuafoje la „internan ideon": „Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean, tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas *frateco kaj justeco inter* ĉiuj popoloj."[20])

Kaj dum la III-a Universala Kongreso 1907 en Cambridge ankoraŭ pli klare: „... tamen neniu povas dubi, ke ĉiujn, aŭ almenaŭ la grandegan plimulton de la personoj, kiuj batalas por Esperanto, ligas unu komuna ideo, kiu estas la tuta stimulo de ilia laborado... En Esperantujo regas ne sola lingvo Esperanto, sed ankaŭ la interna ideo de la esperantismo...

La devizo de la ideaj esperantistoj, neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata estas: „Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn."[21])

Do denove, neŭtrala lingva fundamento sufiĉas por paca kaj frata interkomunikiĝado de la gentoj.

Ni iom pli detale citis Zamenhof, por pli klare montri lian koncepton pri la „interna ideo" kaj pro tio, ke multaj, precipe pli junaj esperantistoj ne ĉiam havas aliron al liaj verkoj. Ĉiu humanisto nepre subtenos la progresemajn idealojn de Zamenhof pri justeco, paco kaj frateco inter la homoj kaj popoloj. Sed kiel oni facile konsentos, tiuj idealoj tute ne estas elpensitaj de Zamenhof sed apartenas al la miljara strebado de la plej progresemaj fortoj de la homaro. Kaj tre diversaj estis kaj ankoraŭ estas la imagoj de la homaro, kielmaniere realigi tiujn idealojn. La idealo de tutmonda justa kaj paca ordo, en kiu la homoj povas loĝi sen ekspluato kaj diskriminacioj, tiu idealo por multaj estas la *komunismo.*

Ni devas plue substreki, ke ne nur Zamenhof ligis la menciitajn idealojn kun la koncepto de internacia lingvo.

Tre konvinke Árpád Ratkaj montris, ke „la t.n. ‚interna ideo', kiu estas konata kiel tute speciala esperantaĵo, fakte estiĝis ankaŭ kiel volapukaĵo."[22])

Certe oni povas eĉ hipotezi, ke ĝi ne nepre nur estiĝis kiel volapukaĵo sed eble estis pli aŭ malpli trovebla ankaŭ en multaj aliaj filozofiaj motivigoj de la projektokonstruado, jam antaŭ Volapuko. Tion oni devus esplori.

4.2. La „interna ideo" hodiaŭ

Unu el la plej estaraj kaj influhavaj gvidantoj de la internacia Esperanto-movado post la dua mondmilito sendube estis profesoro Ivo Lapenna. En liaj konceptoj oni retrovas la malnovan zamenhofan ideologion en pli moderna vesto.

Ni retrovas la koncepton, ke la ĉefa obstaklo al vera tutmonda humanismo, kiun oni devas venki, estas la multlingveco, la lingvaj baroj, Lapenna 1960 diris:

„Rompante la lingvajn barojn kaj kreante samtempe sentojn tuthomajn kaj pensmanieron mondan, ni detruas la *ĉefan obstaklon* al la venko de humanisma internaciismo, kiu sola povas ne nur savi la homaron, sed ankaŭ doni al ĝi en la plej baldaŭa estonteco vivĝojon kaj feliĉon neniam spertitajn ĝis nun."[23]) (elstarigo mia – D. B.)

La sola rimedo por forigi tiun *ĉefan obstaklon* estas Esperanto, kiu disponas pri iuj misteraj internaj sendoj aŭ for-

toj kaj kiuj sentiĝas en la movado, dum kongresoj ktp. Pri tiuj sentoj Lapenna jam 1952 klarigis „Temas pri tiuj sentoj, kiuj inspiras nian tutan agadon kaj kiuj faras, ke miloj da personoj tra la tuta mondo sindone kaj ofereme dediĉas sian liberan tempon, sian energion, sian intelektan forton al la laboro por la granda kaj nobla afero de la Internacia Lingvo. Temas pri tio, kion iuj nomas „interna ideo", aliaj „interna sento", dum mi mem pli ŝatas paroli pri la „solidariga rolo" de la Internacia Lingvo. Tute egale kiel oni ĝin nomas, temas pri tiu „io", kiu faras, ke nia lingvo ne estas nura teknika rimedo de komunikado internacia, sed, krome, ankaŭ potenca instrumento de internacia frateco."[24])

En „Esperanto en Perspektivo" Lapenna 1974 pliprecizigas, ke tiu solidariga funkcio estas „spontana, aŭtomata aŭ memefika".[25]) La idealoj cititaj de Lapenna jam 1950 „ke devas malaperi ĉiu ajn formo de subpremado aŭ de superregado de unu popolo super la alia, ke devas malaperi ĉiuj privilegioj bazitaj sur rasa, nacia, lingva aŭ religia apartenoj"[26]) estas nenio alia ol la malnovaj humanismaj idealoj de la progresema homaro, plene realigeblaj nur sub socialismaj kaj komunismaj kondiĉoj. Do ne havas sencon ilin prezenti kvazaŭ inventaĵo de la esperantismo. Tiuj idealoj, laŭ Lapenna, formos la „veran universalismon, kies konsistigaj partoj estas egaleco de ĉiuj homoj, spirita libereco, socia justeco kaj interpopola paco"[27]). Akceptebla por ĉiu homo, kompreneble. Sed, kaj jen la problemo, tiun pensmanieron, oni asertas, *kreas* Esperanto, nome „tiun ĉi vere *revolucian ŝanĝiĝon* en la pensomaniero kaj sentado, kiujn *kreas la Internacia Lingvo*, tiun ĉi transformiĝon de mallarĝe nacia konceptado al universale homa konceptado, *kaŭzitan de la Internacia Lingvo* . . ."[28]) (elstarigoj miaj – D. B.)

Do, la novan pensmanieron, la revolucion en la menso, la novan homon, por kiu luktas jardekojn la socialisma socio, ĉion ĉi bele kaj „aŭtomate" kreas lingvo, nome Esperanto.

Kvankam tiu studo ne celas analizi SAT, sennaciismon ktp., ni menciu, ke ankaŭ el la direkto de la Lantia „sennaciismo" oni asertas pri la mensonŝanĝa efiko de Esperanto. En 1977 N. Bartelmes, unu el la elstaraj personecoj de SAT, ekzemple skribas: „Nu, por tiu, kiu scipovas kaj aplikas Esperanton, la respondo (je demando kial okupiĝi pri sennaciismo – D. B.) estas klara. Vole nevole la konstanta uzado de Lingvo Internacia, pli bone dirite, sennacieca lingvo, efikas profunde sur la homan menson, desinfektante ĝin de la naciismaj mikroboj. Ne necesas esti ĝisosta adepto de Lantiismo, por per simpla pripenso ekkoni tiun realon: Esperanto sennaciigas sur la kultura kampo" . . .[29]) Tiel simpla estas la afero . . .

Do, la lingvo kvazaŭ el si mem kreas la ideojn kaj idealojn. Ni nun demandu, de kie venas tiu interna forto de Esperanto?

La respondo de Lapenna (1956): Zamenhof ĝin inspiris en la lingvon: „Aliflanke, estas ankaŭ sendube, ke precize la intergenta malamo, reganta en la urbo Bjalistok, inspiris la junan Zamenhof serĉi solvon per kreo de lingvo komune homa. *Parton de sia nobla kaj granda animo la aŭtoro enspiris en sian verkon.*" (elstarigo mia – D. B.)[30])

Kaj 1959: „Zamenhof inspiris en la lingvon la ideon de egaleco de ĉiuj nacioj, de internacia frateco inter la popoloj. Tiu idea fono restis la spirita bazo de la lingvo mem."[31])

Por Lapenna, kiel ni legas en „Esperanto en Perspektivo", p. 41/42, la „interna ideo" de Zamenhof identas kun la koncepto de „humaneca internaciismo". „Ĝi donis al la Internacia Lingvo koron kaj animon."

Do, Zamenhof inspiris animon en la lingvon. Kaj koron la lingvo ankaŭ jam havas. Sed ne sufiĉas la mistikismo.

1957 Lapenna deklaras, ke „Esperanto konkretigas la ideon de *plej nobla* humanismo kaj de *vera* internaciismo" (elstarigoj miaj – D. B.)[32]) – kaj sekve, kiel ni legas en „Esperanto en Perspektivo", p. 42, Esperanto „estis, ekde sia naskiĝo, la *plej pura esprimo* de vivanta sento de aparteno al la homaro." (elstarigo mia – D. B.)

Por eviti miskomprenojn, ni denove substreku, ke la cititaj idealoj de Zamenhof kaj la menciitaj de Lapenna kiel frateco, justeco inter la homoj, paco, manko de diskriminacio ktp. estas tro gravaj, eĉ esencaj idealoj, kiujn realigi ĉiu homo devus alstrebi. Kompreneble la enhavo de la nocioj frateco, justeco ktp. ĉe la homoj depende de iliaj ideologioj ofte malsamas.

La problemo estas tamen en tio, ĉu la *lingvo* Esperanto enhavas en si mem, aŭ disponas pri iu interna forto, kiu pelas la adeptojn antaŭen por realigadi tiujn cititajn idealojn. Kaj due, ĉu la enkonduko de internacia lingvo estas la *ĉefa* vojo por atingi tiun menciitan novan pacan kaj humanisman mondon? Ni citis abunde Zamenhof kaj Lapenna pro la fakto, ke ĝis hodiaŭ multaj esperantistoj kredas, ke ilia entuziasma sindediĉo kaj oferema agado por la disvastigo de Esperanto elvenas ĝuste kaj precipe el tiu mistera interna forto enestanta en Esperanto kaj enspirita en ĝin de Zamenhof. Kaj krome, ĝis hodiaŭ multaj esperantistoj vidas en la lingvaj barieroj la ĉefan kaŭzon por la internaciaj konfliktoj. Tiuj konceptoj (la „interna ideo") devenantaj de Zamenhof, estis sisteme kultivitaj, kiel ni povis montri, en la postmilita movado per unu el la plej prestiĝaj gvidantoj, Ivo Lapenna. Ni demandu nin, ĉu la koncepto de la „interna ideo" rezistas al sobraj analizoj. Ni esploru, ĉu ĝi trovos lokon en la nuntempa rigardo.

5. Kritiko de la „interna ideo"

Ni tuj konstatu: La koncepto de la „interna ideo", kiel ni resume nomas la prezentitan idearon de Zamenhof kaj la novevestitan de Lapenna, ne estas akordigebla kun sobra rezonado. Ĝi estas plene idealisma (laŭ filozofio) mistikisma kaj nebula. Ekzistas tre stranga situacio: Diskutante kun kontraŭuloj de Esperanto, kaj inter ili ofte estas lingvistoj, ni kritikas la mistikajn konceptojn pri „nacia animo" kiu laŭdire esprimiĝas en ĉiu nacia lingvo kaj kiun malhavas la morte naskita artefarita lingvo ktp. Ni kritikas la superstiĉon pri „pulsanta vivo" de naciaj lingvoj, „miljaraj tradicioj" de la popolo, kiuj enkorpiĝas en la nacia lingvo kaj sekve en nacilingvaj verkoj, kiujn redoni en ekvivalenta traduko la nur kelkjardekojn aĝa artefarita lingvo Esperanto laŭ dire ne sukcesos.

Ni postulas de la scienco kaj ekstera mondo objektivan kaj sobran aliron al Esperanto. Sed kritikante nebulajn kaj nesciencajn nociojn kaj asertojn ĉe kontraŭuloj de Esperanto respektive skeptikuloj, ni samtempe trovas en la movado ne malpli nebulajn kaj malklarajn nociojn kiel *tuthoma sento, monda pensmaniero, solidariga funkcio, vera universalismo* (kio estas malvera universalismo?), *universale homa konceptado, humaneca internaciismo* (ĉu ekzistas malhumaneca internaciismo?), vivanta *sento de la aparteno al la homaro* (kio estas „la homaro"??) ktp.

Eble oni povus diri, ke tio estas metaforoj, uzataj en movada medio? Sed ĉu la internacia Esperanto-movado povas permesi al si la lukson luktante por scienca agnosko en la ekstera mondo samtempe mistikismi inter siaj membroj?

Ĝi ne povas permesi al si tiun lukson! Inter alie pro tio, ĉar la koncepto de la „interna ideo"

a) baras la ekkonon al la veraj kaŭzoj de la interhomaj kaj interpopolaj konfliktoj, militoj ktp. kaj sekve malfaciligas la forigon de tiuj kaŭzoj kaj malfaciligas pro tio vere fruktodonan agadon por la humanismaj idealoj de Zamenhof

b) malfaciligas en la moderna mondo vere efikan argumentadon por la internacia lingvo Esperanto.

c) ŝajnigas la adeptojn de Esperanto mistikuloj, sektanoj.

La ĉefaj malĝustaj teorioj esprimitaj en la koncepto de la „interna ideo" estas:

1) La ĉefa kaŭzo por la interpopolaj malamo kaj konfliktoj estas la lingva

diverseco (pri la religia diverseco ni jam ne parolas).
Do per ŝanĝo de la internacia lingva situacio (enkonduko de internacia lingvo) ni forigos la kaŭzojn de tiuj konfliktoj, precipe pro tio, ĉar la lingvo revoluciigas la mensojn de la homoj ktp., kiel montrite.

2) Esperanto solidarigas la homojn!

3) Esperanto kiel lingvo mem estas esprimo de difinita ideologio aŭ havas en si iun ideologion (forton, internan koncepton).

5.1. La ĉefaj kaŭzoj por interpopolaj konfliktoj – la lingvaj baroj?

Rigardo de pasinta kaj nuntempa internacia politika vivo klare montras, ke ne primare la lingva diverseco kaŭzas militajn konfliktojn. La ekzisto de diversaj sociaj klasoj, iliaj malsamaj rilatoj al la produktiloj, la antagonistaj (nesolveblaj) kontraŭdiroj inter tiuj klasoj, ili kreas la sociajn konfliktojn (= klasbatalo). Kiel estas konate, kontraŭdiroj inter imperiismaj fortoj, stimulitaj per profitemo kaj ekspansiemo (= agresemo) kondukis al la unua kaj dua mondmilitoj. La *ĉefa* kontraŭdiro nuntempe reganta en la mondo estas tiu inter la agresemaj militemaj fortoj de la imperiismo (ankaŭ de la ĉina) kaj tiuj de la socialismo kaj aliaj pacemaj fortoj. Malgraŭ komuna lingvo, okazis civila milito en Vjetnamio, kaj ekzistas germanlingvaj kaj korelingvaj ŝtatoj kun malsamaj socisistemoj. Kaj malgraŭ komuna lingvo eĉ samlingvanoj ne komprenas unu la alian en ideologia senco.
Nekompreno de la veraj movofortoj de la homa socio kaj la malĝusta kulpigo de la lingvaj baroj por la konfliktoj objektive signifas fortigon de la konfliktigaj faktoroj.
Krome la malĝusta imago, ke Esperanto el si mem pro siaj ecoj estas pacigilo, kondukas inter la adeptoj de la lingvo al *pasiveco* rilate al la urĝaj mondaj problemoj kiel batalo por la paco, sekureco, malstreĉigo kaj malarmado.
Al la lingvo oni atribuas iun funkcion, kiun ĝi ne havas. La lingvo *ne kreas sociajn strukturojn* sed tion faras i.a. la manieroj de la produktado, konsumado, varcirkulado kaj la proprieto je produktiloj. *Sed kompreneble la lingvo ja havas influon je sociaj strukturoj.* Tion oni ne povas nei.
La supertakso de la lingvo por sociaj ŝanĝoj estas trovebla en diversaj modernaj teorioj ankaŭ en tiu de la ĝenerala semantiko (general semantics) de S. I. Havakawa, A. Korzybski k.a.[33]). Laŭ tiu koncepto la sociaj konfliktoj baziĝas je neklara fikso de la signifo de la vortoj respektive la malsama uzado de samaj vortoj: Oni do devus pliprecizigi la signifon de la vortoj, pliĝustigi la uzadon de la lingvo kaj tiel evitus multajn konfliktojn. Ni ne neas ke miskomprenoj lingvaj povas rezultigi konfliktojn. Sed General semantics absolutigas tiun koncepton. Kaj la absolutigo fariĝas malvero.
Estas evidente, ke sociaj movadoj luktantaj por similaj idealoj, kiel ili estis esprimitaj de Zamenhof (paco, justeco inter la homoj), kaj kiuj eventuale povus utiligi Esperanton por siaj internaciaj kontaktoj, reagos tre skeptike aŭ eĉ ne prenas seriozaj la propagandistojn de Esperanto, se ili reduktas la konfliktokaŭzojn ĉefe je la lingvaj fenomenoj.
Tamen, por eviti miskomprenon, ni denove konfirmu, ke ni ne povas kaj ne volas aserti, ke lingvaj baroj ne ekzistas. Kompreneble kaj sendube la lingva diverseco estas *grava malhelpo por la homa progreso.*
Se Marks kaj Engels alvokis „Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!", tiu unuiĝo ja estus multe plifaciligita per internacia lingvo. La internacia laborista sindikata movado, la monda pacmovado kompreneble povus multobligi siajn fortojn per internacia lingvo. Daŭre pliakriĝas la kontraŭdiro inter *bezono* je internaciaj kontaktoj sur unu flanko, kiu forte kreskas kaj la *ebleco* je realigo de tiuj kontaktoj, ĉar ne malmultiĝas la gravaj lingvoj por tiuj internaciaj kontaktoj sed inverse. Sed la lingva problemo estas *unu* el multaj solvendaj de la homaro. Tion oni devas vidi.

5.2. La solidariga kaj malsolidariga funkcioj

Substrekante la solidarigan funkcion de Esperanto oni nur mencias ion, kion povas havi ĉiu ajn lingvo. Se homoj trovas komunan interkomprenilon, ili sekve povas rekte interŝanĝi ideojn, interkompreniĝi. Precipe en fremdlingva ĉirkaŭo, kie ne komprenante la uzatajn lingvojn oni sentas iun izoliĝon kaj senhelpecon estas rimarkebla tiu funkcio. Trovante homon en tiu medio kun kiu eblas interparoli, unuamomente oni sin sentas certagrade solidare ligita al li. Sed ... ni supozas, ke temas pri paca medio! En alia medio estas aliaj efikoj: Militkaptito ekzemple, kiu estas komprenata *lingve* de sia kaptinto kaj povas kun tiu interparoli, certe ne trovos solidarajn sentojn al tiu alia malamiko, parolanta sian lingvon.
La ebleco interkompreniĝi ĝenerale estas pozitiva fenomeno, karakterizilo de la homa estaĵo. Nur tiu kapablo ne ĉiam solidarigas! Ofte nur la ebleco lingve komunikadi kun difinita persono ebligas ekkoni ties vivfilozofion, ties opiniojn kaj politikajn konceptojn. Dum la komunikado do povas okazi, ke ĉe la partnero montriĝas konceptoj rekte kontraŭaj al tiuj de la interparolanto. Eĉ plie, nur la lingvo ebligas finfine ekkoni, ke tiu homo ja eventuale eĉ estas rekta kontraŭulo, por ne diri malamiko. Se do tiuj du kontraŭuloj ekuzas la lingvon por malamika polemiko, ne malofte eĉ malica, tiam evidente forestas la „solidariga" funkcio de la lingvo, kaj tiu fariĝis *malsolidariga.*
Ĉu la lingvo solidarigas aŭ malsolidarigas finfine dependas sole de la konceptojn portantaj homoj kaj iliaj komunikadaj temoj kaj celoj.

5.3. Ĉu lingvo enhavas ideologion?

La koncepto, ke iu lingvo povas enhavi iun specifan idearon sole apartenantan al tiu konkreta lingvo, estas malĝusta. Nek la germana nek la rusa enhavas ion tipe germanecan aŭ rusecan, iun germanan aŭ rusan idearon aŭ filozofion.
Necesas finfine senmistikigi Esperanton, ĉar *senmistika Esperanto estos pli potenca instrumento* ol envolvita en pseŭdoteorioj. La lingvo de Zamenhof *ne* enhavas iun „ion", iun interfratigan forton, kiu aŭtomate efikadas k.s.
Lingvo nek estas dia forto nek enhavas ĝin. Lingvo estas socia instalaĵo, kiun kreis la homo. Ĝi estas „produkto de la speco homo" (Marks/Engels)[34]). „La lingvo estas la plej grava rimedo de la interhoma interrilato" (Lenin)[35]). Do, rimedo!
Per la sama lingvo oni povas esprimi la plej kontraŭajn ideojn. La germana estis la lingvo de Goethe kaj Marks kaj ... de Hitler.
Estas vero, ke Zamenhof kreis Esperanton por konkretaj celoj. Sed tio ne signifas, ke tiuj celoj *enestas en la lingvo mem.* Neniu povas malhelpi aplikadon de Esperanto por rasismo, eĉ por faŝismo kaj milita propagando, kiel U. Lins en sia studo montris per pruvoj el la historio de la germana Esperanto-movado[36]). Ni serĉu la kaŭzon de la identigo de lingvo kaj ideologio.
La erara koncepto de la „interna ideo" kuŝas inter alie en tio, ke oni identigas la *lingvon* kun *konkretaj komunikadaj celoj* por kiuj Esperanto servu!
Tiuj komunikadaj celoj (interkompreniĝo por forigi miskomprenojn, konfliktŝtofon ktp. por plifaciligi la spiritan kaj materian interŝanĝon trans la naciaj lingvaj limoj) sendube estas de alta humanisma valoro, movas kaj entuziasmigas la homojn kaj pro tio, ĉar la realigo de tiuj celoj estas tre facile kaj bone realigebla per tiu mirinda instrumento Esperanto, oni ekamas la instrumenton (prave!) kaj komprenas la akiritajn sukcesojn ne kiel sekvojn de la komunikado, kio ili estas, sed

vidas en ili la esprimon de iu mistika interna forto efikanta en la lingvo mem. Tiu koncepto, cetere, estas ankaŭ trovebla en la idealisma (burĝa) lingvofilozofio. Laŭ B. Whorf[37]) ĉiu gepatra lingvo pro sia specifa strukturo peras al la homo tute specialan mondkoncepton, de kiu li ne povas malkroĉi.
L. Weisgerber[38]) eĉ parolas pri „lingva intermondo" (sprachliche Zwischenwelt) kiu ne estas tute transpontebla. Do la naciaj lingvoj laŭ tiu koncepto, tiel oni povus konkludi, havas specifan ideologian profilon.
La logika sekvo estas iuspeca „lingva rasismo", ĉar ekestas la demando, per kiu lingvo oni plej bone konceptos la mondon. Kompreneble neniu neas, ke ekzistas intimaj ligoj inter ideoj, ideologioj kaj la lingvoj, nome en tiu senco, ke la lingvo, instrumento de pensado kaj komunikado estas la materiigilo de ideoj, konservas kaj fiksas ilin en lingvaj elementoj (vortoj, frazoj, tekstoj). La ideoj ne „gutas" el la lingvoj mem, sed ekestas en la homa cerbo pro la rilato de la homo kun la lin ĉirkaŭanta mondo.
Do oni ne povas diri, ke certaj ideoj aŭ ideologioj estas nepre ligitaj nur al tiu aŭ alia difinita lingvo. Tio estas plena fantazia absurdaĵo.
Parolante pri la rilato inter la konkretaj idealoj de esperantistoj kaj Esperanto oni devas substreki, ke tiuj idealoj aŭ jam ekzistis kerne en la mondkoncepto de la „ankoraŭ-ne-esperantisto" kaj estis plifortigitaj per la utiligo posta de Esperanto aŭ entute nur ekevoluis *pro la internacia komunikado*, per kiu estas intertransdonata idearoj kaj konceptoj.
La dialektiko konsistas en tio, ke, serĉante kaj aplikante rimedon (Esperanto) por efike realigi siajn idealojn kaj celojn (internaciaj kontaktoj, internacia amikeco ktp.) oni samtempe plifortigas per tiu rimedo ĝuste tiujn idealojn kaj celojn. *Do la tuta „mistika forto" de Esperanto kuŝas ne en la lingvo mem sed en la efiko de la komunikada proceso!*
La granda danĝero de la mistikisma koncepto de la „interna ideo" i.a. kuŝas en tio, ke pro la prezentita erara penso iuj homoj vidas en ĝi iun mondsavan religion aŭ helpfilozofion kaj sekve, ĉu konscie aŭ ne, en la movado bonvenan sekton por kulturi tiun „religion" kaj „filozofion".
Nutrante la iluzion, ke Esperanto en si mem ja havas pacideologion, ili ne vidas neceson de pli forta engaĝo en la pacbatalo ekstermovada.
Kompreneble inter sciencistoj tia esperantista filozofio renkontas plej fortan antipation.
La internidea argumentado kaj propagando flanke de trofavoruloj malvidebligas la gravan kaj interesegan sciencan temon, kiun prezentas la internacilingva problemo. Krom tio la sciencisto tre facile povas suspekti, ke por la trofavorulo ne tiel gravas la problemo de internacia lingvo sed precipe la „venko" de lia amata, lia kara lingvo Esperanto.[39])
Sed, rekte danĝera, kiel pruvis abunde la historio, estas alia aspekto.
La identigo de lingvo kun ideologio, respektive la aserto, ke lingvo enhavas iun ideologion, ne nur estas trovebla en la Esperanto-movado, sed ankaŭ ekster ĝi.
Se ŝovinistoj kaj naciistoj kondamnis Esperanton ĉar ĝi estis „pacifisma lingvo", se por aliaj Esperanto estis la esprimo de la kosmopolitismo kaj de imperiismo ktp. tiam ĉiuj tiuj fortoj ne komprenis la simplan fakton, ke lingvo estas nek komunisma nek imperiisma, nek humanisma nek alia. Lingvo estas *instrumento.* La homo, kaj nur li decidas, por kiuj tre diversaj konkretaj celoj oni utiligos la lingvon. Kompreneble la lingvofilozofia identigo aŭ forta ligo de la lingvo Esperanto kun iu ideologio aŭ idearo tre mallarĝigas la aplikosferojn. Ankaŭ tio estas konata el la historio.
La Zamenhofa „interna ideo" ludis tre gravan rolon por la evoluo de la Esperanto-movado, precipe dum la unuaj jardekoj. Ĝi kunigis la unuajn adeptojn de la juna lingvo, ardigis ilin kaj certigis la intiman interligiĝon kaj kunkreskon de la lingva komunumo de la nova lingvo.
Alia idearo, tiu de la proleta internaciismo, dum la dudekaj jaroj de nia jarcento aliĝis – kaj trovis praktikan subtenon per la aplikita Esperanto, en la internacia laborista Esperanto-movado. La proleta internaciismo kaj la entuziasmo pri la rompita klereco-privilegio (laboristoj ne havis tro da eblecoj por lerni fremdajn lingvojn) ankaŭ efikis kuntene por parto de la lingva komunumo esperantista: la proletoj.
Krome oni devas ja agnoski, ke Esperanto estas la realigo de certa ideo en tiu senco, ke Zamenhof konscie kreis la lingvon laŭ plano. Kaj estas ĝuste, aserti, ke Esperanto estas pro sia facila lernebleco pli facile atingebla por vastaj amasoj ol iu nacia lingvo kiel fremdlingvo. *En tiu senco* la lingvostruktura karaktero de Esperanto estas certa esprimo de demokrateco de Zamenhof. Do, ĉu tamen, Esperanto estas demokrata lingvo? Ne, sed ĝi ebligas pli demokratan internacian komunikadon, ol tio estus ebla pere de malfacile lernebla nacia lingvo en la funkcio de internacia.

6. Ĉu la Esperanto-movado havas propran ideologion?

Fine, ni volas starigi du demandojn.

1) Se do Esperanto mem ne enhavas en si iun ideon aŭ filozofion, kio do estas tiu „io", kio jam dum 90 jaroj ĉiam denove ardigas la adeptojn de la lingvo, aktivigas kaj movas ilin antaŭen, entuziasmigante tiom, ke multaj esperantistoj oferis monon, tempon, eĉ karieron kaj ne malofte la propran vivon.

2) Se ne la lingvo mem, ĉu tamen la internacia „Esperanto-movado ne havas iun tute specifan kaj propran ideologion?

Sed unue: Kio do estas la kaŭzo de la entuziasmo?
Antaŭ ol respondi al tiu demando, ni prezentu eltiraĵon el letero de aktiva esperantisto kaj komunisto el GDR: „Jen – sen koro kaj entuziasmo („interna ideo") nenio vivas, eĉ ne la plej saĝega materialismo. Sen tia „interna ideo" ni eĉ ne estus fidelaj komunistoj. Kiom do mi sciis, kiam oni „fajrigis" (germanslange: forpelis D. B.) min el mia laboro, kiam oni arestis min trifoje kaj konservis min du jarojn pro komunismo kaj Esperanto, kaj . . . kaj . . . la tutan longan vivon Esperanto edukis min al internaciismo. Kaj nur post multaj jaroj mi teorie studis la marksisman teorion pri la nacia demando. Sekve – ni endonu tiom da entuziasmo (interna ideo), kiom ni povas en nian lingvon! Sen entuziasmo (interna ideo) Esperanto estas morta . . ."[39])
Estas interese, ke tiu esperantisto identigas la internan ideon kun entuziasmo. Tia kompreno estas plene akceptebla, se ni korektas, ke ne Esperanto sed la peresperantaj kontaktoj kaj travivaĵoj edukis la leteraŭtoron.
Entuziasmo diversmotiva estas tio, kio movas kaj aktivigas multajn adeptojn de Esperanto. Sed de kie venas la entuziasmo? *La koncepto*, ke internacia lingvo povas grave kontribui al la homa progreso en plej diversaj rilatoj, – mi skribis pri la tri motivogrupoj – tio vere estas tiel grandioza, ke ĝi kapablas entuziasmigi kaj aktivigi homojn kaj laborigi ilin por Esperanto dum la tuta vivo, ĉu laŭ sciencaj aspektoj ĉu tute praktike. La plej diverscela apliko de Esperanto en la internacia sfero, kio ebligas emociajn travivaĵojn, homajn spiritajn pliriĉiĝojn, malfermas novajn spertojn kaj sciojn, ĉio ĉi estas la nutro por tia entuziasmo.
Kaj jen la alia demando: *Ĉu la movado havas propran ideologion?* La internacia Esperanto-movado estas mikromodelo de la internacia politike diversmaniere strukturita homa socio. La esperantistoj aktivantaj en la movado kompreneble reprezentas plej diversajn politikajn kaj filozofiajn konceptojn, adeptas al malsamaj religioj aŭ estas ateistoj. La historio de la Esperanto-movado kiel ankaŭ la nuntempo klare pruvas la paralelan ekziston de ekzemple neneŭtralaj laboristaj kaj „neŭtralaj" burĝaj esperantistaj grupiĝoj kaj organi-

zoj. En tiu politika senco la internacia Esperanto-movado ne havas unuecan ideologion. Sed ĉiujn esperantistojn, adeptojn de tute malsamaj politikaj starpunktoj, minimume kunligas, kiel ni jam aludis, la konvinko pri la utileco de internacia lingvo ĝenerale kaj de Esperanto speciale. Ilin kunligas la tre diversmotiva koncepto, ke valoras komune agadi por la disvastigo de la internacia lingvo.
Sed oni devas aldoni ion gravan. Pro la sendube forta influo de la humanismaj konceptoj de Zamenhof, pro la signifo de internaciismaj konceptoj el la laborista movado kaj entute pro la fakto, ke la idealoj pri paco, internacia kunlaboremo kaj amikeco kondukis multajn homojn al Esperanto, nur malofte aŭ apenaŭ oni povas trovi ŝovinistojn, rasistojn aŭ naciistojn en la Esperanto-movado. La medio ne estas nutra por tiaj konceptoj.
Pro tio oni pravas asertante, se oni ne absolutigas, ke la internacia Esperanto-movado ĝenerale estas movado, principe inklina kaj malferma al la ideoj de paco, malstreĉiĝo kaj kunlaboro inter la popoloj. Sed necesas daŭre aktivigi la movadon por konkreta aktuale bezona batalo por paco, sekureco kaj malarmado. Pro tio kritika rilato kaj samtempa aprezo al la humanismaj ideoj de Zamenhof, en la montrita senco, kaj la estimo de tiuj ideoj ne povas malhelpi, sed nur utili al la kunkonstruo de paca mondo, por kiu oni ankaŭ utiligu la internacian lingvon Esperanton. Fine nur sur paca mondo Esperanto havas estontecon!

7. Notoj

1) kp. „Aŭtomata funkcio de Esperanto? Esperanto – instrumento!, „der esperantist", Berlin, 5/1976, p. 12–14 kaj reagoj en n-roj 1/78, 2/78, 3/78 kaj en aliaj Esperanto-revuoj

2) Tamen la laboristmovadan vidpunkton pri la „interna ideo" bone prezentas: G. Demidjuk, Evoluo de la interna ideo, en: Kvardek jaroj, Kolekto da originalaj verketoj dediĉitaj al la 40-jara jubileo de Esperanto, SAT, Paris-Leipzig-Moskvo, 1927, p. 22–27

3) Ni komprenas sub interlingvistiko lingvosciencan disciplinon, kiu esploras ĉiujn problemojn de la internacia lingva komunikado kun ĉiuj politikaj, ekonomiaj, lingvistikaj kaj aliaj aspektoj. Interlingvistiko havas la taskon – sub speciala konsidero de la planlingvoj – ebligi la vojon al kiel eble plej efika kaj racia solvo de la internacia lingva problemo. Kompreneble la nocio planlingvo en pluralo nur havas scienctaktikan signifon. En la realeco nur funkcias unu planlingvo, Esperanto.

4) kp. O. S. Aĥmanova, E. A. Bokarjev, Mejdunarodny vspomogatjelny jazyk kak lingvističeskaja problema, en: Voprosy jazykoznanija, Moskva 6/1956, p. 69

5) kp. E. A. Bokarjev, Esperanto, la lingva kreajo de Zamenhof, en: I. Lapenna (Red.) Memorlibro, eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, Londono 1960, p. 31–32, represita en „der esperantist", n-ro 65/66 (3/4 1974), p. 28–30), D. Blanke, Kial venkis Esperanto?, en: „der esperantist", n-ro 73/74 (5/6 1975), p. 20–22

6) vidu lian studon pri Zamenhof, represitan en la esea volumo „Socipolitikaj aspektoj de Esperanto-movado", red. Detlev Blanke, HEA Budapest, 1978, 228 p.

7) L.L. Zamenhof, Originala Verkaro, antaŭparoloj – gazetartikoloj – traktajoj – paroladoj – leteroj – poemoj, kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle, Leipzig 1929 (OV) p. 417–418

8) kp. C. van Kleef: La homaranismo de d-ro L. L. Zamenhof. Historia enketo pri la naskiĝo kaj la evoluo de la Zamenhofa Homaranismo. Marmande, sen dato (Kolekto Zamenhof en sia tempo, n-ro 2)

9) OV p. 345–346

10) OV p. 346–350

11) OV p. 350–351

12) L. Zamenhof, Hilelismo, kun traduko de Adolf Holzhaus, Helsinki 1972

13) OV p. 18

14) OV p. 19

15) OV p. 360

16) OV p. 590

17) OV p. 586

18) OV p. 370

19) cit. loko

20) OV p. 372

21) OV p. 378–379

22) kp. la studon de A. Ratkai, La internacilingva movado kiel kreinto de la internacia lingvo, en „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", red. D. Blanke, HEA, Budapest 1978

23) I. Lapenna, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (suplemento al Retoriko), Rotterdam 1966, (EPP), p. 70

24) EPP p. 21

25) I. Lapenna, U. Lins, T. Carlevaro, Esperanto en Perspektivo, faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo, London – Rotterdam (CED) 1974, p. 370 (komparu la ampleksan recenzon de D. Blanke, Oceano da informoj, GDR-eldono de „Paco", 1975, p. 29–30)

26) EPP p. 15

27) cit. loko

28) cit. loko

29) N. Bartelmes, Kion konkludi?, Sennaciulo, Paris, 6/1977 (junio), p. 53

30) EPP p. 41

31) EPP p. 136

32) EPP p. 46

33) kp. – S. I. Hayakawa, Semantik. Sprache im Denken und Handeln. Darmstadt 1968. (tradukita el la amerikana)
– Kritiko de tiuj teorioj en E. Albrecht, Bestimmt die Sprache unser Weltbild? (Ĉu la lingvo determinas nian mondkoncepton?), Berlin 1972

34) K. Marx/F. Engels, Die deutsche Ideologie, en: Marx-Engels-Werke, vol. 3, Berlin 1973, p. 412

35) V. I. Lenin, Über das Selbstbestimmungsrecht der Nationen, en: Lenin-Werke, vol. 20, Berlin 1973, p. 398

36) kp. U. Lins, Esperanto dum la Tria Regno, en „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", red. D. Blanke, HEA, Budapest 1978 Tiuĉi studo aperis preskaŭ samtekste (nur aldoniĝis 5.2.) en la esea volumo. La volumo por GDR-anoj estas havebla ĉe Centra Laborrondo.

37) B. L. Whorf, Sprache – Denken – Wirklichkeit, Beiträge zur Metalinguistik und Sprachphilosophie, Hamburg 1963 (trad. el la amerikana)

38) L. Weisberger, Vom Weltbild der deutschen Sprache, Düsseldorf 1953

39) Frapa pruvo: La Libro „Mia amata Esperanto" de R. Schulz, vd. pĝ. 36–37

40) Internaciisto, Organo de Kolektivo Esperantista Komunista (KEK), Loeben, 5/1977

OV = Originalo Verkaro de L. L. Zamenhof, red. J. Dietterle, Leipzig 1929

EPP = I. Lapenna Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Rotterdam 1966

Instrulibro pri la arto kompromiti Esperanton

Richard Schulz: Mein geliebtes Esperanto (Mia amata Esperanto). Wege zum Verständnis und zur Praxis der Internationalen Sprache. Bleicher-Verlag, Gerlingen-Stuttgart 1978, 218 p., 19 cm, ISBN: 3 – 92 10 97 – 14 – 2.

La unua eldono (1976) en „Esperanto" (12/1976) trovis bonan recenzon („Fascina libro"). Mi ne sciis pro kio kaj enprofundiĝis en la duan eldonon, kiu preskaŭ neniel distingiĝas de la unua. Mi recenzas ĉi tie, ĉar temas pri la malofta kaj salutinda kazo, ke nacilingve aperas libro pri Esperanto. La subtitolo informas, ke temas pri „Vojoj al la kompreno kaj praktiko de la Internacia Lingvo". Ni vidos. La aŭtoro Richard Schulz (aŭ, se vi kiel li preferas, Rikardo Ŝulco) eklernis Esperanton 1932 (kiam li finlernis, mi ne scias) kaj rekomencis aŭ daŭrigis nur en 1975. 1978 aperis ĉe la eldonejoj Edition Leipzig (GDR) kaj Bleicher-Verlag (FRG) en lia traduko la fama rakonto de Heinrich Böll „La perdita honoro de Katarina Blum" (Pri tiu traduko aliloke).

En 28 ĉapitroj Schulz prezentas al la leganto sian amatinon „Esperanto" diskutante pri ĝi kun la leganto. Li tion faras vere netede, emociige (pro tio la recenzo) kaj sendube originale. Oni ricevas informojn pri la strukturo de Esperanto, pri la movado, argumentoj, lingva materialo ktp. kaj konatiĝas kun la opinio de la aŭtoro pro kio Esperanto ankoraŭ ne venkis kaj kion oni devus fari por venkigi ĝin. Do salutindaj celoj? Ni vidos. Bedaŭrinde oni devas konstati, **la prezento de la aktuala Esperanto-movado** karakteriziĝas per fuŝo kaj ignoro. Superrigardon oni ne ricevas, nur pli aŭ malpli literature pribakitajn „informojn", kiel ili ĝenerale estas donataj dum hazardaj interparoloj. Fidindajn kaj precizajn indikojn, kvalitajn prijuĝojn oni ne trovas. Sed ekzemple kvantajn konsiderojn pri malmulteco de la adeptoj (17/18).

La leganto precipe ricevas la impreson, ke la esperantistaro estas sekto luktanta en la kaŝiteco. Ŝulco ĉion faras, por plifirmigi tiun impreson: „La ĝisnuna historio de la movado tamen montris, ke ĉiuj tiuj klopodoj ne malŝarĝis la esperantistojn el ilia estado kiel sektanoj" (p. 18). La 16a ĉapitro „Ia sekto" pli malpli envicigas la adeptojn de la Internacia Lingvo en vicon kun eklezio, Jesuo Kristo, la mormonoj, antropozofoj, kvakeroj, atestantoj de jehovo k.a. (p. 124). Jes, ni ekscias, ke la esperantistoj same kiel tiuj sektanoj vivas dise tra la mondo. Dum pli ol 90 jaroj ili vivas en „interna ekzilo", en la diasporo, preskaŭ en la subgrundo (129). Feliĉe, Ŝulco forgesis mencii la teroristojn. Kio kunigas tiujn strangajn esperantistojn? La „interna ideo" (186 k. sekvaj), kiu estas iu mistera „forto enestanta en Esperanto" (189). Kiel ni krome ekscias, intertempe ankaŭ UNO kaj UNESKO jam konvertiĝis al la verda religio kaj akceptis, en modifita formo, la „internan ideon" (190).

Plue, la karikaturan bildon pri la nuntempa internacia movado, kiun pentras Ŝulco, distingiĝas i.a. per preskaŭ plena ignoro de la movado en la socialismaj landoj, kie Esperanto havas la plej fortajn poziciojn. Sed ni ja trovas atentigojn pri „Horizonto", kiun eldonas, kiel ni legas, „ĝojige aktiva amika rondo de konsiderinda nivelo sub la iniciativo de prof. Ivo Lapenna" kun la nomo „Neŭtrala Esperanto-Movado" (176). Ne mirige, ke la tuta verketo estas dediĉita al „s-ro d-ro Ivo Lapenna, la homo" (5). Pri UEA oni ne multon trovas, pri TEJO kaj MEM nenion.

Post malfacila digesto de ĉio oni nur ĝojas, ke tiel ŝulca la movado tamen ne estas.

Kelkaj rektaj eraroj i.a. koncernas la malpermeson de la Esperanto-movado en Germanio. Ne 1935 sed jam 1933 la nazioj malpermesis la Germanan Laboristan Esperanto-Asocion kaj 1936 la t.n. neŭtralan Germanan Esperanto-Asocion (80, 102).

Kelkfoje la aŭtoro okupiĝas pri **argumentoj kontraŭ Esperanto,** daŭre liverante tiujn mem. Li ekzemple ne kapablas dialektike prezenti la problemon pri artefariteco/natureco de la lingvo (71) kaj daŭre parolas pri la „artefarita lingvo" (71, 73, 74, 186), kelkfoje pri „natura lingvo" (73). Ankaŭ ĉe Ŝulco Esperanto kelkfoje vivas, eĉ vivegas. Nome lia „amata Esperanto" povas ekskrementi (sic! ausscheiden, 73) ŝanĝiĝi, kreski kaj ĝi eble eĉ „povus velki, mizeriĝi kaj morti kiel aliaj naturaj lingvoj ankaŭ, se oni ne atentas" (74). Nia kara lingvo ankaŭ ricevis bebojn, „kiel la latina ĝi naskis filinajn lingvojn" (74). Dio mia, kia pulsanta vivo!

Kaj pro ĉio ĉi, kiel oni klare tuj vidis, Esperanto estas por la mondo ege grava. Post kiam, laŭ la franca teologo kaj filozofo Pierre Teilhard de Chardin, la evolucio pli malpli ĉesis en la biosfero post la apero de la homo sur la biologia ebeno kaj nun translokiĝas en la noossfero, la sfero de la spirito, la esperantigo de la homaro estus plua decida paŝo en la evolucio.

„Estas fine la vivo, tiu mirinda, nekomparebla ĉiam denove rejuniĝanta vivo mem, kiu nin devigos alpreni Esperanton..." (168). Do estas klara la afero...

Sekve, laŭ s-ro Ŝulco, la ĉiutage aŭdeblaj sloganoj en la amasmedioj, ne estas „Esperanto aŭ kapaŭskultiloj" aŭ „Esperanto aŭ Basic English" ne, la alternativo estas „Esperanto aŭ la atombombo" (168). Tion certe komprenos la ŝtatistoj, post unua lego de la libro. Ili ekscios se ili „foje komencos iom pli profunde mediti pri nia situacio, tio estas tiu de la homaro – sur nia kosmoŝipo tero, pri milito kaj paco, libereco kaj demokratio, teroro kaj subpremo, naskoeksplodo kaj helpo por evoluantaj landoj, pri malaperantaj arbaroj kaj mortantaj maroj, kreskantaj dezertoj kaj hommedia polucio, kosmonaŭtiko kaj teraj krudaĵoj, ekonomiaj interplektoj kaj disdivido de energio, malsato kaj nutro surmonda, tiam montriĝas, ke la bazo de kiu entute eblas ĝuste kaj sukcespromese ataki kaj majstri ĉiujn tiujn problemojn estas nur unu, nome „NUR ESPERANTO" (169, majuskligo en la originalo).

Sed kiel do gvidi la mondrevolucion per kaj por Esperanto? La aŭtoro donas multajn utilajn ideojn: enkonduki en la poŝtejoj kaj stacidomoj ktp. Esperanto-ciferojn (14); uzi la ŝildon „Nefumantoj" en la trajnoj (unue nur en FRG, 19) kaj aliajn utilajn vortojn kiel „necesejo" aŭ „netrinkebla akvo" (20); en preĝejoj ĉiudimanĉe prediki pri Esperanto (40); ĉiuvespere ĉarmi en la televido esperantlingve per kelkaj frazoj, ĉiam la samaj (60); esperantigi la poŝton kaj mortigi la francan lingvon (63/67); priglumarki telefonĉelojn (68); senkondiĉe apliki sloganojn i.a. kiel „Demokratio kaj Esperanto", „Manĝi laŭ Esperanta menuo" kaj „Homoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!", sur grandegaj afiŝoj portendaj tra la stratoj (130). Plue: la restoraciestroj havu esperantlingvajn menuokartojn (134) kaj baptu siajn restoraciojn laŭe (136). Esperanton oni enkonduku en poŝkalendarojn (154) kaj vi, fervojistoj portu steleton sur la jakedo (192).

La strategian signifon de la scienco la aŭtoro apenaŭ mencias. Entute, kiel oni vidas, bela kirlaĵo de senkonceptaj romantikaj fantaziaĵoj.

La kulmino tamen estas la frapa novaĵo, ke la Lili-Marleen-kanto kaj Esperanto estas parencaj. Ĉar, „ĝi (la kanto, D. B.) havas same kiel la Esperanto-lingvo la nebrideblan forton rompi limojn" (185) Ni ekscias, ke la kanto „Lili Marleen" fariĝis „ventilo por la homeco, tiel brutale perfortita kaj estingita de la naziismo" (184). Sed

Recenzo

Pri la perdita honoro de – iuj



Edition Leipzig ĝis nun eldonis en Esperanto la romanojn „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz kaj la „Trigroŝan Romanon" de Bertolt Brecht. Ambaŭ verkojn tradukis el la germana la membro de CLE, d-ro Karl Schulze el Berlin. Lingve reviziis la tekstojn la konata pola radio-ĵurnalisto kaj tradukisto Jerzy Grum. La internaciaj recenzoj atestis pri bona kvalito de la tradukoj. En la jaro 1978 Edition Leipzig eldonis trian volumon. Temas pri la fama rakonto de la nobelpremiito pri literaturo, Heinrich Böll (pr. Hajnriĥ Bell) el FRG: „La perdita honoro de Katarina Blum" („Die verlorene Ehre der Katarina Blum"). La verkon tradukis s-ro Richard Schulz el Federacia Respubliko Germanio. (Li nomas sin Rikardo Ŝulco)[1], kiu ne estas miksenda kun d-ro Karl Schulze el GDR! La aperigo de tiu verko estas tre laŭdinda. La libro estas bele presita kaj bone bindita. Laŭ nia opinio la traduko de la verko, kiun liveris s-ro Ŝulco, estas ege malbona kaj ne permesus publikigon. Jam la titolo estas fuŝe tradukita per „La perdita honoro de iu Katarina Blum'". Krome bedaŭrinde neniu eksterlandano lingve **reviziis** la tradukon. Dufoje CLE detale klarigis al la eldonejo la mankhavecon de la traduko, proponante ne publikigi ĝin. Eĉ al la presprovaĵoj CLE aldonis liston da 150 lingvaj eraroj al la afabla konsidero de la tradukinto. Pro motivoj, kiujn CLE ne kompetentas ekspliki, la eldonejo Edition Leipzig en kunlaboro kun la FRG-a eldonejo Bleicher (tia kunlaboro estas tre laŭdinda!) tamen publikigis la verkon. Ankaŭ estonte CLE klopodos, ke en GDR aperu nur lingve akcepteblaj verkoj. En la menciita kazo la klopodo, kiu evidente ekzistis, estis sensukcesa. Pro la fakto, ke eĉ malbonega traduko ne tute povas detrui la grandan valoron de la rakonto, CLE rekomendas ties aĉeton.

Centra Laborrondo Esperanto
en Kulturligo de GDR

1) Vidu la recenzon pri lia verko „Mia amata Esperanto" paĝo 36/37

---

eĉ pli draste: „Tiu kanto hodiaŭ, post pli ol duona jarcento, estas komunaĵo se ne de ĉiuj popoloj tamen de ĉiuj soldatoj de nia tero" (184). Kun tremanta koro ni plue ekscias, ke „per tiu kanto venis en la mondon io futurgvida, kies potencofluoj ankoraŭ longe ne elĉerpiĝis kaj kiuj siavice devenas el la kristana-humanisma tradicio de la okcidentaj landoj (Abendland – vespera lando, 185)." Aŭ Ŝulco vere kredas ĉion ĉi stulton aŭ faras nesukcesan spiritaĵon. En lia propra intereso mi esperas la lastan... La tuta ĉapitro (182–185) estas de sufoke kiĉa odoro... Kaj se temas pri la tutmondaj soldatoj kantantaj Lili Marleen, mi havas la impreson, ke Ŝulco eble celas iun alian astron sed ne la teron. Eble pro tiu okcidente kantata Lili Ŝulco limigas la vortkrean povon de Esperanto al okcidenta kultura enflusfero (abendländischer Kultureinfluß, 100), kiu feliĉe, feliĉe, ankaŭ jam enpenetris la nehindoeŭropajn popolojn..., kiuj, kiel ni ja scias, ĉiuj estus subevoluintaj sen la okcidenta pensaro. Se ni jam parolas pri la lingvistikaj konceptoj de Ŝulco oni kelkfoje trovas surprizojn. Ekzemple, laŭ la aŭtoro, Esperanto praktike ne havas gramatikon (74) kaj la admonon „tio gramatike estas korekta, sed tiel oni ne diras" (156) esperantistoj ne konas. Eble pro tio la Esperanta lingvaĵo (en tiu ĉi libro same en la povra „Katarina Blum") de Ŝulco estas tiel stranga kvankam „gramatike korekta" (**biletisto** 20, **ŝtacidirektejo** 22, **leterkestisto** 29, **biletkostrepago** 29, **busisto** 29, **kelkeje** 96, **subokupita profesio** 98, **miaj sinjorinoj kaj sinjoroj anstataŭ gesinjoroj** 59, **oni eblas interkompreni** 146, ktp.) Rektaj eraroj estas **ŝlosisto** anstataŭ seruristo (29, 149), **sia lernebleco** (146), **abonento** (149). **li jam estis pereita** (162). La tradukoj de Kleist-aĵoj (156 ks, 205 ks) kompare al la unua eldono evidente estis lingve prilaboritaj, sed ankoraŭ sufiĉe malbonaj. Ŝulco simple ne komprenas, ke en Esperanto, malgraŭ granda elasteco, jam establiĝis leksikaj kaj stilaj normoj, kiujn oni devas respekti. Finfine, mi senhelpe devas konfesi, ke mi ankoraŭ ne akiris intuicion por kiaj personoj la libro estas destinita. Seriozulojn ĝi ne allogas, sciencistojn ĝi certe forpuŝos. Eble klerajn sektemulojn ĝi interesos. Sed da tiuj la movado ne bezonas.
La tuta libreto estas treege instrua. Ĝi montras kiom danĝere povas esti, se aŭtoro skribas „ne tute nescience, ni diru popularscience" (173) pri io, kion li ne plene komprenis aŭ ne volis kompreni. Alie mi ne povas klarigi al mi tian teruran neseriozan fantaziaĵon. Restas nur la bedaŭro, ke en la libro, kiu sin eksplicite direktas al FRG-anoj, oni ankaŭ mencias la eldonaĵojn el GDR kaj eĉ la plenan adreson de Centra Laborrondo. Tio estas neagrabla kompromito.

Detlev Blanke

Jen estas mia rimarko.

Ĉu vere la „infana" raso
Per la nukleaj bomboj ludas?
Karega Rejna, mi ne kredas!
Popoloj bombojn ne posedas!
Kategorie mi konkludas,
Avidas Pacon homamaso!
Kaj homoj scias, mort' apudas,
Ĉar certa klaso bombojn ludas.

Vi, Rejna, estas tro naiva!
Al vi pri l'fakto mi aludas –
Pri tragedio Hiroŝima...
Do, Rejna, kiu bombojn ludas?
Kaj freŝas en memoro mia
La tragedio vjetnamia...
Centmiloj... miloj da kadavroj
Dum la agres' usona, daŭra!

Ne la popoloj, kun aplombo,
Fieras pri neŭtrona bombo!
Sed fosas por Homar' l'abismon
Tutmonda imperialismo.

Ne, Rejna, tute vi eraris –
La homojn kun safar' komparis!
Sen tim', kuraĝe kaj aŭdece,
Batalas homoj por la Paco.
Kaj homoj venkos, estu certa!
Oktobran ili havas sperton!

Petro Poliŝĉuk, Taŝkento

La signalo

Inspektisto de banko en Leeds, Anglio, neatendite kontrolis la filion. La kasan salonon li trovis malplena. Malantaŭ pordo kvar oficistoj trankvile kartludis. Kolere la kontrolisto premis la alarmbutonon. Nenio okazis. Nur post kelkaj minutoj aperis kelnero el proksima gastejo kaj alportis kvar trinkaĵojn por la kartludantoj.

Policista fideleco

Angla juĝejo decidis pagon de 800 000 DM al iama policisto, heredaĵon de la 1973 forpasinta riĉa fraŭlino Violet Salmon. La maljunulino, vivinta en vilao en Gloucestershire, regule telefonis al la policejo plendante pri soleco, kaj petis sendi al ŝi policiston. Serĝento Davies post tiaj telefonaĵoj per motorciklo brue suprenveturis la vojon al ŝia domo kaj babilis iomete kun fraŭlino Salmon. „Tiamaniere li aperis en ŝia vivo", klarigis sian decidon la juĝisto kaj rifuzis la plendon de la parencoj, kiuj celis nuligi la testamenton de la oldulino.

Preferata legaĵo

Dum konkurso de la Franca Televido pri la plej trafa respondo Josette French gajnis la unuan premion. Demandite, kion ŝi plej volonte legus sur forlasita insulo ŝi respondis rapidspirite: „La tatuaĵojn de maristo!" – Sinjorino French aĝas 76 jarojn.

Korekto

Thomas A. Edison, kiu antaŭ 100 jaroj sukcesis mekanike akumuli sonojn kaj kiu konstruis la tielnomatan fonografon, la antaŭulon de la nuna gramofono, donis sian iks-an intervjuon. „Vi do konstruis la unuan parolmaŝinon, ĉu?" li estis demandita. „Ne!" diris la maljuna inventisto kaj profunde enspiris. „Ne, juna amiko. la parolmaŝino estis konstruita jam longe antaŭ mia tempo, farita el . . . hm . . . nun, el ripo!"

Inklino

El stilekzercaĵo de 16-jara lernantino en Torino, Italio: „Decaj sinjorinoj estas kiel la klinita turo de Piza. Ili montras sian inklinon- sed ili ne falas."

Litrakonto

Ŝtelisto, en Paris ĵus „laborinta" en vilao, de ekbruo estis ĝenata, kuris en apudan ĉambron kaj sin kaŝis sub lito, kiu apartenis al la filino de la posedanto. Sed sub la kuŝejo jam kuŝis viro: la amiko de la juna damo. Inter ambaŭ viroj ekestis furioza interbatiĝo, ĉar oni kredis la ŝteliston esti rivalo. La polico klarigis la eraron.

Tiun ĉi numeron eldonis la MEM-Sekcio de Germana Demokratia Respubliko

Redaktoro: D-ro Detlev Blanke

Redakta Komitato de „Paco" (aperadas en Sofio):
Violin Oljanov (Bulgario) – ĉefredaktoro
D-ro Detlev Blanke (GDR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
William Gilbert (Francio)
Stanislaw Swistak (Pollando)
Oldrich Knichal (ČSSR)
Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)
Arta aranĝo: Kiril Drajev (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuaĵojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj marĝeno sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo!

„Kien skribi?"

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod 2, 1113 Sofio, Bulgario

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940 Budapest VI, Nepköztarsasag utja 73, Hungario

Vicprezidantoj: Prof. d-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, Moskva K – 9, USSR
Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 Bruxelles, Belgio

Ĝenerala sekretario: William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 Tours, Francio

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôztôku, Osaka, Japanio
Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, blok 37, II. 1680 Sofia, Bulgario

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, st. Bojanski Vodopad 241 E 1680 Sofia, Bulgario

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia, Bulgario

Centra kasisto: (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 Grand Quevilly, Francio. Poŝtkonto CCR – Rouen 102-45 P.

Respondeculo pri landaj numeroj de „Paco": Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DDR - 83 Pirna, Germana DR.

Kie aboni „Paco"-n:

Aŭstralio:
N. A. Collier, 21 Fielding Street, Buderim Qld. 4556

Aŭstrio:
A. Sindl, A-3100 St. Pölten, Altmanngasse 22

Belgio:
Glady Claude, 21, Rue Kessels, 1030 Bruselo

Britio:
Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, Covenham, Louth, Lincs, LN 11 OPF.

Bulgario:
Bulgara MEM-Komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia — 3 levoj

Ĉeĥoslovakio:
Ĉeĥa Esperanto Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 11000 Praha 1 — 30 kr.

Danlando:
Egon Starup, Brovaengel 26, DK 2700 Kopenhago BRH

FR Germanio:
Roland H. Hegen, Schloßgasse 30, D - 6731 Elmstein 2 (Igelbach) — 12 DM

Finnlando:
Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-58, 016 Vantaa 61

Francio:
Fédération Espérantiste du Travail, 179 rue Ordener, 75018 Paris (p. ĝ. k. Paris, n-ro 902-52).

Germana Demokratia Respubliko:
Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 Berlin — M 10,–

Okcidenta Berlino:
s-ro Manfred Kossolobow, 1 Berlin, Topiauer Allee 2

Hispanio:
Luis Serrano Perez, Font Nova 32 Sabadell (Barcelona) — 480 pesetoj

Hungario:
Hungara MEM-Komitato, H-1368 Budapest 5, pf. 193 — 36 ft.

Italio:
S-ro Riccardo Pinori, V. le Ghisleri 9/15, I-00176 Roma (p. ĝ. k. 64882004)

Japanio:
S-ro Kurita Kimiaki 1209-98 Sakuragoaka Yata, Mi-ima, 411 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio)

Kubo:
Rufino Lopez, Havana Esp.-rondo Poŝtkesto 314, Habana 1

Norvegio:
Olav Reiersol, Buerstad, N-3135 Torod

Pollando:
RUCH – WARSZAWA

Portugalio:
Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/CA – Lisboa 4

Rumanio:
S-ro Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C., ap. 17, R-1900 Timişoara

Socialisma Respubliko Vjetnamio:
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 13 Ho Xuan Huong, Hanoi

Sovetunio:
Asocio de Sovetaj Esperantistoj, prosp. Kalinina 14, Moskva K – 9 — 1,80 r.

Svedio:
Tomas Jannson, Väktargatan 26 D, S-754 22 Uppsala

Usono:
Jim Deer, 11905, SW Settler Way Beaverton, Or. 97005

Aliaj landoj:
Bv. turni vin al unu el la ĉi supraj adresoj, aŭ al Pierre Jouvin

Grave:

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 Sofia, bulv. Ĥristo Botev 97 (Por „Paco"). El nesocialismaj landoj – al la adreso de la Centra kasisto.



Germana Demokratia Respubliko

Herta Zemlin, **301 Magdeburg,** Stolzestr. 3 (40 j.), dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde, kol. il. pk.
Monika Schrage, **8021 Dresden,** Augsburger Str. 84, komencantino, 34 j., dez. kor. pri politiko, paco, turismo, sporto k. gesamideanoj el amikurboj de Dresdeno.

Hungario

21 j. teknikisto dez. kor. k. gejunuloj pri sporto, naturo, fotografado, kol. bk: Gabnai Sándor, **H-2120 Dunakeszi,** Zringi Miklós 13
Anoj de la BERVA Esperanto-Grupo dez. kor.:
József Tosa, **H-3343 Bekölce,** Május 1. u. 2., seruristo, 29 j., p. ĉ. t.
Balász Dobos, **H-3300 Eger,** Albert F. u. 4, 37 j., ĉeflaborestro
Zsuzsanna Polgár, **H-3358 Erdötelek,** Tenki u. 80, 20 j., kvalitkontrolistino, p. ĉ. t.
Zsunna Vona, **H-3300 Eger,** Andrásbiró u. 8/a, konstruistino, 30 j., p. ĉ. t.
Józsefné Juhász, **H-3324 Felsötárkány,** Kossuth u. 15, oficistino, 35 j., p. ĉ. t.
Maria Bajzát, **H-3304 Eger,** Apátfalvi u. 8, maŝinteknikistino, 27 j., p. ĉ. t:
Lászlóné Boross, **H-3304 Eger,** 2. lkt. 2/1., oficistino, 37 j., p. ĉ. t.
Endre Farkas, **H-3324 Felsötárkány,** Fö u. 33, konstruisto, 44 j.,
László Gazso, **H-3300 Eger,** Cifrakapu u. 102. 1. 4., kooperisto, 23 j., p. ĉ. t.
József Juhász, **H-3324 Felsötárkány,** Kossuth u. 15, seruristo, 40 j.,
László Kiss, **H-3300 Eger,** Tavasz u. 16, instrumentfaristo, 30 j., p. ĉ. t.
Dóra Orsó, **H-3300 Eger,** Kallómalom u. 9, laborestrino, 36 j., pri turismo, sporto, vojaĝoj, florĝardenkulturo
András Pápai, **H-3300 Eger,** Kodály Z. u. 24, seruristo (gupprezidanto 40 j., p. ĉ. t.
István Tóth, **H-3300 Eger,** Bercze N. u. 11, konstruisto, 34 j. pri turismo, ĝardenkulturo
Lászlo Varga, **H-3300 Eger,** Cifrakapu u. 102, seruristo, 30 j., pri fotografado
Ibolya Alföldi, **H-3341 Egercsehi,** Petöfi u. 25, 20 j., pri sporto
Zoltán Szabó, **H-3301 Eger,** Pf. 2, elektroteknikisto, 52 j., p. ĉ. t.
Jolanka Szabó, **H-3301 Eger,** 1 lkt. 7-B/1., kvalitkontrolistino, 46 j.,
Erszébet Lóczi, **H-3304 Eger,** Kovács J. U. 76, oficistino, 20 j., pri literaturo
Tibor Pásztor, **H-3300 Eger,** Cifrakapu u. 37, fsz. 2, elektrikisto, 46 j., pri fotografado
Imre Bukta, **H-3300 Eger,** Lenin u. 255, laboratorestro, 46 j., pri fotografado, ĝardenkulturo
Lászlo Demeter, **H-3300 Eger,** Szölo u. 8., kulturestro, 46 j., pri literaturo, arto
László Gyepes, **H-3300 Eger,** Faggyas u. 6, tipografisto, 50 j., pri turismo, florĝardenkulturo
Lászlo Holló, **H-3300 Eger,** Babocsai u. 18, 25 j., maŝinkonstruisto, pri sporto, kol. bildromanojn
János Kovács, **H-3399 Andornaktálya,** Dózsa u. 28, instrumentisto, 23 j., pri sporto
Lászlo Németh, **H-3304 Eger,** 1. lkt. 7-B/2, kvalitkontrolisto, 26 j., pri aŭto, turismo
János Papp, **H-3341 Szomolya,** Szabadság tér 12., tornisto, 28 j., pri literaturo
János Szabó **H-3343 Bekölce,** Szabadság u. 8, tornisto, 21 j., pri futbalo
Endre Tóth, **H-3301 Eger,** Pf. 2, muntisto, 20 j., sporto, literaturo
Antal Novák, **H-3300 Eger,** Csákány u. 35, 31 j., maŝ. teknikisto, pri fotografado, turismo, sporto

Japanio

s-ino Kuraŭĉi Juriko, **Sannai Saŭbe 416-2,** Aomorisi 036, dommastrino, 32 j., dez. kor. pri literaturo, filozofio
Haga Kijoiĉi, s-ro **Taĉita Hirakamaĉi Nangun Aomoriken 036,** eldonisto, 30 j., dez. kor. pri poemoj
Kako Nobuko, s-ino, **Fujimi-cyo 5-26** Hirosaki-si 036, dommastrino, 30 j., dez. kor. pri fabeloj, kuirado
Kacuiama Akira, **Tomita 3-6-4-Kennai Shuppan Hirosaki-si, 036,** studento, 16 j., dez. kor.
Harejama Juniĉi, **Kacuragaŭa 111-6** Aonago **Hirosaki-si 036,** studento, 16 j., dez. kor. pri literaturo
Iŝikaŭa Hiroŝi, s-ro, **Kitazono 2-12-7 Hirosaki-si 036,** studento, 15 j., dez. kor. pri teniso, legado

Pollando

Honorata Wojna, Wojny Pogorzel-46, **18-210 Szepietowa,** Woj. Łomza, 21 j., dez. kor.
Instruistino, 49 j., dez. kor. pri historio, geografio, turismo: Danuta Kwiatek, **41-800 Zabrze,** ul. Wolnóśsci 284a
Fraŭlo, 23 j., dez. kor. p. ĉ. t.: Mieczyslaw Skrzypczak, Komorów 48, 36110 **Majdan Krolewski**
Studentino, 22 j., dez. kor. k. geesp. el GDR pri muziko, vojaĝoj, kemio, sporto: Lidia Machowska, ul. Mieszka I 15/180, **40-877 Katowice** DS nr. IV
Studentino, 22 j., dez. kor.: Miroslawa Łopatka, **87-100 Torun,** ul. Slowackiego 1/3, D. S. 6
Flegistino, 21 j., dez. kor. kol. bk.: Stefania Mazurek, ul. Polna 4/22, **05-200 Wolomin**
Mandziak Ryszard, **59-700 Bolesławice SL,** ul. Cicha 13/5, woj. Jelenia Gora, 23 j., dez. kor. k. esp. el GDR pri sporto, turismo

Soveta Unio

Anoj de klubo de Internacia Amikeco en Universitato en Gorjkij, komencis lerni Esperanton k. dez. kor. tutmonde. Bv. skribi al la kursgvidanto Beŝkarev V. P., **603137 Gorjkij,** prosp. Gagarina 222, kv. 95
Regina Gedminaite, **235421 Kurŝenai,** Daugelin 84–28, Litovio, 18 j., dez. kor. pri historio, literaturo, muziko, kino, arto, sporto
Ŝaripov, Karim, str. Burovikov 2-1, **pos. Pridorojnij Gurjev,** Kazaĥa SSR, 465412 fraŭlo, 27 j., elektristo, dez. kor. p. ĉ. t., tutmonde, kol. bk.
Erikas E. Laicona, **Kaunas – C,** Poste restante, Litovio, 29 j., speleologo, dez. kor. tutmonde pri speleologio, kavernoj, fotografado turismo, kol. bk.
Aldlite Mizeraite (16 j.), Gediminas Mizeras (21 j.), L. Giros 13–5, **233000 Kaunas,** Litovio, dez. kor. tutmonde, kol. bk., diskojn
Gestudentoj de Tbilisa Ŝtata Universitato dez. kor. tutmonde, (17–22 j.): Universitata Komitato de Komsomolo, Esperanto, **380028 Tbilisi-28,** Pr. Ĉavĉavadze L.
19 j., studentino, dez. kor. tutmonde, kol. bk. diskojn Rasa Ĉepulyte **235400 Ŝiauliai,** Talsas 2-18, Litovio
13 j. komencantino, dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, kol. il. pk, pm: Mudrone Hrdrulevijute, Prienu 19, **234365 Stakliŝkes Prienu raj.**
Esperanto-rondeto de pionira tendaro „Artek" dez. kor. tutmonde k. infanaj E-kluboj k. rondetoj. Bv. skribi al Aleksandro Kalaŝnikov, do vostrebovanija, **334265 Artek,** Krimeo
Inĝeniero dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk: Konstantin Misin, **198215 Leningrad,** str. III Internacionala, 36–55
Marina Ljaŝĉenko (41 j.) str. Leninskogo komsomola II - 43, u. Sosnovoborsk, Krasnojarskij kraj, dez. kor. p. ĉ. t.
Studentino, 17 j., dez. kor. pri muziko, sporto, kol. diskojn: Galina Malahova, str. Kurĉatova 9–34, **660041 Krasnojarsk**
Vasilij Mirgunov (25 j.) dez. kor. pri moderna muziko, cirko: str. Scorsa 51–53, **660094 Krasnojarsk**
Lernantino, 16 j., dez. kor. pri literaturo, muziko, kol. insignojn, diskojn: Marina Parŝukova, str. 5-ja Prodolnaja 57, **660056 Krasnojarsk**
Valentina Pekarskaja dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde: str. Visotnaja 7–30, **660041 Krasnojarsk**
Lernantino, 16 j., dez. kor. tutmonde, kol. insignojn: Lena Potehina, str. Juŝkova 28–21, **660113 Krasnojarsk**
Tajpistino, 23 j., dez. kor. k. gejunuloj el Bulgario p. ĉ. t.: Svetlana Rukosueva, str. Malinovskovo 7 – I, **Krasnojarsk – 5**
Bronislav Seleviĉ (40 j.) dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.: Poĉtovij **Krasnojarsk 17,** Dovostrebovanija
Anatolij Sidorov, str. 60-let Oktjabrja 55–205, **Krasnojarsk 79,** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
Lernantino, 16 j., dez. kor. pri sporto, muziko, foto: Natalija Stoma, str. Totmina 15–66, **660113 Krasnojarsk**
Natalija Ŝatnih (24 j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: str. Habarovskaja 4–18 **660041 Krasnojarsk**
Ŝĉukovskij Valerij (30 j.) dez. kor. pri radio, turismo, fiŝkaptado: str. L. Kechoveli 91–45, **660028 Krasnojarsk**
Lernantino, 17 j., dez. kor. p. ĉ. t. kol. bk., insignojn: Svetlana Tupikina, str. Voronova 25–26, **660112 Krasnojarsk**
Instruistino (26 j.) dez. kor. pri literaturo, muziko, kino k. geesperantistoj el GDR, Pollando, Britio: Nadejda Usaĉeva, str. Sevĉenko 68–88, **660092 Krasnojarsk**
Komencantino, 21 j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Tamara Volkova, str. Mojajskogo 7–74, **660041 Krasnojarsk**
Natalja Vorobjeva (24 j.) dez. kor. pri poezio, trikado: str. Lomonosova 94a, 326, **660058 Krasnojarsk**
Svetlana Zagidulina (35 j.) dez. kor. pri sporto, turismo: str. Mojajskogo 4–51, **660041 Krasnojarsk**
Studentino, 21 j., dez. kor. pri sporto, turismo, trikado: Simona Semjonova, str. Spandarjana 5–6–3, **660020 Krasnojarsk**
Studentino, 21 j., dez. kor. pri muziko, naturprotektado: Tatjana Kapustina, str. 2-ja Habaroskaja 14–38, **660041 Krasnojarsk**
Vladimir Rjazanov (24 j.) dez. kor. pri historio, radio, ŝako, k. geesperantistoj el GDR, Bulgario, Britio: str. Krasnoj Armii 9/A – **85 Krasnojarsk**
Nina Alekseenko, 29 j., dez. kor. pri sporto, turismo: str. Kurĉatova 4–30, **660041 Krasnojarsk**
Lernantino, 16 j., dez. kor. k. gejunuloj pri moderna muziko: Lena Amarina, str. Juŝkova 28–44, **660113 Krasnojarsk**
Nina Brodin, 29 j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: str. Paraŝjutnaja 78–100, **660079 Krasnojarsk**
Petro Butorin (24 j.) dez. kor. pri historio, medicino, naturo: str. Svobodnij 63–13, **660028 Krasnojarsk**
Valentina Fedosseva (24 j.) dez. kor. pri literaturo, lingvoj: str. Juŝkova 44–61, **660113 Krasnojarsk**
Junulo, 15 j., dez. kor. tutmonde, kol. pm, insignojn: Vadim Gorbuŝin, str. Semafornaja 235–14, **660064 Krasnojarsk**
Lernantino, 15 j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm.: Alla Graĉkova, str. Totmina 25–104, **660113 Krasnojarsk**
Valentina Ivanova (29 j.) dez. kor. pri literaturo, turismo: str. Truda 148 – I, **660100 Krasnojarsk**
Gulja Jusupova (26 j.) dez. kor. tutmonde pri sporto: str. Lomonosova 94-a, 328, **660058 Krasnojarsk**
Ljudmila Kostjakova (25 j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: str. Moskovskaja 5–50, **660069 Krasnojarsk**
Lernanto, 14 j., dez. kor. tutmonde, kol. pm, insignojn: Lunjov Andrej, str. Matrosova 9-b, 73, **660064 Krasnojarsk**

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio, Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 2 20 29 91. Respondeca redaktoro: D-ro Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Ludwig Schödl, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 28a de Februaro 1979. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.
9408-36



Lasta paĝo: Internacia Jaro de la Infano

Frontpaĝo: Foto Thomas Billhardt (Zentralbild)